

OK NOVELOJ

DE
ARNOLD BENNETT


El: The Matador of the Five Towns and other Stories.

EL LA ANGLA LINGVO TRADUKIS
ALFRED E. WACKRILL

Prezo: Du Ŝilingoj.

LONDONO
BRITA ESPERANTISTA ASOCIO
17 HART STREET, W.C. 1

1919



OK NOVELOJ.

TOBACCO CO

OK NOVELOJ

DE

ARNOLD BENNETT

El: The Matador of the Five Towns and other Stories.

EL LA ANGLA LINGVO TRADUKIS

ALFRED E. WACKRILL

LONDONO

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO (INCORPORATED)

17 HART STREET, W.C. 1

1919

AL SINJORO
ARNOLD BENNETT

respekte dediĉas
LA TRADUKINTO.



82-3

821.111-311.2-3-9biv

ENHAVO.

	Paĝo
La Matadoro de la Kvin Urboj	5
Mimi	40
La Reganta Iluzio	57
La Letero kaj la Mensogo	64
Jok-Aventura	71
La Heroeco de Tomaso Chadwick	90
Sub la Horloĝo	104
Tri Epizodoj en la Vivo de Sinjoro Cowlshaw, Dentisto	112

65

8
 9
 10
 11
 12
 13
 14
 15
 16
 17
 18
 19
 20
 21
 22
 23
 24
 25
 26
 27
 28
 29
 30
 31
 32
 33
 34
 35
 36
 37
 38
 39
 40
 41
 42
 43
 44
 45
 46
 47
 48
 49
 50
 51
 52
 53
 54
 55
 56
 57
 58
 59
 60
 61
 62
 63
 64
 65
 66
 67
 68
 69
 70
 71
 72
 73
 74
 75
 76
 77
 78
 79
 80
 81
 82
 83
 84
 85
 86
 87
 88
 89
 90
 91
 92
 93
 94
 95
 96
 97
 98
 99
 100

LA MATADORO DE LA KVIN URBOJ

I

SinJORINO Brindley rigardis sian edzon trans la tagmanĝa tablo per vigle brilantaj okuloj, kiuj montris, ke io neordinara sin movas en la cerbo loĝanta malantaŭe.

“Bob,” ŝi diris kun sereno artifa. Vi ne scias, kio ĵus al mi venis en la memoron !”

“Nu ?” li diris.

“Nur, ke estas hodiaŭ la datreveno de la avino !”

Mia amiko Roberto Brindley, arĥitekturo, forte frapis la tablon per la pugno, kio palpebrumigis liajn knabojn ; tiam li kviete diris :

“La diablo mem !”

Mi ekkomprenis, ke oni forgesis la datrevenon de la avino, feston, kiun oni ne senpune povus forgesi. GesinJORoj Brindley ambaŭ verŝajne havis humoran sintenadon al la krizoj, kontraŭaĵoj kaj cirkonstancaj interbatiĝoj, kiujn oni pro oportuneco ordinare nomas “interkruciĝoj.” Mi ja povus imagi, kiel unu el ili dirus al la alia : “Jen interesa afero ! La domo jam brulas !” kaj kiel ili tiam, diskurante por siteloj, lasus sin cedi al ridado. SinJORINO Brindley, en ĉi tiu okazo ekzemple, ridis : ŝi fikse rigardis la tablotukon kaj ridadis preskaŭ silente en si mem ; kvankam konjekteble ilia kuneza forgesemo povus rezulti en portempa malŝato ĉe unu respektinda praparenco, kiu estis ankaŭ, ĉe deca observado de datrevenoj, konstanta fonto de riĉaj donacoj en kontanto.

Roberto Brindley tiris el sia brusta poŝo hortabelon, kun la rapida gesto de kutimeco. Ŝajnas, ke ĉiuj aferistoj en la Kvin Urboj portas en la brusta poŝo tiun hortabelon. Tiam li atente rigardis sian poŝhorloĝon.

“Vi havas tempon por vesti vian idaron kaj trafi la vagonaron de la dua kaj kvin. Ĝi kuniĝas ĉe Knype (elp. *Найп*) por Axe” (elp. *Акс*).

La du knabetoj, eble kvar- kaj ses-jaraj, kiuj ĝis nun estis kulerantaj sur siajn antaŭtuketojn la ŝmiran enhavon de teleroj neordinare profundaj, forlasis siajn kulerojn kaj komencis babili pri praavino, kaj unu el ili kelkajn fojojn insistis, ke li nepre portos la novajn gamaŝojn.

"Jes," respondis al sia edzo sinjorino Brindley, post pripenso. "Kaj belan premamason oni trovos en la vagonaro, pro tiu futbala profludo!"

"Nenia rimedo! . . . Nun, knabetoj, supren malaperu al vartistino."

"Kaj kion pri vi?" demandis sinjorino Brindley.

"Vi devas diri al la maljunulino, ke min detenas aferoj."

"Lastan jaron mi tion diris al ŝi, kaj vi scias, kio okazis."

"Nu," diris Brindley, "jen ĵus alvenis Loringo. Vi kompreneble ne supozas, ke mi lin lasos. Aŭ ĉu venis al vi la bela ideo, ke ni konduku lin al Axe, por pasigi agrablan posttagamezon kun via altestimata avino?"

"Ne," diris sinjorino Brindley, "certe ne tio."

"Kio, do?"

La knabetoj, turninte sin sur siaj aksoj, deglitis mal-supren de siaj altaj seĝoj, kvazaŭ de ĉevaloj.

"Aŭskultu," mi diris. "Vi devas ne zorgi pri mi. Estos al mi tute bone."

"Ha-ha!" ridegis Brindley. "Mi figuras al mi, vidi vin vage liberigita en tiu ĉi interesa urbo en vintra post-tagmezo. Ŝajnas, ke mi vin observas!"

"Mi povus resti en la domo kaj legi," mi diris, ekrigardante la librojn amase starantajn ĉe ĉiu muro de la manĝoĉambro. La domo estis ĉie kvazaŭ duontapetita per libroj.

"Putra babilo!" diris Brindley.

Tio ĉi estis nur mia tria vizito al lia hejmo kaj al la Kvin Urboj, sed ni du jam fariĝis kurioze intimaj. Miajn du antaŭajn vizitojn mi devis danki al oficialaj pilgrimoj, kiel spertulo de la Brita Muzeo rilate la ceramikon. La tria celis semajnfino simple amikan kaj sen preteksto. Fakte, mi min sentis altirata al tiu mirinda regiono kaj al ĝiaj mirigaj loĝantoj. Por mi la Kvinurbaro similis al la Oriento por tiuj, kiuj flaris la Orienton: ĝi "alvokis."

"Mi diros al vi, kion ni povus fari," diris sinjorino Brindley. "Ni povus trudi lin al Doktoro Stirlingo."

“Tion ni ja povus!” konsentis Brindley. “Edzino, tiu ĉi estas unu el viaj klaraj, inteligentaj tagoj. Ni ŝovos vin, Loringo, sur la kuraciston. Mi admonos lin, ke li devas vin teni konstante amuzata ĝis nia reveno, kio, mi timas, ne estos frua. Jen, kion ni nomas ĝentileco, vi vidas—inviti kunhomon veturi cent kvindek mejlojn por pasigi du tagojn ĉi tie, kaj tiam elĵeti lin, antaŭ ol li restis unu horon en la domo. Tio ĉi estas ĝuste *ni!* Sed, por diri la veron, tiu datrevena afero povus esti iom serioza. Ĝi povus facile kosti al mi kvindek funtaĉojn, kaj senfinan diplomation. Se vi estus edziĝinto, vi sciус, ke la dek punbatoj de Egiptujo estas simpla bagatelo kompare kun la parencoj de via edzino. Kaj ŝi estas pli ol okdekjara, tiu maljunulino.”

“Mi havigos al vi la dek punbatojn de Egiptujo!” minacis sinjorino Brindley al sia edzo, kondukante la knabetojn el la ĉambro. Sinjoro Loringo, prenu ankoraŭ da tiu fromaĝo, se vi ĝin trovas agrabla.” Ŝi malaperis.

Post malpli ol dek minutoj, Brindley estis kondukanta min al la kuracisto, kies domo staris apud la vojo al la stacidomo. En ĝia vasta portiko li per ses vortoj klarigis la cirkonstancojn, min kvazaŭ paketon demetante. La kuracisto, kiu iam per misteraj medikamentoj savis mian kadukan organismon el la sekvoj de unu el la *Falstaff* 'aj “noktoj” de Brindley, gastame certigis pri sia volonteco oferi siajn pacientojn pro mia plezuro.

“Ĝi liveros ŝancon al MacIlroy,” li diris.

“Kiu estas MacIlroy?” mi demandis.

“MacIlroy estas alia skoto,” murmuregis Brindley. “Eksterordinare, kiel ili intergluiĝas! Kiam li deziris helpanton, ĉu vi supozas, ke li serĉis iun en ĉi tiu regiono, kiu nin komprenus kaj nin amus kaj povus poenti kun briĝaj kartetoj? Tute male! Jen, li forveturas al Cupar, aŭ ien alilokaĉe, kaj revenas kun dua sceneja skoto, nomata MacIlroy. Nu, vi aŭskultu min, Dok! Oficon vi havas por plenumi, kaj vi zorgu, ke vi ĝin plenumu, aŭ mi neniam saldos vian malbenitan konton. Ni tamburos sur via fenestro, kiam ni revenos en la nokto. Dume, vi povos montri al Loringo viajn akvofortaĵojn, kaj preĝi por mi.” Kaj al mi: “Jen domporda ŝlosilo.” Sen plua ceremonio li

forrapidis por renkonti sian edzinon kaj siajn infanojn ĉe la Bleakridge stacidomo. Laŭ tiu stranga maniero mi estis perforte transdonita de unu gastiganto al alia.

II

La doktoro kaj mi similis unu la alian per tio: ke neniu el ni posedis iom da ĝena afableco. Kvankam abundante je bonvolo, ni ne povis atingi intimecon per subita volago. Nia interparolo estis malfacila, nenatura kaj per ekblovoj false familiara. Li montris al mi sian fraŭlan domon, siajn akvofortaĵojn, kelkajn specimenojn de moderna *rouge flambé* fajenco fabrikata en Knype, sian viskion, sian vaste-konatan, premiojn-gajnintan ter-hundon Titus, la plej grandan kolekton de libroj en la Kvin Urboj kaj foto-grafaĵojn de Marischal Kolegio en Aberdeen. Tiam ni fariĝis spiritalcaj, socie sterniĝintaj. Sidante en lia studejo, kun Titus inter ni sur la antaŭkamaena tapiŝo, ni sciis, nek kion diri, nek kion fari. Mi bedaŭris, ke la avino de la edzino de Brindley devis naskiĝi en ia dek-kvina de Februaro. Brindley estis vigla babilulo; oni povus fidi al li por parolo. Mi ankaŭ estas bona babilulo—en kuneco kun alia homo parolema. Kun lakona homo, mi estas iomete pli silenta ol li. La doktoro diris abrupte, post nervoturmenta silento, ke li estis forgesinta unu tre gravan viziton en Hanbridge, kaj ĉu mi volas akompani lin en la aŭtomobilo? Mi estis kaj ankoraŭ nun estas konvinkita, ke li simple mensogis. Li volis rompi la malbonan sorĉon per eliro el la domo, kaj li ne havis la aplombon por proponi vagekskurson sur la stratoj de la Kvin Urboj, kiel promenon por plezuro.

Ni do ekveturis, plaŭdante singarde tra la ŝlima koto kaj penetra nebulo de Trafalgar Road, preter la serion de strangaj, malhele ruĝaj dometoj, kaj krudaj malplenaj terpecoj, kaj reklamaj tabulaĵoj, kaj rondformaj potofornoj, kaj altaj, fumantaj fumturoj, kaj sur deklivoj supren kaj malsupren kaj denove supren, kontraŭ kaj laŭ-voje de multaj elektraj tramveturiloj, kiuj grimpis kaj deglitis kvazaŭ ŝipoj sur la maro, ĝis ni eniris la placon Crown Square, la centron de Hanbridge, patrinurbo de la Kvin Urboj. Kaj dum la kuracisto faris sian misteran viziton,

mi atente observis ĉirkaŭ mi la grandajn magazenojn kaj la bankodomojn kaj la oritajn hotelojn. Tra la radiaj strataleoj mi povis distingi la fasadojn de haloj, teatroj, preĝejoj. Tramveturiloj tondretantaj konstante eniris kaj eliris je la placo. Ŝajnis kvazaŭ ili eniras hazarde, ŝanceliĝas kelkajn momentojn kvazaŭ en dubo, kaj tiam decidas, kun indiferenta bruo de sonoriloj, ke pli bone estas foriri ien aliloken, serĉe de io pli interesa. Iom ili similis je homaj estaĵoj kondamnitaj loĝi por ĉiam en loko, kiu ĝenas ilin pli ol vortoj povas esprimi.

Kaj vere la influo de Crown Square kun ĝiaj larĝaj efektoj de potargilaĵo, plata vitraĵo kaj oritaj literoj, ĉio sub peza ĉielaĵo el ardezkolora fumo, estis premega. Malmultaj tre malelegantaj viroj (reliefe kontrastantaj je la luksa delikateco de altprezaj objektoj malantaŭ plata vitro) persiste staradis jen kaj aliloke sur la koto, senmovigite de la malĝoja sorĉo de la placo. Du el ili sin turnis por rigardi la aŭtomobilon de Stirlingo kaj min. Ili fikse rigardegis longan tempon, kaj tiam unu diris, movante nur siajn lipojn :

“Ĉu Tomĉjo regalis al vi tiun kvarton da biero, laŭ promeso ? ”

Nenia konfeso, nenia respondo, kia ajn, dum plua longa paŭzo ! Tiam la alia diris kun melankolia rezignacio :

“Jes ! ”

Ĉesis la interparolo, farinte malgrandan oazon en la malgaja dezerto de ilia silenta observado de la aŭtomobilo. Krom per laŭokaza piedbato, ili neniel moviĝis. Ili nur staris persiste kaj indiferente, blovate de ĉiuj mordantaj ventoj de la placo, kaj kvazaŭ pliprofundigante en ĝian melankolion. Min, la severa malgajeco de la sceno, anstataŭ mizerigi, ŝajnis plialtigi ; mi ĝin kun ĝojo gustumis, kiel oni gustumas la melankolion de ia tragedia artverko.

“Ni povus iri al la oficejo de la *Signal*o kaj iom turmenti Buchanan,” gaje diris la kuracisto, reveninte al la aŭtomobilo. Jen la dua el liaj inspiroj.

Buchanan, pri kiu mi jam aŭdis, estis alia skoto kaj redaktoro de la sola ĉiutaga organo de la Kvin Urboj, vespera gazeto, kriata la tutan tagon sur la stratoj kaj legata de la tuta loĝantaro. Ĝia verda folio ŝajnis ĉiama flirtanta fenomeno de la ĉefaj stratoj. La oficejo staris

apude post stratangulo, kaj ĉe nia halto kontraŭ ĝi, amaso da ĉifonitaj buboj interrompis siajn petolojn sur la malseka vojo por festi nian gloran alvenon, unuanime kriegante plenstreĉe de siaj knarantaj kaj raŭkaj voĉoj :

“Hura ! Hu-sanga-ra !”

Konfuziĝe mi sekvis mian doktoron sub la ŝirmon de la domo, nova konstruaĵo, vasta kaj impresa, sed abomene kovrita per bakita potargilo, kaj tute ne imponanta, sen spektakla efekto ; senĝene, eĉ spite, malbela ! La kanajlaj svingantaj duklapaj pordoj returniĝas atake post via puŝo, kaj frapas vin malice. En unu malluma ĉambro kun bartabloj, kaj afiŝita per “Demandoj,” estis neniu.

“Kiu estas ? ” kriis la doktoro.

Aperis kapo ĉe la pordo.

“Sinjoro Buchanan, ĉu supre ? ”

“Jes,” minace diris la kapo, kaj malaperis.

Supren sur la malluma ŝtuparo ni iris, kaj ĉe la supra ni estis duone faligitaj de alia pordo memfunkcia.

En la ĉambro, al kiu ni tiam venis, du viroj, unu maljuna, la alia iom juna, sin klinis super granda malorda tablo, rapide skribante kaj aranĝante pecojn de griza maldika papero kaj telegramojn. Malantaŭ la maljunulo staris knabo. Neniu el ili levis la kapon.

“Sinjoro Buchanan, ĉu en sia—,” komencis la doktoro. “Ha ! jen vi estas ! ”

La redaktoro, portante ĉapelon kaj skarpon, staris ĉe la fenestro, elrigardante. Li havis, kredeble, saman aĝon, kiel la doktoro—ĉirkaŭ kvardek ; kaj, ĝuste kiel tiu ĉi, li estis iom dika, kaj elrazita. Iliaj skotaj tonoj unuigis en salutado ; pli akcentita estis la tono de la doktoro. Buchanan prenis mian manon kun bontona mieno, kiu montris, ke li kutimas akcepti fremdulojn. Tamen rilate kapablon je societa babilado, li neniel estis pli brilanta ol liaj vizitantoj, kaj ni tri tie staris ĝenete apud la fenestro en la amase malorda ĉambro, dum la aliaj du viroj knaris kaj klopodadis kun paperetoj ĉe la makulita tablo.

Subite kaj minace la maljunulo sin turnis al la knabo :

“Kion, per diablo, vi tie atendas ? ”

“Mi pensis, sinjoro, ke estas ankoraŭ io.”

“Forigu vin.”

Buchanan grimacis per la okulo al Stirlingo kaj mi, dum la knabo sin forŝovis kaj la maljunulo dolĉe daŭrigis skribi.

“Eble plaĉos al vi trarigardi la ejon?” ĝentile proponis al mi Buchanan. “Mi akompanos vin. Hodiaŭ mi ne taŭgas por io alia . . . La gripo!” Li ekrigardis Stirlingon kaj oscedis.

“Pli bone vi estus en via lito,” diris Stirlingo.

“Jes, mi tion scias. Mi dum dek du jaroj ĝin scias. Mi enlitiĝos tuj kiam mi ricevos pecon da tempo por mi mem. Nu, ĉu vi volas iri? La duon-tempaj rezultatoj komencas alveni.”

Telefona tintilo urĝe vokis.

“Estu bonulo, kaj vidu, kio estas, estro,” diris la maljunulo, ne rigardante supren.

Buchanan iris al la telefono kaj parolis en ĝin: “Jes? Kion? Ho! Majat? Jes, li estas ludanta Kompreneble, ke mi estas certa! Adiaŭ.” Li sin turnis al la maljunulo: “Ĝi estas ankoraŭ alia, kiu scivolos, ĉu Majat estas ludanta. Birmingham, tiun ĉi fojon.”

“Ha!” diris la maljunulo, ĉiam skribante.

Ĝi koncernas la vetadon,” Buchanan diris en mian direkton. “La veta cedo estas nun favora al Knype—tri kontraŭ du.”

“Se Majat estas ludanta, Knype ŝuldas tion al mi,” diris la doktoro, surprize.

“Al vi?”

“Al mi! Li vokis min hodiaŭ matene al sia edzino. Ŝi baldaŭ akuŝiĝos. Alarmo erara. Mi certigis lin pri almenaŭ dek du horoj.”

“Ho! Do tiel estas, ĉu vere?” murmuris Buchanan. Ambaŭ subredaktoroj levis la kapojn.

“Tiel estas,” diris la doktoro.

“Kelkaj homoj dismetis, ke li denove malpaciis kun la dresisto kaj ŝajnigas malsanon,” diris Buchanan. “Sed mi tion ne kredis. Certe, Jos Majat ne estas ĉikanulo.”

Mi sciigis per demandoj, ke granda kaj terura futbala provoludo tiumomente mem okazas en Knype, en la distanco de du mejloj, inter la Knype’a Klubo kaj la Manchester Rovers. Estis kredigite al mi, ke la graveco de tiu provludo estas preskaŭ nacia, ke la tuta regiono kvazaŭ tenas sian

spiradon, ĝis oni konatigos la rezultaton. La duontempa raporto montris unu celtrafon por ĉiu partio.

“Se Knype perdos,” diris Buchanan, klarige, “ĝi sin trovas forŝovita el la Unua Ligo en la fino de l’ sezono. Jen certaĵo . . . unu el la plej malnovaj kluboj en Anglujo ! Duonfinuloj por la angla pokalo en ’78.”

“Sepdek-naŭ,” korektis la pliaĝa subredaktoro.

Mi divenis, ke la krizo estas grava.

“Kaj Majat, supozeble, estas la trupestro ?” mi demandis.

“Ne. Sed li estas la plej taŭga malantaŭludanto en la Ligo.”

Tiam mi havis vizion de Majat kiel eminentulo. Per streĉo de la imago mi komprenis, ke io egala al la sorto de la nacioj dependas de li. Mi rememoris, nun, grandajn flavajn afiŝojn sur la aviztabulegoj, kiujn ni estis pasintaj, kun la nomoj de Knype kaj de Manchester Rovers en futaltaj literegoj, kaj super ĉio la skribo : “Liga Provludo en Knype.” Ŝajnis al mi, ke la heroa nomo de Jos Majat, se efektive li estis la plej taŭga malantaŭulo en la Ligo, se efektive lia alesto aŭ foresto influis sur la vetadon tiel malproksime kiel Birmingham, devus troviĝi ankaŭ sur la afiŝegoj, prefere eĉ kun lia portreto. Mi figuris Jos Majat kiel matadoron kun longa kravato el skarлата rubando dependanta sur lia brusto, kaj brodita pantalono.

“Nu,” diris Buchanan, “se Knype malleviĝos en la Duan Sekcion, ili neniam plu pagos dividendon ! Ĉio estos finita kun unuaklasa futbalo en la Kvin Urboj !”

La interesoj implikitaj ŝajnis pli kaj pli malsimpliĝi. Kaj jen estis mi, kiu jam preskaŭ kvar horojn pasigis en tiu regiono ne divenante, ke la regiono vibras streĉite de ekscitiĝo pri gigantaj gravaĵoj ! Kaj jen tiu skota kuracisto, je kies komando la granda Majat estus rifuzinta ludi, dirinta eĉ ne silabon pri la afero, ĝis hazarda rimarko de Buchanan malligis al li la langon. Sed ĉiuj kuracistoj estas strange kaŝemaj. Sekreteco estas por ili privata plezuro, unu el la plej grandaj.

“Venu vidi la kolombojn, ĉu volas ?” diris Buchanan.

“Kolombojn ?” mi eĥis.

“Ni donas la rezultatojn de pli ol cent provludoj en nia futbala eldono,” diris Buchanan, kaj aldiris: “ne enkalculante rugbیلudojn.”

Ĉe nia eliro, du knaboj evite pasis nin en la ĉambron, kun telegramoj.

Post momento ni strange, surprize trovis nin sur plumbe tegita tegmento de la *Signalo* oficejo. Altaj fabrikejaj fumturoj sin levis super la horizonto el ardezaĵ tegoloj ĉiuflanke, blovante densan fumon en la posttagemezan ĉielajon jam ĝenerale fumkoloran, kaj striante per longaj nigraj vipflagoj la okcidentan karmezinon. Kaj el la fumnebuldo de malproksime alvenis blublanka kolombo, ronde fluganta kelkajn fojojn ĉirkaŭ la oficedomo de la *Signalo*. Fine ĝi malleviĝis, kaj mi povis aŭdi la batsonon de ĝiaj fortaj flugiloj. Ĉesis la flugilbatado, kaj la kolombo malsupreniris oblikve-kurbe, kun la kapo malpli alta ol la etendita vosto. Tiam la kapeto grade altiĝis kaj la vosto malleviĝis; la kurbo ŝanĝiĝis, la flugo malrapidiĝis; la kolombo estis kalkulanta per sia tuta cerbeto; okuloj, flugiloj, vosto, piedoj, ĉio estis kunordigita por la solvo de komplikita mekanika problemo. La karminetaĵ ungoj ŝajnis palpe serĉi—kaj post momenta hezito la afero ekfiniĝis, la problemo jam estis solvita; la kolombo kun admirinda gracieco estis atinginta sian ekvilibron sur la nivelo de kolombejo, kaj ordiginta la flugilojn, kaj jam ĉirkaŭrigardas kun kuriozaĵ turniĝoj de sia tre moviĝema kapeto. Baldaŭ ĝi deflugis al la plomba planko, paŝis balance tien kaj reen kun la neelegantaĵ gestoj de sesdekjara dikulino, kaj malperis en la kolombejon. En tiu momento la knabo, kiun oni forsendis el la ĉambro de la subredaktoro, kuris antaŭen kaj eniris la kolombejon tra pordeto metalreta.

“Oportunaj estaĵoj estas la kolomboj,” diris la doktoro, dum ni aliris la kolombejon por ĝin observi. Interne, kvindek aŭ sesdek kolomboj kveradis kaj solene paŝadis. Estis flugilbata protesto, kiam la knabo kaptis la laste venintan senditon.

“Donu ĝin!” Buchanan ordonis.

La knabo transdonis maldikan tubeton el papero, kiun li estis malliginta de la krureto de la birdo. Buchanan malvolvis ĝin kaj montris ĝin al mi. Mi legis: “Mezlanda Federacio. Axe Unuigita, Macclesfield Urbo. Provludo

forlasita post duonhora ludado pro nebulego. Tri kvardek kvin.”

“La tria kaj kvardek kvin,” diris Buchanan, rigardante sian poŝhorloĝon. “Li faris la dek mejlojn en duono de horo proksimume. Ne malbone. Nun por la unua fojo ni provis kolombojn en tia distanco kiel Axe. Atentu, knabo!” Kaj li redonis la papereton al la knabo, kiu donis ĝin al alia knabo, kiu foriris kun ĝi.

“Mia bona,” diris la kuracisto, rigardante Buchanan, “vi ne devus esti tie ĉi eksterdome. Vi almenaŭ ne estas kolombo.”

Ni malsupreniris unu post alia per la grimpa ŝtuparo, kaj nun ni nin ĵetis en la kompostejon, kie Buchanan diris, ke li sin sentas pli varme. Vastega, malpura, kalkeblanka ĉambro plena je linotipaj kaj aliaj maŝinoj, antaŭ kiuj sidis viroj kun blankaj antaŭtuko, frapetante, frapetante—rigardegante skribaĵojn pingle fiksitajn samalte je iliaj okuloj—kaj frapetante, frapetante. Speco de kaverna apartejo, en kiu monstraj feraĵ kreskaĵoj elstaris de la planko kaj renkontis duonalte elektraĵojn florojn, kiuj havis siajn radikojn en la plafono! En tiu ĵangalo apenaŭ al ni estis loko por iri. Buchanan klarigis al mi la linotipmaŝinojn. Mi observis, kvazaŭ romane songante, la fulme-rapidan falon de presliteroj, unu post alia, pluvo el literoj en la ventron de la maŝino; tiam mi iris al ĝia dorso kaj observis tiujn samajn literojn ree leviĝi en densa malrapida procesio kaj sin dispecigi aŭtomate en la supro, pretaj por denove respondi al la frapetado de viro kun iam-blanka antaŭtuko. Kaj dum ni ĉion observis, mi per kapablo, kiun oni posedas, iamaniere povis vidi kolombojn alte supre ĉiam alvenadi, elirante el la nigra nebulo, el trans la limo de fumturoj.

“Genia elpenaĵo, ĉu ne vere?” diris Stirlingo.

Tamen ŝajnas al mi, ke li ne posedis tiun kapablon, vidi kolombojn.

Respektiginda okulvitrita viro, kun la ĉemizaj manikoj refalditaj kaj antaŭtuko streĉe kovranta la duonsferan ventron, promenis malrapide laŭ unu aleo, rigardante malnetan presprovaĵon kun mieno de simplulo, kiu ĝis nun neniam vidis provaĵon.

“Jam ĝi estas pli ol kolono per unu bastoneto,” li diris konfidencie, donante la longan slipon; tiam li serioze

rigardis Buchanan, kun kapo klinita antaŭen, ne tra la okulvitroj, sed super ili.

La redaktoro indiferece akceptis la provaĵon, kaj mi legis serion da titoloj: "Knype v. Manchester Rovers. Rekorda Ĉeestantaro. Dek kvin mil rigardantoj. Du celtrafoj en dek du minutoj. Majat en bona stato. Speciala Raporto."

Buchanan redonis la slipon senverte.

"Rigardu!" li diris al mi, kaj alia kompostisto alpinglis maldikan folion al sia maŝino. Ĝi estis tiu sama papereto, kiun mi vidis malsupreniri el la ĉielo, sed ĝia enhavo estis jam pliigita kaj plibonigita de la subredaktora plumo. La viro ektrap-frapetadis, kaj la literoj komencis malsupren ŝutiĝi survoje por anonci al kvaron-miliono da homoj, ke la ludo Axe v. Macclesfield estas haltigita de nebulo.

"Mi supozas, ke tiu provludo apud Knype jam estas finita?" mi diris.

"Ho, ne!" diris Buchanan. "La dua duono apenaŭ komenciĝis."

"Ĉu plaĉus iri?" demandis Stirlingo.

"Nu," mi respondis, min sentante aventurema, "jen bela aventuro, ĉu ne?"

"Vi povos tien veturigi sinjoron Loringon en kvin aŭ ses minutoj," diris Buchanan. "Kaj li verŝajne ankoraŭ ne vidis ion similan. Vi povus revene viziti ĉi tie kaj vidi la gazeton en la presmaŝinoj."

III

Ni iris sur la grandan observejon, kiu estis dense plenigita per viroj kun okuloj fiksitaj, per nekonscia tamen peniga streĉo, sur komuna objekto. Inter la viroj estis kelke da virinoj en peltoj kaj supervestoj, egale absorbitaj. Neniu iel nin rimarkis, dum ni pene suprengrimpis sur kaduka ligna ŝtuparo, sed kiam per nelerteco ni tuŝetis homon, la kubuto de tiu homo aŭtomate kaj sovaĝe sin puŝis flanken por rebati. Mi ricevis impreson pri ĉapeloj, ĉapoj kaj lanaj supervestoj etenditaj laŭ longaj paralelaj strioj, kaj pri malpuraj, krudaj tabuloj, ĉie prezentantaj kredeble danĝerajn pikilojn, krom se ie la uzado estis frotinta al ili glatan poluron. Tiam grade mi konsciiĝis pri la vasta

kampo, kiu estis plivere bruna ol verda. Ĉirkaŭ la kampo estis larĝa rando el etaj ĉapeloj kaj palaj vizaĝoj, kaj post tiu ĉi rando palisaroj, afiŝtabulegoj, fumturoj, forneĝoj, gasujoj, telegrafmastoj, domoj kaj malvivaj arboj. Kaj jen kaj jen, birde sidantaj en strangaj danĝeraj lokoj, eĉ alte kontraŭ la malgaja ĉielo, ankoraŭ da homoj algluiĝis. Sur la kampo mem, en unu ĝia fino, estis distrita plenmano da puposimilaj figuroj, senmovaj; unuj blankkorpaj, aliaj ruĝaj; kaj estis tri nigraj; ĉiuj estis tiel etaj kaj foraj, ke ili havis la ŝajnon nur de negravaj hazardaj detaloj en la mistera procedo, kia ajn ĝi estu, kiun oni faras. Tiam blekis fajfilo, kaj tiuj figuroj ĉiuj samtempe komencis sin movi, kaj tiam mi vidis pilkon en la aero. Obtuzo, malkvieta murmurado sin levis el la grandega amaso, kiel nevidebla sed aŭdebla vaporo. Tuj poste tiu vaporo ekdensiĝis en subitan kriegon. Nun mi vidis la pilkon ruliĝanta sola meze de la kampo, kaj solan ruĝan pupon kureganta al ĝi; en unu fino estis konfuzita grupo el ruĝaj kaj blankaj, en la alia du blankaj pupoj, iom forlasitaj en la vasto. La soleca ruĝa pupo ĝiskuris la pilkon kaj trotis antaŭen, pelante ĝin per siaj batetantaj piedoj. Grandega voĉo malantaŭ mi plengorĝe kriegis kun nekredebla sonamplekso:

“Nun, Jos Majat!”

Kaj dua voĉo, malpli proksime, kriegis:

“Nun, Jos Majat!”

Kaj ankoraŭ pli malproksime la severa admono sin ĵetis for, el la amaso:

“Nun, Jos! Nun, Jos!”

La pliproksima el la blankaj pupoj, ĉe la aliro de la ruĝa, sin ĵetis antaŭen. Mi povis ekvidi kruron. Kaj jen la pilko flugas returnen per grandioza kurbo en la ĉielon; ĝi pasis ekster mian vidon, kaj tiam mi aŭdis *bump* sur la tegmentaj ardezoj de la Granda Observejo, kaj ĝi falis inter la homamason en la observeja enfermo. Sed apenaŭ komenciĝis la flugo de l' pilko, kiam terura plenvoĉa kriego de malstreĉiĝo jam tondris majeste tra la tuta kampo, kaj el tiu tondro, kvazaŭ raketoj el densa fumo, sin ĵetis helaj, ekstazaj, adoraj krioj:

“Brave, Jos!”

“Bona maturulo, Jos !”

Evidente tiu kruro estis la kruro de Jos. La pliproksima el tiuj du blankaj pupoj nepre estis Jos, ŝatata karulo de dek kvin miloj da frenezantaj homoj.

Stirlingo pugnopusis proksimulon en la flanko, por altiri lian atenton.

“Kiom da poentoj ?” li demandis al la proksimulo, kiu grimacis, jen kolere sed poste ridete.

“Du—unu—kontraŭ ni !” la alia murmuris. “Postulos al niaj malinduloj ilian tutan tempon, por fari provegalon. Ili ludas en manko de unu viro.”


“Ĉu akcidento ?”

“Ne ! Juĝanto forkomandis lin pro sovaĝa ludo.”

Kelkaj rigardantoj komencis klarigi, pasie, furioze, ke la ago de la juĝanto estis tute sen komuna saĝo kaj justeco ; kaj mi konjektis, ke homamaso malpli ĝentila sendube linĉus la juĝanton. La klarigoj forvelkis, kaj ĉiu krom mi returniĝis al sia sovaĝa observado de la kampo.

Enprofundiĝinte en ian neklaran scivolecon pri la fiksitaĵ, anksiaj* vizaĝoj ĉirkaŭ mi, mi elreviĝis per tondra ondanta hurao, kiu per amplekso kaj ĝoja sincereco superis ĉiajn bruojn, kiujn mi povis rememori. Tiu eksploda hurao resonadis tra la kampo kiel la eĥoj de kompleta pafegaro de batalŝipo en fjordo. Sed ĝi estis homa, kaj tial pli terura ol pafilegoj. Instinkte mi pensis : “Se tiel oni simptomas plezuron, kiaj do devas esti la simptomoj de doloro aŭ de ĉagreno ?” Samtempe kun la eligo de tiu unika bruo, la esprimoj de la vizaĝoj ŝanĝiĝis. Okuloj ekbriladis ; dentoj sin montris en vastaj neregataj ridetoj. Sovaga kontento devis faciligi sin per sovaĝaj gestoj, farataj ĉu sur senvivan lignon, aŭ sur la vivantan ŝtofon de kunhomoj. La dolĉa ĝentila sono de manaplaŭdo estis kvazaŭ malpeza ŝaŭmo sur la supraĵo de la ondeganta maro de plenkora akلامo. La multego el dek kvin mil ja povus esti ĵus savinta al si la vivon, aŭ forkaptinta la infanojn el pereoj kaj la edzinojn el malhonoro ; estis kvazaŭ ili nur evitis bankroton, malsategon, malliberigon, turmenton, aŭ estus rekompencantaj per pasia adorado trupon de herooj. Sed

* *Anksia* : latina, franca, angla, germana. Ĝi estas al zorgo kun dolora antaŭsenteco.



efektive ne tiel estis. Nur estis okazinta, ke la pilko ruliĝis en la celreton de la Manchester Rovers. Knype sin jam tiris en egalecon. La reputacio de la Kvin Urboj antaŭ la opinio de spertaj juĝantoj, kiuj povis distingi inter unuaklasa futbalo kaj duaklasa, restis ankoraŭ sendifekta. Mi povis aŭdi ĉirkaŭ mi specialulojn konstati, ke la situacio de Knype, kvankam ĝi devas ankoraŭ ludi kvin ligajn provludojn, estas ekster risko. Ili montris ekscitiĝe sur grandegan aviztabularon en unu fino de la kampo, sur kiu aperis nomoj de aliaj kluboj kun ŝanĝiĝantaj nombroj. Tiuj ĉi kluboj ampleksis la klubojn, kiujn Knype devis renkonti antaŭ la fino de l' sezono, kaj la nombroj montris ilian sorton sur diversaj kampoj similaj je tiu ĉi en ĉiu parto de la lando. Se en Newcastle, aŭ en Southampton, la Peruo mem de unuaklasa futbalo, oni poentas celtrafon, ĝi estas registrata sur tiu tabulego, kaj oni tuj konjektas, kiom ĝi influos sur la sorton de Knype. La kalkuloj, kiujn oni faris, estis kapturnaj.

Tiam malgranda anaro de kolomboj flugis supren kaj disiĝis, sub la iluzio, ke ili estas liberaj agantoj kaj mastroj de l' aero, sed efektive blovkondukataj for al difinitaj celoj sur la grandiozaj atmosferaĵoj ondegoj de ankoraŭ daŭranta aplaŭdado.

Post unu-du minutoj oni denove ekmovis la pilkon, kaj la pligranda bruego jam malkreskis ĝis la subtila senripoza murmuro, kiu respondis kvazaŭ sentema instrumento, al la ŝanĝiĝoj de la ludo. Ĉiu lertaĵo, ĉiu ruzo de Knype eligis senmezuran aplaŭdon laŭ sia intenco aŭ sia sukceso; kaj ĉiu artificio de la Manchester Rovers, ĉu sukcesa aŭ ne, instigis sanktan ĉagrenon. La sintenado de la homamaso jam pasis ekster la moralon en la religion.

Tiam poste, kiam mia atento estis vaginta for de la kampo, jen diabla, sovaĝa, surdiga kriego elsaltis el tiuj dek kvin mil pasiaj koroj. Ĝi min travibrigis, ĝi vere timigis min. Senvole mi faris glutan movon. Post la tondra eksplodo de furiozo venis la akra sono de fajfilo. Ekhaltis la ludo. Mi aŭdis unu saman vorton ree kaj denove ripetata en diversaj tonoj de furioza kolerego:

“Fiago!”

Mi sentis min ĉirkaŭbarita de homoj konjekteble mortigontaj, kies brakoj estas levitaj en la deziro mortigaĉi,

kaj la trajtoj ŝanĝitaj el la simileco de homoj en la korpan formon de ia elementa kaj terura instinkto.

Kaj mi vidis unu longan pupon, kiu sin levas de la tero kaj aliras pupon malpli grandan kun minacantaj manoj.

“Fiago! Fiago!”

“Faru ĝin, Jos! Trafu bone lian kolon, Jos! Li vin piede faligis!”

Sekvis longa pergesta kverelo inter la tri nigraj pupoj kun ledaj gamaŝoj kaj kelkaj el la ruĝaj pupoj. Fine unu el la marionetoj kun gamaŝoj ekleviis la ŝultrojn, faris al la du aliaj definitivan geston, kaj forpaŝis en direkto al la kamporando la plejproksima al la observejo. Tio estis la malinda juĝanto; li ne volis cedi la fiagon. En la longedaŭra duelo inter la ofenda manĉestra antaŭenulo kaj la granda honesta Jos Majat, li jam donis duan poenton al la malamiko. Tuj kiam la homamaso komprenis la malindaĵon, ĝi denove kriegis kun plialtigita furiozeco. Gi ŝajnis sin ĵeti ondege kontraŭ la dikan feran palisaron, kiu sola staris inter la juĝanto kaj la morto. La singarda juĝanto direktis sin al la granda observejo, kiel la plej sendanĝera loko. En unu sekundo, manpleno da ekzekutontoj jam iel alvenis sur la herbon, kaj en dua sekundo kelkaj policanoj troviĝis antaŭ ili, ne batante nek provante timigi, sed forte ŝovante ilin en la limojn.

“Returnen vi iru!” kriis kelkaj ordonemaj voĉoj el la observejo.

La juĝanto staris kun la manoj en la poŝoj kaj fajfilo inter la lipoj. Mi opinias, ke en tiu momento de plej akcentita malcerteco la tutaĵo de lia surtera ekzisto nepre fulmis antaŭ li kiel en luma bildaro. Kaj jen, jam pasis la krizo. Venkis la propra nobeleco de la ofendita homamaso, kaj la juĝanto estis savita.

“Li meritas, ke oni lin pugne regalus!” diris unu rigardanto.

“Jes!” diris alia malgaje, “jes! Kaj la Futbal-Asocio nin monpunus eble ĝis cent funtaĉoj, kaj plue malrajtigus la ludkampon dum la cetera sezono!”

“Diablo prenu la Futbal-Asociion!”

“Tamen, malŝati oni ne povas!”

“Nun, junuloj! Vigle ludu, Knype! Nun, junuloj! Havigu al ili brulantaĵon inferon!” Diversaj voĉoj varme

instigis la tiulokan trupon, dum oni ĵetas la pilkon en la ludon.

La filudinta manĉestra antaŭenulo tuj regajnis la pilkon. La sperto ne povis instrui lin. Dufoje li forlasis la pilkon, kaj ĉiun fojon li ĝin rekaptis. Ia satano estis en li kaj en la pilko. La satano pelis lin al Majat. Ili renkontiĝis. Kaj tiam, jen venis sono tute nova: kraka sono iom simila je forŝiro de branĉo, sed pli akra, pli decida.

“*By Jove!*” kriis Stirlingo. “Tio estis lia ostoj!”

Kaj tuj li estis for, malsupren de la ŝtuparo kun mi sekvanta. Sed li ne estis la unua kuracisto sur la kampo. Nenio estis neantaŭvidita en la mirinda organizo de tiu ĉi entrepreno. Forflugis kolombo, kaj aperis mirakle, samtempe, oficiala kuracisto kaj oficiala homportilo. Ĝi estis vere imponanta. Ĝi inspiris al mi respektagon.

“Li petis pri tio!” mi aŭdis unu viron diri, dum mi hezitis sur la bordo de la kota oceano.

Tiam mi sciis, ke Manchester, kaj ne Knype, suferis. La konfuziĝo kaj bruado estis en alta grado maltrankviligaj kaj embarasaj. Sed unu emocio klare elstaris: la plezuro. Mi mem ĝin sentis. Mi konsciis pri ĝojo pro tio, ke la du partioj estas jam egaligitaj ĝis dek viroj en ĉiu trupo. Mi mistike identiĝis kun la Kvin Urboj, sorbita en ilian vivon. Mi povis rimarki sur ĉiu vizaĝo la konvinkon, ke diprotekto estas en tiu ĉi afero, ke Dion oni ne povas spiti. Mi eĉ portis mem tiun konvinkon. Mi povis legi sur ĉiu vizaĝo la timon, ke la juĝanto eble verdiktos fiagon kontraŭ la heroo Majat, aŭ eĉ komandos lin for de la kampo, kvankam kompreneble la rompo estis pura malbonokazo. Mi ankaŭ havis tiun timon. Ĝi estis baldaŭ distrita per la sciigo, kiu blovetiĝis tra la ĉirkaŭbarejo, kvazaŭ dolĉa parfumo, ke la juĝanto alprenis la teorion de simpla akcidento. Mi vidis nedifine policanojn, homportilon, fluantajn amasojn, kaj miaj oreloj aŭdis fenomenan babilegon. Kaj tiam la figuro de Stirlingo deigis sin de la konfuza moviĝado kaj venis al mi.

“Nu,” li diris, “la tibikarno de Majat estis pli malmola ol tiu de la aliulo, jen ĉio.”

“Kiu el ili estas Majat?” mi demandis, ĉar en tuja apudesto la ruĝaj kaj blankaj pupoj jam ĉiuj malaperis, kaj anstataŭiĝis per nerekoneble gigantaj homaj estaĵoj,

ankoraŭ tamen vestitaj per pupaj trikĉemizoj kaj pupaj pantalonetoj.

Stirlingo averte ĵetbalancis la kapon por montri unu viron proksiman de mi apenaŭ dek futojn. Tiu estis Majat, la heroo de la homamaso kaj la karulo de komunumoj. Mi levis al li mian rigardon. Lia buŝo kaj lia maldekstra genuo estis ruĝaj per sango, kaj li estis pige-makulita per dikaj flikaĵoj el koto, de sia vila kapo ĝis la grandegaj botoj. Liaj bluaj okuloj portis rigardon pezan, senprudentan, sed honestan; kaj el la tri ecoj la senprudento estis la plej akcentita. Ŝajnis, ke li tute konsistas el piedoj, genuoj, manoj, kaj kubutoj. Lia kapo estis tre malgranda—la sola pupa trajto, kiu al li restis.

Malgranda viro aliris lin, konscia—eĉ tro evidente konscia—pri sia rajto aliri. Majat balancis la kapon.

“Ŝajnas, Jos, ke vi lin definitive ordigis!” diris la vireto.

“Nu,” diris Majat, kun nerapida maldolĉeco. “Ĉu li ne efektive elpetadis kaj petegis ĝin en la tuta daŭro de la posttagmezo? Ĉu ne vere?”

La vireto balancis jese. Tiam li pli mallaŭte diris: “Kiel statas la edzino, por tiel paroli?”

“Ankoraŭ ŝi bone fartas,” diris Majat. “Aŭ mi neniel estus ludanta!”

“Mi vetis duondolaron kun Valĉjo, ke ĝi ne estos knabeto,” diris la vireto.

Majat ŝajnis indigni.

“Ĉu vi volas veti kun mi duonfunton, ke ĝi ne estos knabeto?” li demandis, kliniĝante kun kolera grimaco kaj elstarigante la kotan mentonon.

“Jes!” diris la vireto, sen elturniĝo.

“Ĉu egale?”

“Egale.”

“Mi sigelas kun vi, Karlo,” diris Majat, retransviliĝante.

Eksonis la fajfilo. Kaj kelkajn fojojn oni ordonis forlasi la kampon. Estis perditaj ok minutoj pro rompita kruro; sed Stirlingo diris, ke la juĝanto certe dekalkulos ĝin de la oficiala tempo, tial efektive la ludotempo ne malpliigos.

“Mi tie alestos morgaŭ matene,” diris la vireto.

Majat balancis la kapon kaj foriris. Karlo, la vireto, sin turnis sur la kalkano kaj fiere reiris al la homamaso. Li ja estis rigardita de ĉiuj, parolante kun moŝta eminenteco.

Stirlingo kaj mi ankaŭ nin fortiris; kaj kvankam Jos Majat ne honoris sian kuraciston eĉ per unu rigardo, neniu el ni ambaŭ estis tute sen ia sento de gloro: kial, mi ne povas imagi. La cetera ludo estis sen intereso kaj spirito. Nenio okazis. La provoludo finiĝis per egalpoenteco.

IV

Ni estis forviŝataj el la futbalejo en furioza superakvego da homoj—forportataj kaj ŝutataj malsupren sur deklivo en vastan neokupitan terpecon, kiu apartigis la kampon de la proksimaj stratoj el ruĝetaj dometoj. Ĉe la malsupro de la deklivo, laŭ mia propono, ni flanke haltis kelkajn momentojn, dum la homfluo kuregis antaŭen kaj, disetendiĝante, diluvis la tutan lokon en unu mirinda minuto. La efekto de la homaro flueganta el tiu breĉo de la ligna muro, nenion pli similis ol la efekton de krevinta akvotubego, kiun povas kvietigi nur la malplenigo de la baseno. Homo, kiu dezirus atenci sian vivon, povus sin meti antaŭ tiu breĉo kaj atingi sian deziron. Oni lin eĉ ne rimarkus. La senfina senkompata infanteria atako senatente pasus super li. Silenta, absorbita amaso, nun okupata pri io alia, kaj eble turmentata de la malagrabla penso, ke efektive egalludo ne estas tiel bona, kiel gajno! Ĝi rapidis blindule, instinkte ambaŭflanken, genuoj kaj mentonoj en reliefo, manoj profunde en la poŝoj, batante la teron per la malvarmigitaĵoj piedoj. Se okaze iu haltis aŭ malakceliĝis por ekbruligi pipon, ricevante en la dorso senceremonian antaŭenpuŝon, li akceptis la instigon, kiel atomo akceptas la leĝon de gravitado. Jam forpasis la febro kaj raviĝo. Tio, kio sorĉis min, kiel sudlandanon, estis la severa silentemo, la fiksita rigardo (ĉu malvigla aŭ revema) kaj la peza, obtuza, multpieda paŝado, ŝancelanta la cindrokovritan teron. Ankoraŭ ĉiam la superfluo furiozis tra la breĉo.

Nia aŭtomobilo estis lasita en la Haycock Hotelo; ni iris por preni ĝin, kontraŭante la homfluegon. Preskaŭ

rekte kontraŭ la ĉevalkorto estis la ekirejo de la elektraĵ tramoj por Hanbridge, por Bursley kaj Turnhill kaj por Longshaw. Tie la homamaso estis malpli danĝera, tamen ankoraŭ tre timinda—laŭ mia vidpunkto. Ĉiu tramveturilo ĉe sia alveno estis furioze atakita, trapakita kaj elposedita kun mirinda rapideco. Ĝiaj ŝtupoj estis la okcidenta bordo de vera Beresina. En difinita momento la hardita konduktoro, svingante sian lede kovritan brakon kun gesto senkompata, depuŝis la alirantojn sur la koton, kaj la tramveturilo potence ruliĝis for. Ĉio tio en silento.

Post kelkaj minutoj biciklanto plaŭdiris tra la koto, tenante la malapudan flankon de la vojo, kiu estis kompare libera. Li portis grizan pantalonon, solidajn botojn kaj malhelan jakon, sur kiu, meze de la dorso, stria tavolo de koto estis lokiginta sin. Sur lia kapo sidis kloŝoforma felta ĉapelo.

“Fartas, Jos?” kriis petole du buboj. Tiam sekvis kelke da respektaj salutoj de plenaĝuloj.

Ĝi estis la heroo, rapidanta.

“Flanken, tie, flanken!” li admonis barantojn tra siaj dentoj, kaj kun kapo malalte klinita li persistis antaŭen.

“Li estas mastro de la *Ŝaŭmanta Pokalo* tie supre en Toft End,” diris la doktoro. “Ĝi estas la plej altnivela drinkejo en la Kvin Urboj. Antaŭtempe li estis, kion oni nomas pokalĉasisto—konkursa biciklisto, vi komprenas. Sed li jam ne taŭgas por tio, kaj li baldaŭ ne taŭgos plu por futbalo. Li havas tridek kvar jarojn, se eĉ tagon li havas. Jen unu kaŭzo, kial li estas tiel sendependa—tial, kaj ĉar li estas la sola vera regionano en la trupo.”

“Kiel, do?” mi demandis. “De kie ili nur venas?”

“Ho!” diris Stirlingo, kviete ekirigante la aŭtomobilon.

“La klubo aĉetas ilin diversloke tra la lando. Kvar el ili estas skotoj. Antaŭ kelkaj jaroj unu klubo en Oldham proponis kvincent funtojn por Majat; jen granda prezo—plimulte ol li nun valoras! Sed li ne volis iri, kvankam ili garantiis fari lin mastro de unuaklasa drinkejo—domo sendependa. Nenion li iam kostis al Knype, krom sia salajro kaj la klienteca garantio por la *Ŝaŭmanta Pokalo*.”

“Kiom estas lia salajro?”

“Ne scias precize. Ne multe. La Futbala Asocio difinas maksimumon. Eble kvar funtoj por semajno, aŭ ĉirkaŭe. *Haj! vi, haj! Ĉu vi estas surda?*”

“Ci gardu, kion ci faras!” respondis fortikulo, baranto de nia vojo. “Aŭ mi portos hejmen ciajn orelojn por mia temanĝo, moŝteto.”

Stirlingo ekridis.

Jam post kelkaj minutoj ni alvenis Hanbridge, kot-plaŭdinte la tutan vojon inter du procesioj, plenigantaj ambaŭ trotuarojn. Kaj meze de la vojo estis tria procesio el tramveturiloj—tramo post tramo, ĉiu plensata je pasaĝeroj, ŝaumanta ĉe la ŝtupo per pasaĝeroj; ne la nerve malfortaj tramoj, kiujn mi vidis plifruue en la post tagmezo sur la placo Crown Square; sed alispeca raso de tramoj, viglaj kaj urĝaj rapidaĵoj. Ni venis al la oficejo de la *Signal*. Jam nenia amaso da bubetoj por salutaĉi nin ĉi tiun fojon!

Subtere troviĝis la maŝinĉambro de la *Signal*. Ĝi rememorigis al mi la internajon de ŝipego, tiel plena ĝi estis de maŝinoj. Unu grandega maŝino faris malrapidan klak-klakon, kaj faldita verda objekto strange ekfalis antaŭ ni sur malgrandan feran tablon. Buchanan malfaldis ĝin, kaj mi vidis, ke ĝi enhavas ĉion pri la rompita kruro kun la eldiro, ke laŭ la opinio de la *Signal* la simpatio de ĉiu vera sportulo estos kun la vundita ludisto. Mi komencis paroli ion al Buchanan, kiam subite mi ne povis jam aŭdi mian voĉon. La granda maŝino, kaj alia post ni, estis jam funkciantaj je fabla rapido kaj kun fabla klakado. Nur tion miaj ekkonsternitaj sentoj povis malimpliki, ke la bluetaj arklampoj iam kaj iam palpebrumas, kaj ke falditaj verdaj paperoj neĝe falas sur la feran tablon multe pli rapide ol la okulo povas ilin sekvi. Altkreskaj junuloj kun antaŭtukoj flanken kubutis min kaj forportis la verdajn gazetojn per faskoj, sed ne pli rapide ol la maŝino delasis ilin. Buchanan metis siajn lipojn apud mian oreleon. Sed nenion mi povis aŭdi. Mi skuis la kapon. Li ridetis kaj kondukis min eksteren el la tumulto.

“Venu kaj rigardu la knabojn preni ilin,” li diris ĉe la malsupro de la ŝtuparo.

En iaspeca halo sur la teretaĝo estis longa bartablo, kaj trans la bartablo serio de ŝtalaj palisoj laŭ paralelaj

aleoj, tiel aranĝitaj, ke enirinto tra la publika pordo povis atingi la bartablon nur trapasinte ĉiujn aleojn sinsekve. Tiuj ŝtalaj stratetoj, kiuj absolute certigis la triumfon de rajto super la forto, estis pakplenaj de knaboj—la ĉifonitaj buboj, kiujn ni antaŭe vidis ludantaj sur la strato. Sed jam ne buboj: pli vere tigridoj! Eble duono de dekduo jam atingis la bartablon; la ceteraj estis amasiĝintaj malantaŭe, kriegante kaj baraktante. Tra truo en la muro, samalta je la bartablo, faskoj de gazetoj senintermite ŝoviĝis, kaj estis kaptataj de servuloj, kiuj disdonis ilin per plimalgrandaj faskoj al la avidaj knaboj; tiuj ĉi, ĵete paginte per metalaj disketoj, forkuris, kuregis freneze, kvazaŭ demonoj ilin persekutas, tra tria pordo, el la infera bruego en la krepuskiĝantan straton. Kaj senĉese aperis ĉe la truo de la muro tiuj verdaj gazetoj, kaj senĉese ili estis kaptataj kaj forportataj de tiuj frenezigitaj infanoj, kies vojaĝodestino ŝajne povis esti. Gando aŭ Aix, kaj kies flugiloj estis iliaj ĉifonaĵoj.

“Kio estas tiuj disketoj?” mi demandis.

“La knaboj devas veni plifruue en la tago kaj aĉeti ilin,” diris Buchanan. “Kompreneble, ni ne havas tempon por vendi ĉi tiun eldonon kontraŭ kontanta mono.”

“Nu,” mi diris, adiaŭante, “mi tre dankas.”

“Pro kio sur la tero?” demandis Buchanan.

“Pro ĉio,” mi diris.

Ni revenis tra la placoj de Hanbridge kaj tra la Trafalgar Vojo, al la domo de Stirlingo en Bleakridge. Kaj ĉie en la kreskanta krepusko mi povis vidi la bubojn, ofte sen ĉapeloj, kaj foje preskaŭ sen botoj, diskurantajn sur la lampspegulanta koto, kun paperoj onde-verdaj; kaj super ĉiuj bruoj de veturiloj mi povis aŭdi la helan kriadon: “*Signalo. Futbala eldono. Futbala eldono. Signalo.*” La mondo estis sciigata pri la potenco de Jos Majat, kaj pri la deflankigo de malfeliĉo por Knype, kaj pri la rezultatoj de cent aliaj provludoj—ne enkalkulante rugbiludojn.

V

En la daŭro de la vespero, kiam Stirlingo estis bone kutimiginta sin je la stato, havi solan respondecon pri spertulo el la Brita Muzeo, Londono, kaj la altaj muroj

ĉirkaŭ lia pli privata spirito estis cedintaj al miaj timemaj sed konstantaj atakoj, ni fariĝis iagrade intimaj. Kaj nome la kuracisto min igis konstati, ke lia reputacio por inkliniga spriteco ĉe siaj pacientoj estas bone fondita. Tamen ĝis la tempo de deserto mi povus praviĝi en la supozo, ke tiu multe laŭdata "maniero" en malsanula ĉambro estas nenio krom provinca legendo. Tiel povas influi en la provinco unu tute neofenda kaj neaplomba londonano. Je la deka kaj duono, kiam Titus jam ekdormis por la nokto en brakseĝo, ni sidis senĝene apud la fajro en la studejo, rakontante reciproke historiojn. Ni estis traktintaj la artojn, kaj la medicinon, kaj traktis nun la vivon laŭ tiuj aspektoj, kiuj elvokas ĉe la viroj ridadon, kaj ĉe la virinoj maltrankvilan miron. Foje kaj ree ni aludis pri la gesinjoroj Brindley. Jam venis la horo por ilia alveno. Sed ĉar mi estis profunde komforta kaj kontenta, kie mi estis, mi tute ne sentis senpaciencon. Tiam sonis frapeto sur la fenestro.

"Tio estas Roĉjo!" diris Stirlingo, malrapide levante sin de sia seĝo. "Li almenaŭ ne rifuzos viskion, eĉ se vi tion faras. Decas, ke mi havigu pluan botelon."

Tamburado ripetiĝis kolerete.

"Mi ja venas, mia knabo!" murmuris Stirlingo.

Li pantoflis for, tra la vestiblo kaj tra la konsultejo, al la flanka pordo, dum mi sekvis kaj Titus venis ternante kaj flaraĉante malantaŭe.

"Aŭdu, mastro," diris obtuza voĉo, kiam la kuracisto malfermis la pordon. Ĝi estis ne Brindley, sed Jos Majat. Ne povante trovi la sonorilan butonon pro la mallumo, li, konforme al sia karaktero, estis provinta la solan lumigatan fenestron. Li postulis, aŭ ordonis, tre lakone, ke la kuracisto iru senprokraste al la *Saŭmanta Pokalo* en Toft End. Stirlingo hezitis momenton.

"Konsentite, mia bona," li diris trankvile.

"Tuj nun?" ĵusistis la obtuza, suspektama voĉo sur la sojlo.

"Mi alvenos antaŭ ol vi, mia bona, se vi ne kuregos. Mi veturos aŭtomobile." Stirlingo fermis la pordon. Mi aŭdis paŝojn sur la ŝtoneta vojeto ekstere.

"Vi aŭdis?" li diris al mi. "Kaj kion mi devas fari kun vi?"

“Kompreneble, mi akompanos vin,” mi respondis.

“Povas esti, ke mi tie estos sufiĉe longe tenata.”

“Mi ne zorgas,” mi diris kun diboĉa gajeco. “Ĝi estas drinkejo, kaj mi estas vojaĝanto.”

La domanaro de Stirlingo estis enlitiginta, kaj lia helpanto foririnta hejmen. Dum li kaj Titus pretigis la aŭtomobilon, mi skribis linion por gesinjoroj Brindley: “Mi iris kun la kuracisto vizite al paciento en Toft End. Ne atendu min—A.L.” Tion ni ŝovis sub la strata pordo de Brindley ĉe nia foriro. Baldaŭ ni estis vibrantaj supren sur kruta strato kun la plej malalta rapidilo de l' aŭtomobilo, kaj la flavaj rebriloj de malproksimaj fornegoj komencis lumi super la malaltiĝintaj tegmentoj. Estis refreŝige malvarme, nokto hela, frosta, tondona, harda post la enfermita varmo de la studejo. Mi estis ĝoja, tamen en silento. Ni estis lasintaj la regnon de la dio Pan; ni estis sub la reĝeco de Lucina, konsekvenco de tiu, kie ne estas ridado. Ni estis misie okupataj.

“Mi ne atendis tion ĉi,” diris Stirlingo.

“Ĉu ne?” mi diris. “Tamen, ĉar li venigis vin hodiaŭ matene—”

“Ho! Tio estis nur por certigi, por si mem. Lia fratino estis tie, mastrumanta. Ŝajnis tre kompetenta. Sciis ĉion funde. Ĝis vi venas al la alta socia stato de komizo aŭ drapista helpanto, ŝajnas, ke oni aranĝas ricevi siajn infanojn sen profesia helpo.”

“Ĉu vi do opinias, ke estas io neorda?” mi demandis.

“Mi ne mirus.”

Li ŝanĝis la irilon al la dua rapido ĉe tio, ke la aŭtomobilo atingis la nivelon de la unua deklivo. Ni nenion diris plu. La nokto kaj la celo seriozigis nin. Kaj grade, dum ni plialtiĝis al la purpura ĉielo, la Kvin Urboj elskribis sin en fajro sur la neregula ebenaĵo malsupre.

“Tio estas la Hanbridge urbodomo,” diris Stirlingo, montrante dekstren. “Kaj tio, la Bursley urbodomo,” li diris, montrante maldekstren. Kaj estis ankoraŭ multaj gvidlumoj, superrigardantaj la juvelitajn stratliniojn, kiuj malheliĝis ĉe la horizonto en orkoloran fumon.

La vojo nenie estis tute sen domoj. Troviĝinte nur kelkope en la spaco de duonmejlo, ili plidensiĝis en vilaĝon—la antaŭurbo de Bursley nomata Toft End. Mi vidis antaŭ

ni moviĝantan ruĝan lumon. Ĝi estis la postaĵo de la bicikla lanterno de Majat. La aŭtomobilo haltis apud la fasado de la hoteleto, en kiu du fenestroj flave brilis. Stirlingo, gvidate de krioj de Majat, veturigis returnen en malluman korton sub ŝirmon. La maŝino ĉesis pulsati.

“Unu mia amiko.” Tiel li konatigis min kun Majat. “Kromdire, Loringo, volu pasigi al mi mian valizeton. Nepre ne forgesi tion!” Tiam li estingis la acetilenajn lanternojn, kaj en la korto estis nenia lumo krom la radio de la bicikla lanterno, kiun Majat tenis en sia mano. Ni palpe iris al la domo. Strange, ke ĉiu paŝo, kiun mi faras en la Kvin Urboj, ŝajnas havi la veran karakteron de aventuro!

VI

Post kvin minutoj, mi estis tute sensignifa en la situacio ĉe Toft End, kaj mi komencis demandi al mi, kial mi estis veninta. Stirlingo, mia sola protektanto, estis malaperinta supren de la malluma doma ŝtuparo, sekvanta dikan junetan virinon kun blanka antaŭtuko, kiu portis kandelon. Jos Majat, sekvante ilin, diris al mi: “Eble konvenos, ke vi eniru tien, s'joro,” montrante duon-fermitan pordon ĉe la malsupro de la ŝtuparo. Mi eniris ĉambreton malantaŭ la drinkvendeja saloneto. Bona fajro brulis en malgranda eksmoda kameno, sed krom tio estis nenia lumo. La drinkejo estis fermita por klientoj, ĉar jam pasis la dek-unua horo. Sur nuda tablo mi vidis kandelon, kaj permesis al mi meti al ĝi alumeton. Tiam mi vidis ĉambron preskaŭ precize tian, kian oni atendus trovi en la malantaŭo de drinkvendeja saloneto de hoteleto en la ĉirkaŭaĵo de industria urbo. Ĝi ŝajnis ludi la duopan rolon de hejma ĉambro kaj rifuĝejo por ŝatataj klientoj. La tablo estis evidente tablo, ĉe kiu viroj drinkis. Sur breto staris serio da boteloj pli malpli ĉerpitaj, portantaj nomojn famajn en gazetaj anoncoj kaj en la Lorda Ĉambro. La dekduo da seĝoj pensigis pri akra korpa malkomforto, kian tolerus nur tia sidanto, kies tuta senta kapablo koncentriĝis en lia palato. Sur rompita seĝo en angulo staris kaduka amaso de libroj. Unu pli malgranda tablo estis kovrita per tuko kruce stria, sur kiu kuŝis kelkaj teleroj. Laŭ unu muro, sub la fenestro, troviĝis

piceligna kanapo remburita per ŝtofo iomete diferenca de tiu sur la tablo. La matraco de la kanapo estis malebena, kaj ĝia supraĵo sulkita, kaj malnovaj gazetoj kaj pecoj de bruna papero estis formetitaj inter ĝi kaj la kadraĵo. La ĉefa meblo estis bonefakta libroŝranko el juglanda ligno, kies vitritaj pordetoj estis kurtenitaj per ruĝa drapo. La fenestro, pli larĝa ol alta, ankaŭ estis ruĝe kurtenita. La muroj, safrane tapetitaj, portis enkadrigitajn reklamanoncojn kaj kelkajn fotografaĵojn de sinkonsciaj homoj. La plafono estis tiel malluma, kiel la ĉielo; la planko kahelita, kun lana tapiŝeto antaŭ la ŝtala cindrogardilo.

Mi metis mian superveston sur la kanapon, prenis la kandelon kaj ekrigardis la librojn en la angulo: la nepereeman verkon de Lavater; papere-binditan *Whitaker*; la *Almanakon de la Permeshavaĵ Nutraĵistoj*; la romanon *Johnny Ludlow*; la ilustritan katalogon de la Ekspozicio de 1856; la *Biblian Konkordancon de Cruden*, kaj sep aŭ ok volumojn de la *Unupenca Enciklopedio de Knight*. Dum mi revis super tiuj ĉi titoloj, mi aŭdis movadon sur la plafona etaĝo—ĝis tiam estis tute nenia sono—kaj kun pekosenta rapido mi remetis la kandelon sur la tablon kaj lokis min senzorge antaŭ la fajro.

“Nu, ne lasu min revidi vin tie ĉi supre, ĝis mi vin venigos!” diris virina voĉo—ne kolerete, sed decide. Kaj tiam, kolerete: “Nun, forigu vin!”

Nevolontaj botoj ŝur la ŝtuparo! Al mi eniris Jos Majat. Unuamomente li ne parolis; mi ankaŭ ne. Li evitis mian rigardon. Li portis ankoraŭ la jakon kun la kota strio meze de la dorso. Mi eltiris mian poŝhorloĝon, ne por informiĝo, sed nur pro nerveco, kaj la rigardo al la poŝhorloĝo pensigis min, ke estos prudente restre ĉi ĝin.

Plej bone ne forgesi tion,” mi diris, streĉante ĝin.

“Jes!” li diris malgaje. “Bona ideo.” Kaj li streĉis sian poŝhorloĝon; grandan, dikan, oran objekton.

Tiu restreĉado starigis inter ni bazon de rilatiĝo.

“Mi esperas, ke ĉio iras orde,” mi murmuris.

“Kion vi diras?” li demandis.

“Mi diras, ke mi esperas, ke ĉio iras bonorde,” mi ripetis pli laŭte, ĵetmovante la kapon direkte al la ŝtuparo, por montri la lokon, de kiu li estis veninta.

“Ho !” li kriis, kvazaŭ mirigite. “Nu, kion vi trinkos, s’joro ? Estas mia regalo, tiun ĉi nokton.”

Mi klarigis al li, ke mi neniam prenas alkoholaĵon. Tio ne estis tute vera, sed ĝi estis tiel vera, kiel la plejmulto de ĝeneralaj paroloj.

“Nek mi !” li diris lakone, post paŭzo.

“Ĉu vi ankaŭ estas abstinenculo ?” Mi montris iom da nevola miro.

“Kion *vi* opinias ?” li diris konfidencie kaj spite. Estis tute kvazaŭ li dirus : “Ĉu vi opinias, ke iu krom azeno laŭ naskiĝo estus *ne*-abstinenculo, en mia situacio ?”

Mi sidiĝis sur seĝon.

“Okupu la pufaĵon, s’joro,” li diris, montrante la kanapon. Mi ekokupis ĝin.

Li levis la kandelon ; tiam demetis ĝin kaj ekbruligis lampon, kiu staris sur la kamenbreto inter liaj vazoj el blua vitro. Liaj movoj estis tre malrapidaj, hezitantaj kaj mallertaj. Blovestinginte la kandelon, kiu longan tempon fumis, li iris kun la lampo al la libroŝranko. Ĉar la ŝlosilo de la libroŝranko estis en lia dekstra poŝo, kaj la lampo en lia dekstra mano, li devis gardeme pasigi la lampon de mano al mano. Kiam li malfermis la ŝrankon, mi vidis riĉan briladon de arĝento el ĉiu ĝia breto krom la plej malalta, kaj mi povis distingi la formojn de ceremoniaj pokaloj kun piedestaloj kaj grandegaj teniloj.

“Konjekteble viaj potoj ?” mi diris.

“Certe !”

Li malkovris al mi la fruktojn de siaj oftaj venkoj. Mi povis lin vidi streĉanta sin laŭ senfinaj cindrovoĵetoj kaj ĉefvoĵoj sub brulantaj sunoj, la dikaj genuoj pumpantaj kiel pedaloj sub la aplaŭdoj kaj blekegoj de grandegaj homaroj. Kaj ĉio, kio ankoraŭ restis el tiu gloro estis tiuj degraditaj kaj malindaj formoj, impone senutilaj, abomene malbelaj, kun la surskriboj kaŝitaj en miksamaso de kurba ornamaĵo.

“Certe !” li diris denove, kiam mi estis palpinta la lastan el ili.

“Grandioza ekspozicieto !” mi diris, kaj reokupis la kanapon.

Li prenis el la ŝranko unupencan inkoboteleton, ankaŭ de la plej malalta breto saketon kun mono kaj altformatan

mallarĝan kontolibron. Tiam li eksidis ĉe la tablo kaj komencis kontofaron. Estis evidente, ke li opinias sian taskon terura kaj komplikita. Rigardi lin kalkulanta la monerojn, manovranta la plumon, disgutiganta la inkon, knaranta sur la paĝo; aŭdi lin voĉe flustranta sinsekvajn nombrojn kaj murmuranta misterajn malbenojn sur la nedreseblan malindecon de ciferoj—ĉio tio estis teda, montrante la ĝenon de simpla ekzercio malfaciligita de malkapablo kaj nekompetentō. Mi volis ekstari kaj diri al li: "Flanken, homo, kaj lasu min fari ĝin por vi! Mi ĝin povas elfari, dum vi forviŝas de via plumo haretojn sur via maniko." Mi bedaŭris lin ĉar li estis ridinda—kaj eĉ pli groteska ol ridinda. Mi sentis, plej akre, ke estas domaĝe, ke li ne povas esti por ĉiam la centra figuro de kota kampo, piede pelante futbalon en longajn kaj grandiozajn parabolajn pli altajn ol gasujegoj, aŭ laŭ okazo rompante kruron, ĉirkaŭite de la forta amo de koroj atingantaj sian fandan punkton en la krio: "Bona maturulo, Jos!" Mi sentis, ke se li devas ripozi, lia ekzisto devus esti tiel aranĝita, ke li povus ripozi en solida kaj sensenca digneco, kvazaŭ monto rigardanta la flugon de tempo. Pripensi lin desegnanta simbolojn en kontolibrego, kalkulanta ŝilingojn kaj sespencojn, malaltiganta sin ĝis aritmetiko, kaj suferanta tiujn humiligojn, kiuj estas la senesceptaj preparoj al laŭmora patreco: ĉio tio estis aflikta por la delikata sentemo pri harmonia konformeco. . . . Kiel? tiu ĉi altvalora kaj terura organismo, tiu ĉi sklavo kun specialeco—kiun malproksimaj urboj iam deziregis aĉeti je la monstra prezo: kvincent funtoj—jen devigata sidi en malluksa ĉambro kaj atendi silente dum la virino de lia korelekto renkontas la krizan danĝeron! Kaj li "baldaŭ ne taŭgos plu por futbalo!" Li havis "tridek kvar jarojn, se eĉ tagon li havas!" Ĝi estis la rando de maljuneco! Li jam ne valoris kvincent funtojn. Eble jam nun tiu ĉi artikhava komercaĵo valoris nur ducent funtojn! Kaj "ili"—tiu ombra direktoraro, kiuj mem ne povis piedpeli futbalon kvindek futojn, kaj kredeble malsaniĝus, se rompiĝus al ili kruro—"ili" pagis al li semajne kvar funtojn por esti la heroo de kvaronmiliono de homoj! Li estis la ĉefa magneto por kunigi en la kason de ia kompanio en sabata posttagmezo dek kvin milojn da sespenmoneroj kaj ŝilingoj, kaj jen li

sidis rompante al si la kapon super malpli da sespencaĵoj kaj ŝilingoj ol plenigus trionlitran poton! Jos! vi devus pro justeco esti José, kun mallargâ ruĝa kravato pendanta sur via brusto (anstataŭ kota strio sur via dorso), kaj brodita pantalono sur tiuj miraklaj kruroj, kun rento el kvaronmiliono da *pesetoj*, kaj la sopiranta cedemo de sennombraj mantiloj. Ĉiumomente vi fariĝas pli aĝa, malpli fleksigema; ĉiu momento pliproksimigas la momenton, kiam junuloj respondos malkompleze al siaj enuigaj pliaĝuloj: “Jos Majat—kiu do li estis?”

La formetado de la kontolibro, la inko, la plumo, kaj la mono estis egale ĉagrena, kiel estis ilia elpreno. Tiam Jos, ĉiam tro granda por la ĉambro, paŝis trans la kahelita planko kaj plibonigis la fajron. Fajrinstigilo estis pli konforma al lia kapablo, ol plumo. Li ĉirkaŭe rigardis dubeme kaj zorge, kaj tiam paŝetis al la pordo apud la malsupro de la ŝtuparo kaj aŭskultis. Estis nenias sono; jen stranga afero. La virino, kiu estis veniganta en la mondon la infanon de la heroo, eligis nenian krion, kiu atingus nin tie malsupre. Eble dufoje mi estis aŭdinta surdajn movojn ne rekte supre—ie sur la plialta etaĝo—sed nenion pli. La kuracisto kaj la fratino de Jos ŝajnis esti retirigintaj en malfavoran kaj danĝeran misteron. Mi ne povis forpeli el mia cerbo bildojn de tio, kion ili observas, kaj kion ili faras. La vasta, kruela, fuŝa mallerteco de la Naturo, ŝia manko de majesteco en krizoj, kiuj devus esti majestaj, ŝia senrimeda manko de digneco, naŭzis min, vekis en mi malŝategon. Mi volis, kiel filozofo de ĉiuj kleraferoj, senti, ke la nuna krizo estas vere majesta, inda esti tiel rigardata de homo boneduka. Tion mi ne povis. Kvankam la krizo min iom eble timigis, tamen pro Jos Majat mi hontis pri ĝi. Tio eble estas mallaŭdinda, tamen ĝi estas la vero.

Li sidigis apud la fajro kaj rigardis la fajron. Provi interparolon kun li mi ne povis, kaj por eviti la neceson de kiu ajn parolado, mi etendis min sur la kanapo kaj deturnis mian vizaĝon, mire demandante min denove, kial mi estis akompaninta la kuraciston al Toft End. La kuracisto estis jam en alia, nealirebla, mondo. Mi ekdormis, kaj el mia dormo mi vekiĝis per la aliro de Jos Majat al la pordo apud la ŝtuparo.

“Jos,” diris ia voĉo. “Ĝi estas knabino.”

Tiam silento.

Mi konfesas, ke estis batado ĉe mia koro. Nova animo, nova formita kaj neŝanĝebla temperamento ŝutita en la mondon! De kie? Kien? Rilate la econ de majesto—jes, se arĝentaj trumpetoj jam anoncus la alvenon, anstataŭ dika virino kun antaŭtuko, la momento ne povus esti pli majesta pro sia malgajeco. Mi diras “malgajeco,” ĉar tio estas la neevitebla kaj sola efiko de tiuj ĉi eternaj kaj banalaj demandoj: “De kie? Kien?”

“Ĉu prosperas malbone al ŝi?” Jos flustris.

“Sufiĉe malbone,” diris la voĉo, sed ne malgaje. “Portu supren por mi pluan ujon da karbo.”

Kiam li revenis en la saloneton, post sia plua forsendo, mi diris al li:

“Nu, mi vin gratulas.”

“Mi dankas vin,” li diris, kaj sidiĝis. Baldaŭ poste mi povis aŭdi lin murmuri en si mem, milde: “Infero! Infero!”

Mi pensis: “Stirlingo nun ne prokrastos, kaj ni povos ekiri hejmen,” Mi ekrigardis mian poŝhorloĝon. Estis la unua kaj tri kvaronoj. Sed Stirlingo ne aperis, nek estis sendita de li parolo, nek signo. Mi devis subiĝi je la situacio. Ĉar neforta malvarmo tra la fenestro tuŝis mian dorson, mi tiris mian superveston sur la ŝultroj, kvazaŭ littegilon. Tra breĉo inter la ruĝaj kurtenoj de la fenestro mi povis vidi brilegi unu stelon. Ĝi pasis post la kurtenon kun maltrankviliga rapido. La universo ankoraŭ laŭ sia kutimo svingiĝadis kaj turniĝadis.

VII

Sonoj frapaj atentigis min. En la kelke da sekundoj, kiuj pasis antaŭ ol mi povis restarigi al mi, ĝuste kie mi estas, kaj kial mi estas tie, la vokaj frapoj ripetigis. La frumatena suno estis brilanta tra la ruĝa kurteno. Mi eksidis kaj ordigis miajn harojn, senvole aranĝante mian teniĝon tiel, ke neniu enironto supozu, ke mi ne estis pacience maldorminta tra la tuta nokto. La dua pordo de la saloneto—tiu, kiu kondukis al la drinkhalo de la *Ŝaŭmanta Pokalo*—staris malfermita, kaj mi povis vidi la bartablon mem

kun bretoj altiĝantaj malantaŭ ĝi kaj la starantajn tenilojn de bier-maŝino sur unu ĝia fino. Iu homo, kiun mi ne povis vidi, evidente malriglas kaj malŝlosas la ĉefan pordon de la hoteleto. Tiam mi aŭdis skrapon de knaranta pordo sur la planko.

“Nu, Jos, knabo!”

Ĝi estis la voĉo de la hometo, Karlo, kiu estis parolinta kun Majat sur la futbala kampo.

“Eniru rapide, Karlo. Estas malvarme,” diris malgaje la voĉo de Jos Majat.

“Jes, malvarme ja estas, knabo! Estas pli ol tri-mejla marŝo, kiun mi faris, kaj vi tion scias, Jos. Donu glaseton da ĝino.”

La pordo denove grincis, kaj riglilo estis metita.

La du viroj kune pasis malantaŭ la bartablon, do en mian videjon. Karlo havis grizan skarpon ĉirkaŭ la kolo; liaj manoj troviĝis profunde en liaj poŝoj kaj ŝajnis streĉe peni por malhelpi, ke la superaj kaj malsuperaj vestaĵoj disflugigu. Jos Majat havis aspekton tre ĉifitan. En la sintenado de la malgranda viro kontraŭ la granda jam restis nenio el la sinkonscia fiereco pro la nura fakto de konateco, kiun mi rimarkis sur la kampo. Evidente la du estis intimaj amikoj, eble parencoj. Dum Jos eldonis la ĝinon, Karlo diris subvoĉe:

“Nu, kian ŝancon, Jos?”

Tiu estis la unua aludo kiu-ajn-flanke pri la krizo.

Jos trankvile finis elverŝi la ĝinon. Tiam li diris:

“Estas du el ili, Karlo.”

“Du el ili? Kion vi diras, knabo?”

“Mi diras, ke estas ĝemeloj.”

Karlo kaj mi estis egale ekmirigitaj.

“Vi neniel diras!” li nekredeme murmuris.

“Jes, el ambaŭ specoj unu.”

“Vi neniel diras!” ripetis Karlo, firme tenante sian glaseton da ĝino en la mano.

“Unu venis je la unua kaj kelko, kaj la dua inter la kvina kaj la sesa. Mi devis venigi la maljunulinon Eardley por helpi. Ĝi estis pli ol manpleno por Suzana kaj la kuracisto.”

Mirige, ke mi estis dorminta tra tiaj okazintaĵoj!

“Kiel ŝi statas?” demandis Karlo trankvile, kvazaŭ malzorge. Mi opinias, ke tiu ŝajno de malzorgeco rezultis el la stoika subpremo de la simptomoj de zorgo.

“Malbone,” diris Jos, abrupte.

“Kaj mi ne miras,” diris Karlo. Li levis la glaseton. “Nu—al la bonŝanco.” Li suĉetis la ĝinon, gustumante ĝin sur la lango, kiel spertulo, kaj grade formante sian opinion pri ĝia kvalito. Tiam li prenis alian suĉon.

“Ĉu vi vidis ŝin?”

“Mi vidis ŝin por unu minuto, sed nia Suzana ne volis lasi min resti en la ĉambro. Ŝi iom deliris.”

“Ĉu la mastrino?”

“Jes.”

“Kaj la idetoj—ĉu ilin vidis?”

“Jes! Sed ne povis formi ideon pri ili. Sinjorino Eardley diras, ke neniam pli belajn ŝi neniam ne vidis.”

“Kuracisto foriris?”

“Tion li ne! Li restis tie la tutan benatan nokton sen surtuto. Mi donis al li fortan glaseton da viskio je la kvina horo, jen ĉio, kion li estas preninta.”

Karlo finis sian ĝinon. La du staris silente.

“Nu,” diris Karlo, frapante sur sia kruro. “Pro disavo mia! Ĝi tute renversas min! Ĝemeloj! Kiu ĝin divenus? Jos, knabo, vi devas esti danka, ke ĝi ne estas trinaskitoj. Neniel mi imagis, dum mi piedagis ĉi-supren hodiaŭ matene, ke estas ĝemeloj, kiujn mi vizitiras!”

“Ĉu vi havas tiun duonfunton en via poŝo?”

“Kian duonfunton?” diris Karlo sindefende.

“Nu, do. Ĝin tuj transdonu!” diris Jos, subite severa kaj mastrema.

“Mi vetis al vi duonfunton, ke ĝi estos knabino,” diris Karlo obstine.

“Vi estas mensogulo, Karlo!” diris Jos. “Vi vetis duonfunton, ke ĝi ne estos knabo.”

“Ne, ne!” Karlo skuis la kapon.

“Kaj knabo ĝi estas,” persistis Jos.

“Ĉar ĝi estas knabo *kaj* knabino,” diris Karlo, kun mieno de juĝanto, “kaj ĉar mi vetis, ke ĝi estos knabino, mi do gajnas.” En lia dirmaniero kaj en liaj gestoj mi povis distingi la avaran animon, kiu neniam pagas ĝis

ĝi nepre devas pagi. Mi povis vidi ankaŭ, ke Jos Majat elkonis sian subjekton.

“Vi vetis min, ke ĝi ne estos knabo,” Jos preskaŭ kriegis. “Kaj knabo ĝi estas, mi vin diras.”

“Kaj knabino!” diris Karlo; tiam li skuis la kapon.

La kverelo procedis senreliefe; ĉiu homo ripetadis ree kaj denove la frazojn de sia aparta argumento. Mi tre ĝojis, ke Jos ne sciis, ke mi alestis ĉe la vetmeto; aliokaze oni min nepre vokus por doni juĝon.

“Ni do nomu ĝin nuligita,” fine proponis Karlo. “Tio decidis la aferon. Kaj ĉar ĝi estas ĝemeloj”—

“Ne, vi maljuna satano, mi neniel ĝin nuligos. Vi ŝuldas al mi duonfunton, kaj mi ĝin eldevigos el vi.”

“Vi atentu min,” diris Karlo pli dolĉe. “Jen, kio ĝin decidis: kiu el ili venis la unua? ĉu la knabo aŭ la knabino?”

“La knabino venis la unua,” Jos Majat konfesis kun indigna nevolonteco, obtuze konscia, ke malvenko atendas lin.

“Nu, do, la knabino estas via plejaĝa infano. Jen, kio estas la leĝo. Kaj pri kio nome ni vetis, Jos, mia bona? Ni vetis pri via plejaĝa, kaj pri nenio alia. Mi konfesas, ke mi vetis, ke ĝi ne estos knabo, kiel vi diras. Kaj ĝi *ne estis* knabo. Unue veninta estas plej aĝa, kaj ni vetis pri plej aĝa.”

Jos Majat sin ŝovis malĝentile preter lin en la mallarĝa aleo post la bartablo, kaj venis en la saloneton. Kapsalutinte min senceremonie, li malŝlosis la libroŝrankon kaj prenis du kronmonerojn el leda monujo, kiu kuŝis apud la saketo. Tiam li reiris al la drinkhalo kaj furioze ĵetegis la monerojn sur la bartablon.

“Prenu vian monaĉon!” li kriegis kolere. “Prenu vian monaĉon! Sed vi estas malbenita ŝarko, Karlo, kaj se iu proponus al mi peceton da tabako por ĝin fari, mi enbatus al vi la vizaĝon.”

La alia kontente ridetaĉis, levante la monon.

“Veto estas veto” diris Karlo.

Evidente li estis kutiminta je laŭokaza malkvieta teniĝo flanke de Jos Majat, kaj sentis nenian timon. Sed li eraris, sentante nenian timon. Taksante la situacion,

li ne estis kalkulinta la agacitan staton de la nervoj de Jos Majat, post la unikaj spertoj de tiu nokto.

La vizaĝo de Jos tordiĝis en cent sulketojn kaj lia mano kaptis Karlon ĉe la brako, kiu mane tenis la monerojn.

“Delasu ilin!” li kriis plengorĝe, jam pentante pri sia naiva honesteco. “Delasu ilin, aŭ mi —”

La dika virino, kun sia antaŭtuko tute makulita, nun rapide kaj preskaŭ neaŭdite eniris la saloneton kaj staris ĉe la pordo kondukanta al la drinkhalo.

“Kio okazas, Suzana?” Jos demandis per ŝanĝita voĉo.

“Bele vi demandas, kio okazas!” diris la virino. “Tie kriegante kaj malpacante, vi ebruloj!”

“Kio do okazas?” Jos demandis denove, malkaptante la brakon de Karlo.

“Si forpasis!” malforte plormurmuris la virino. “Tiumaniere!” kun sendifina mangesto por montri subitecon. Tiam al ŝi eksplodis sovaĝaj plorĝemoj, kaj ŝi forkuris freneze tien, el kie ŝi venis, kaj la sono de ŝiaj plorĝemoj malkreskis dum ŝi sin levis sur la ŝtuparo kaj tute estingiĝis ĉe la fermo de malproksima pordo.

La viroj reciproke sin rigardis.

Karlo remetis la kronmonerojn sur la bartablon kaj ŝovis ilin al Jos.

“Jen!” li duonvoĉe murmuris.

Jos sovaĝe ĵetegis ilin sur la plankon. Sekvis alia paŭzo.

“Kiel Dio min rigardas,” li solene anoncis kun voĉo plensorbigita de emocio, “kiel Dio min rigardas,” li ripetis, “neniam plu mi tuŝos futbalan pilkon.”

Malgranda Karlo supren rigardas al li, malĝoje, plendete, en daŭro, kiu ŝajnis longa.

“Ĝi estas, do, por Knype, adiaŭ al la Dua Ligo!” li fine murmuris tragedie.

VIII

Doktoro Stirlingo veturigis la aŭtomobilon tre malrapide reire al Bursley. Ni kviete glitis malsupren en la homplenajn valojn. Ĉiuj arboj, kreske malhelpitaj, estis blanke tavolitaj per frostoj, kiu tre reliefe kontrastis kun iliaj nigraj branĉoj kaj kun la nigra koto de la vojo. La altaj fumturoj eligis sian nigran fumon kviete kaj senlace en la

freŝan bluan ĉielon. Dimanĉo estis malleviginta sur la vastan pejzaĝon kvazaŭ fizika influo. Ni vidis aron da infanoj serpente irantan el malhele bruna dimanĉa lernejo en malhele brunan sektan preĝejon. Kaj supren el ĉiuj valoj sonis ĉiuj sonoriloj de ĉiuj temploj de ĉiuj diversaj dioj de la Kvin Urboj : sonorante serie, aŭ aparte, aŭ are, ĉiu insiste pretendante, ke ĝi sola invitas al la altaro de la sola Dio. Kaj pastroj kaj akolitroj de la diversaj kultoj rapidis antaŭen unuope, kun silkaj ĉapeloj kaj gajkoloraj kravatoj kaj glataj surtutoj kun falditaj poŝtuketoj elstarantaj el la poŝtoj, homoj okupitaj, ĝojaj, sinŝatantaj, konvinkitaj heroldoj de eterna saviĝo : nenia dubo, nenia necerteco pri kiu ajn fundamenta veraĵo iam eniris en iliajn cerbojn. Ni trapasis longan rektan straton el novaj ruĝaj domoj kun bluj ardezaĵ tegmentoj, ĉiu kun barilpordo kaj ĝardeneto. Ie kaj tie, knabino kun haroj kunginglitaj kaj kruda bruna antaŭtuko teganta dandan robon, frotadis per kolorŝtono stratan sojlon. Kaj mezdistance de la strato, viro kun skarлата trikĉemizo, subtenate de du virinoj kun bluj kufoj, estis batanta tamburon kaj laŭte krianta : "Miaj amikoj, vi eble mortos hodiaŭ nokte. Kien, mi vin demandas, kien vi—?" Sed li havis nenian amikojn ; eĉ ne unu knabo lin atentis. La tamburo daŭrigis bategadi post niaj dorsoj.

Ĉion tion mi ĝuis. Ĉio tio ŝajnis al mi bela, ŝajnis eldoni la veran, belan, romanan aromon de la vivo. Mi nenion volus ŝanĝi en ĝi. Malnobla, maldelikata, malbela, malpura, kruda, barbara—jes, sed en ĝi kia ebriiga sento de la organizita vivemo de vasta komunumo nekonscianta pri si mem ! Mi nenion volis ŝanĝi eĉ en la okazintaĵoj de la nokto. Mi pensis pri la ĉambroj supre de la ŝtuparo de la *Saŭmanta Pokalo*—misteraj ĉambroj, kiujn mi nek vidis nek iam vidos, forkaŝitaj ĉambroj, je kiuj unu animo estis forglitinta kaj du estis aperintaj, scenejoj de angoro kaj de vanigita penado ! Historiaj ĉambroj, efektive ! Kaj tamen nenia domo el la centoj da domoj, kiujn ni preterglitis, kiu ne posedus ĉambrojn nobligitajn kaj majestigitajn per okazaĵoj ĝuste tiel imponantaj per sia grandioza neklarigeblo.

La natura homeco de Jos Majat kaj de Karlo, ilia sintenado en subita fortoprovo, plaĉis al mi. Kiel alimaniere

ili devis konduiti? Mi povis kompreni bone la profetan pereaverton de Karlo pri la ruinigo de la Knype'a Futbala Klubo. Tio ne rezultis el tio, ke li ne sentus la tragedion de la domo. Li ja ĝin estis sentinta, kaj ĉar li ĝin sentis, li parolis laŭ hazardo, malsaĝe, la unuan klaran penson, kiu al li fluis en la kapon.

Stirlingo estis muta. Li ŝajnis esti absorbita je la direktado kaj rigardis rekte antaŭen, oscedante de tempo al tempo. Li estis multe pli laca ol mi. Efektive mi estis iom bone dorminta. Kiam ni turniĝis en la Vojon Trafalgar kaj pasis de poste la aristokrataraĵo survoje al preĝejo ŝtata aŭ sekta, li diris:

"Nu, vi vin lasis impliki en veran noktaĵon, mia junulo! Nenia eraro!"

Li ridetis, kaj mi ridetis.

"Kio okazos tie supre?" mi demandis, montrante al Toft End.

"Pri kio vi aludas?"

"Viro tiaspeca—lasita kun du infanetoj!"

"Ho!" li diris. "Ili orde aranĝos tion. Lia fratino estas vidvino. Ŝi iros kaj vivos kun li. Jam ŝi tiel amas tiujn infanetojn, kvazaŭ ili estus ŝiaj propraj."

Ni haltis apud liaj duopaj pordoj.

"Atentu, ke vi klarigu al Brindley," li diris, kiam mi lasis lin, "ke ne estas mia kulpo, ke vi pasis nokton eksterlite. Ĝi estis via propra faro. Mi intencas nun kapti iomete da dormo. Ni renkontiĝos vespere, ĉar Bob invitis min al vespermanĝo."

Servantino estis balaanta la portikon de Bob Brindley, kaj la strata pordo staris malfermita. Mi eniris. La sono de la fortepiano gvidis min al la salono. Brindley, kun la matena cigaredo inter siaj lipoj, ludis numeron el "L'heure espagnole" de Maurice Ravel. Li tenis la kapon klinita iom malantaŭen por deteni de siaj okuloj la fumon. Liaj infanoj en siaj bluj triĉemizoj konstruis per briketoj sur la tapiŝo.

Ne paŭzante en sia ludado, li alparolis min kviete:

"Vi estas bela subjekto! Kien la diablo vi trafis?"

Kaj unu el la knabetoj, supren rigardante, diris, kun petola, imita naiveco, per sia alta hela voĉo:

"Kien adablo ŝi tuafis?"

MIMI

I

En unu sabata posttagmezo en malfrua Oktobro, Edüardo Coe (elp. Коў) kontentiga mezgrade-prospera viro tridek-kvin-jara, estis marŝanta malrapide laŭ la King's Road, en Brighton. Estante ano, laŭ nasko kaj laŭ loĝado, de la Kvin Urboj en la Mezlando, li havis la viglan kaj energian mienon de la Mezlando. Estis evidente, ke li estas fremdulo por la Sudlando; kaj fakte li nun por la unua fojo rigardis tiun vastan kaj briletantan spektaklon, la sudan plezururbon en la unika gloro de ĝia aŭtuna sezono. Spektaklo kapabla vivigi ĉiun homon per sia nura brilegeco! Kaj tamen, Edüardo Coe estis malgaja. Unu kaŭzo de lia malgajeco estis tio, ke li ĵus lasis biciklon, kun radotubo aeromanka, por riparo en butikoj en Preston Strato. Eble ne sufiĉa kaŭzo por malgajeco! . . . Nu, tio dependas. Li estis certigita de la blue vestita riparisto, post deca ekzameno, ke la malfeliĉo ne estas ordinara trapiko, sed estas malsano de tiu misteraĵo, la valvo.

Kaj tiu aeromanko ne estis la sola kaŭzo de lia malgajeco. Ekzistis alia. Li estis en sia miela-monato. Bone komprenu min—ne ia miela-monato romaneca, sed efektiva miela-monato. Kia homo, se ĝi iam travivis efektivan mielmonaton, povas memore rerigardi al tiu aventuro kaj fidele diri, ke ĝi estis senmiksa ekstazo de ĝojo? Mielmonato per sia esenco kaj per siaj rezultoj estas tiel solena, tiel riskoplena, tiel ĉirkaŭfosita per surprizaj neatenditaĵoj, ke fianĉo la plej malserioza, la plej gajema, la malplej enamiĝinta, nepre havus momentojn de grava antaŭzorgo. Kaj Edüardo Coe neniel estis malserioza—tute ne. Nek li estis nur iomete enamiĝinta. Cetere, la cirkonstancoj de lia edziĝo estis apartaj, kaj li estis edziĝinta kun bruneta, enpensigema, pasia knabino.

Sinjinoro Coe estis la malpliaga el du fratinoj nomataj Oliva Wardle, bone konataj en la plej ŝatataj rondoĵoj en

la Kvin Urboj. Mi aludas pri tiuj rondoj, kie gustoj intelektaj kaj artistaj kuniĝas kun solidaj enspezoj kaj bonegaj manĝaĵoj delikate surmetitaj. Nepre oni demandas, kial du fratinoj portus la nomon Oliva. La respondo estas, ke kvankam Oliva Unua kaj Oliva Dua estis rigardataj kiel fratinoj, kaj eĉ rigardis sin kiel fratinoj, ili ne estis fratinoj. Ili eĉ ne estis duonfratinoj. Ili unuafoje renkontiĝis en la aĝo de naŭ jaroj. La patro de Oliva Unua, vidvo, edziĝis kun la patrino de Oliva Dua, vidvino. Oliva Unua estis la pliaĝa per kelkaj monatoj. Oliva Dua grade lasis sin nomiĝi Wardle, por ŝpari ĝenon. Ili treege bone kunsentis, precipe post la morto de la gepatroj, kiam ili fariĝis kunaj mastrinoj, ĉiu kun aparta enspezo, de kontentiga domo en Sneyd, la laŭmoda loĝada vilaĝo sur la rando de la Kvin Urboj. Kiel ĉiuj homoj longatempe vivantaj kune, ili fariĝis similaj en multaj rilatoj. Ambaŭ estis brunetaj, enpensigemaj, kaj pasiaj, kaj al tiu profunda simileco estis aldonita ia supraĵa simileco de kutimoj kaj sintenado. Nur, dum Oliva Unua iom pli inklinita esti virino de la granda mondo, Oliva Dua iom pli inklinita al studado, kaj precipe interesiĝis en la teorio de la muziko.

Kompreneble, oni ilin multe serĉis. Kaj tamen ili jam atingis dudek kvin jarojn, antaŭ ol la mondo rimarkis, ke iu el ili ne estas vane serĉata. La fakto, sufiĉe evidenta, ke Pierre Emile Vaillac jam estas objekto de profunda homa intereso por Oliva Unua—jen kio ekscitis la mondon; kaj la mondo estus ankoraŭ pli mirigita, se ĝi sciis pri alia fakto, kiu neniel estis evidenta: nome, ke Pierre Emile Vaillac estis la kaŭzo de sekreta kaj terura malkonsento inter la du fratinoj. Vaillac, vidvo kun du infanoj, Mimi kaj Jean, estis franco, kaj granda aŭtoritatulo pri la ornamado de ovoŝela porcelano, kiu estis ekloĝadinta en la Kvin Urboj kiel spertulo-posedanto en unu el la fame-konataj porcelanaj firmoj en Longshaw. Sendube li estis tre alloga persono.

Oliva Unua, kiam la rilatoj inter ŝi kaj Vaillac estis malvolviĝantaj en ion definitivan, subite kaj sen averto kulpigis Olivan Duan pri nerajta ĉasado. Tio estis terura kulpigo, kaj ĝin sekvis terura sceno, unu el tiuj scenoj, kiuj estas malofte pardonitaj, neniam forgesitaj. Ĝi ŝanĝis iliajn vivojn; sed, ĉar ili estis virinoj kun bona

provizo da komuna saĝo kaj de bonedukaj moroj, ĉiu laŭ sia povo kondutis poste, kvazaŭ nenio estus okazinta.

Oliva Dua ne konvinkis Oliván Unuan pri sia senkulpeco, ĉar ŝi ne liveris ĝian plej solidan pruvon. Si estis tro fierá—en sia enpensigemo kaj misteramo—por tion fari. Tiu plej solida pruvo estis tio, ke en tiu tempo ŝi mem estis fianĉigita kun Edŭardo Coe, kiu estis venkinta ŝian koron kun neimagebla rapideco, kelkajn monatojn antaŭ ol ŝi devis provi muzikan ekzamenon en Manĉestro. “Ni elbabilu nenion ĝis post mia ekzameno,” ŝi instigis al sia fianĉo. “La klopodado estos tro ĝena, kaj ĝi konfuzos min, kaj mi malsukcesos, kaj mi ne volas malsukcesi, kaj vi ne volas, ke mi malsukcesu.” Li konsentis kun raviĝo. Tamen ŝi malsukcesis, kompreneble. Sed ĉar ŝi estis obstinema, ŝi diris, ke ŝi faros novan provon, kaj ili daŭrigis teni en sekreto sian fianĉecon. Ili trovis la sekreton tre bongusta. Tiam sekvis la detrua okazaĵo pri Vaillac. Baldaŭ poste Oliva Unua kaj Vaillac edziĝis, kaj tiam Oliva Dua estis sola en la kontentiga domo. La ekzamenon ŝi forgesis, kaj la domon ŝi malamamis. Ŝi deziris edziniĝi; tiel ankaŭ Coe. Sed nenion ili estis eldirintaj. Malfacile por ŝi ĝuste tiam anonci sian fianĉecon! La mondo dirus, ke ŝi edziniĝis pro imito, kaj ŝia fratino opinius, ke ŝi edziniĝis pro pikeco. Cetere, estus la klopodado, kiun Oliva Dua malamamis. Jam la klopodado ĉe la edziniĝo de ŝia fratino, kaj la penado dum la edziga festo, ŝajnigi kvazaŭ nenio estus okazinta inter ili, estis tedintaj la nervojn de Oliva Dua.

Tiam estis veninta al Edŭardo Coe la brilanta kaj alloga ideo, edziĝi sekrete. Forgliti, kaj tiam poste reveni kun la anonco: “Ni estas geedzoj. Jen la tuta afero! . . .” Kial ne? Nenia ĝeno! Nenia ceremoniaĵo! La efektiviĝinta fakto, kiu simpligas ĉion!

Estis do sekreta la mielmonato, kiun Edŭardo Coe faris; ĝuinda—sed subkaptita, ŝtelula! Lian spiritan staton oni povas plej bone prezenti dirante, ke, kvankam li estis konscia pri honesteco, li iel ne povis rigardi policanon rekte en la vizaĝon. Cetere, simplaj homoj ordinare ne forkuras por sekretaj mielmonatoj. Ĉu li estis konduktinta saĝe? Eble tiu ĉi demando, prezentante sin de tempo al tempo, estis la ĉefa kaŭzo de lia nedeca malĝajo.

II

Tamen, la spektaklo de Brighton en bela sabata posttagmezo en Oktobro havis efikon sur Edüardon Coe— tiel same, kiel sur homon kiun ajn. Iom post iom ĝi inspiris al li la ĝojon de la vivado, kaj rektigis al li la dorson, kaj briligis liajn okulojn. Kaj li estis plenigita de la konscio de la fakto, ke estas kontentige esti bone vestita kaj havi disponeblan oron en la poŝo, kaj bone manĝadi, trinkadi kaj fumadi, kaj scii, ke iu adorinda virino atendas vin en difinita loko, je difinita horo, kaj ke tuj kiam ŝi ekvidos vin, ŝiaj malhele brunaj okuloj alprenos ravegan esprimon rezervatan por vi sola, kaj ke ŝi estas absolute via. Per unu vorto, li denove rigardis aferojn je la luma flanko. En la sekvo, ne koncernis la valoron de unu mirtelo, ĉu lia edziĝo estas publika aŭ privata.

Li gaje ekbruligis cigaredon. Li ne povis diveni, ke malfavora sorto atendas lin tuj apud la gazetvenda kiosko.

Malgranda knabineto tie staris apogante sin al la palisaro, kaj ĉirkaŭrigardante iom maltrankvile. Tute malgranda knabineto, dekunujara eble, vestita per blua serĝo, kun mallonga jupeto kaj longaj kruroj, kaj marista pajlĉapelo (H.M.S. *Formidable*), kaj longaj haroj pendantaj sur la dorso, kaj milda, briletanta, konfida rigardo. Iom maldanda, sed tamen vera bildo de gracieco.

Ŝi ekvidis lin la unua. Alie, li eble evitus ŝin. Sed li estis tuj apud ŝi, antaŭ ol li ekvidis ŝin. Efektive li aŭdis, antaŭ ol li ekvidis ŝin.

“Bonan posttagmezon, Sinjoro Coe.”

“Mimi!”

La Vaillac’oj estas do en Brighton! Li estis elektinta por sia mielmonato kvazaŭ la plej malproksiman finon de la mondo, kaj jen! per ia terura fuŝado de la sorto, la Vaillac’oj troviĝas en tiu sama fino! La homoj, de kiuj li aparte volas forkaŝi sian mielmonaton ĝis ĝia finiĝo, tiuj samaj elscios ĝin tuj de la komenco! Interrilatoj de la du Olivaj estos ankoraŭ pli streĉitaj kaj malfacilaj! Mallonge, el optimismo li svingiĝis reen en la plej malluman pesimismen. Kio povus esti pli malagrabla, ol esti surprizita en la peko mem de sekreta mielmonato?

Ŝi ekrimarkis lian konfuziĝon, kaj li sciis, ke ŝi ĝin rimarkis. Ŝi estis malgranda knabineto. Sed ŝi estis ankaŭ virineto, franca virineto, kiu parolis la anglan lingvon perfekte—tamen kun diferenco! Ili estis amindumintaj sin, ŝi kaj sinjoro Coe. Nun ŝi havis novan patrinon, sed dum kelkaj jaroj ŝi estis sen patrino, kaj kutimadis akcepti vizitantojn en la domo de sia patro (se tiu ĉi okaze forestis) kun ĉarma ŝajnigo de sperta gastigantino.

Li levis la ĉapelon, kaj faris manpremon, kaj provis ludi la ludon.

“Kion vi faras ĉi tie, Mimi?” li demandis.

“Kion vi faras ĉi tie?” ŝi flankiĝante ekridis. Kaj tiam, ekvidinte lian pliigitan embarason, kaj ke ŝi ne estis sufiĉe takta, ŝi daŭrigis rapide, kun tordiĝo de la infanaj ŝultretoj kaj rigardo duone rida kaj duone grimaca: “Ĝi estas mia dorso. Ŝajnas, ke ĝi ne estas forta. Kaj tial ni estas luprenintaj tre agrablan dometon por la aŭtuno, pro la aero, vi komprenas. Ĉu vi ne sciis?”

Ne, li ne sciis. Jen, kio estas malbona en streĉitaj rilatiĝoj. Oni ne anoncas al vi okazontajn aferojn.

“Kie?” li demandis.

“Ho!” ŝi diris, montrante per la mano, “jendirekte. Apudvoje al Rottingdean. Proksime al la granda lernejo por knabinoj. Ni alveturis per tiu ĉarma elektra fervojo—laŭlonge de la marbordo. Ĉu vi veturis per ĝi, Sinjoro Coe?”

Terure! Rottingdean estis ĝuste la scenejo de lia mielmonato. La hazardo de la Sorto estis vere terurega. Li kaj lia edzino povus iatage ekpromeni rekte en la brakojn de ŝia fratino! Li fariĝis alterne varmega kaj malvarma.

“Kaj kie estas la ceteraj?” li demandis zorge.

“Panjo”—ŝi ruĝiĝis parolante tiun vorton, tiel strangan sur ŝiaj lipoj—panjo estas hejme. Patro povas alveni ĉi-nokte. Kaj Ada kondukis nin ĉi tien por tondigi al Jean la harojn. Li ne volis veni sen mi.

“Ĉu Ada?”

“Ada estas nova servantino. Ŝi ĵus eniris tien denove, por vidi, kiom longe la barbiro atendigos nin.” Mimi montris al barbira butiko kontraŭflanka. “Kaj mi atendas ĉi tie,” ŝi aldiris.

“Mimi,” li diris per konfidencia tono, “ĉu vi povas teni sekreton?”

Ŝi fariĝis solena. “Jes.” Ŝi ridetis serioze. “Kion, do?”

“Pri nia renkontiĝo. Diru al neniŭ, ke vi vidis min hodiaŭ. Komprenas?”

“Eĉ ne al Jean?”

“Ne al Jean. Sed pli poste vi povos diri, kiam mi donos al vi la vorton. Mi volas, ke neniŭ ĝin sciu, ĝuste nun.”

Ĝi estis honta procedo. Kaj li sciis, ke ĝi estas honta. Li intence flatis ŝin, parolante al ŝi, kiel al matura virino. Li intence metis karesan tonon en sian voĉon. Tion li ne farus, se Mimi ne estus Mimi—se ŝi estus ordinara speco de angla knabino. Sed ŝi ja estis Mimi. Kaj la tento estis tre forta. Ŝi promesis serioze. Li sciis, ke li povas fidi al ŝi.

Rapidante for, por ke Jean kaj la servantino ne aperu el la barbira domo, li rememoris kun bedaŭro, ke li preterlasis montri ian scivolon pri la dorso de Mimi.

III

La rava virino estis atendonta lin en la vestibla salono de la Royal York hotelo je tri kvaronoj de la kvara. Ŝi estis veturonta al Brighton per la Rottingdean'a omnibuso, kaj tiu veturo okazas unufoje en ĉiu duo aŭ trio da horoj, se la veturigisto ne ŝanĝas sian intencon. Edŭardo, ĉar li devis telefoni al Londono pri urĝa afero, estis lupreninta biciklon kaj alrajdinta. Spite la akcidento al la pratempa maŝino, li alvenis ĉe la Royal York duonminuton antaŭ ol la Rottingdean'a omnibuso, trapasinte la Old Steine, elveturigis tiun ravan virinon, lian edzinon. La ekvido, kiam ŝi depaŝis de la omnibuso, efektive vibrigis lin per plezuro. Kune ili eniris la hotelon, kaj kvankam en la Royal York la akcepto de ravaj virinoj neniel estas novaĵo, Oliva faris en ĝi sensation. Siaparte, li ne povis ne senti ĝuste kvazaŭ li estus farinta kun ŝi petoledziĝon. Li ne povis ne imagi, ke la tuta brilanta societo en la vestibla salono flustras sub la muzikado de l'orkestro: “Tiu

personaĉo, vi vidas, sendube faris petolan aferon kun tiu ravanta ĉarmulino!"

"Ed," ŝi demandis, fiksante sur lin siajn malhelajn okulojn, "ĉu io ĝenas?"

Ili estis ĉe temanĝo apud malgranda maŭra tableto en la vasta fenestrejo de la vestibla salono.

"Ne," li diris. Jen la unua mensogo de lia edzeca kariero. Sed vere li ne povis devigi sin doni al ŝi la teruran baton, sciigi ŝin, ke la gehomoj Vaillac estas tuj proksimaj, ke ilia sekreto estas malkovrita, kaj ke ilia paco kaj sendanĝereco dependas sole de la diskreteco de la malgranda Mimi kaj de la kondiĉo, ke ili ne renkontos la ceterajn Vaillac'ojn.

"Do vi maltrankvilas nur pro tiu radotuba trapiko," insistis lia edzino. Vi vidas, ke ŝiaj sentoj kontraŭ li estis tiel pasiaj, ke ŝi ne povis lasi lin trankvila. Si estis tute absorbita en li.

"Ĝuste," li diris pekosente.

"Mi timas, ke vi ne alte ŝatas tiun ĉi lokon," ŝi daŭrigis, ĉar nun ŝi sciis, ke li ne parolas al ŝi la veron, ke efektive io lin ĝenas.

"Kontraŭe," li respondis, "oni sciigis min, ke la plej bongusta teo kaj la plej perfekta panrostaĵo estas riceveblaj en tiu ĉi akceptejo, kaj pro mia animo mi sentas, ke mi povus ĉi tie senĉese temanĝadi por ĉiam kaj ĉiam amen!"

Li penis esti gaja, sed ĝi ne tre bone prosperis al li.

"Mi parolas ne pri ĝuste ĉi tie," ŝi diris, "sed pri la suda marbordo ĝenerale."

"Nu—" li komencis, juĝiste.

"Ho! Ed!" ŝi petegis lin. "*Volu* diri, ke vi ne ŝatas ĝin!"

"Kial?" li ekkriis. "Ĉu ankaŭ vi?"

Ŝi skuis la kapon. "Mi multe preferas la nordan," ŝi diris.

"Nu," li diris, "ni iru. Ekzemple al Skarbro."

"Vi nur ŝercas," ŝi murmuris. "Vi adoras tiun ĉi sudan marbordon."

"Neniel!" li forte asertis.

"Nu, karulo," ŝi diris, "se vi ne estus dirinta unua, ke vi ĝin ne ŝatas, kompreneble, mi eĉ ne vorton spirus—"

"Ni iru morgaŭ," li proponis.

“Jes.” Ŝiaj okuloj brilis.

“Unua vagonaro! Ni devus ekveturi el Rottingdean je la sesa matene.”

“Kiel ĉarme!” ŝi ekkriis. Sorĉis ŝin tiu ĉi ideo pri kaprica ekŝanĝo de programo. Ĝi liveris tian senton de libereco, de nerespondeco, de romaneco!

“Ankoraŭ de panrostaĵo, mi petas,” li diris al la kelnero, kun gaja mieno.

Kostis al li nun nenian penadon, gajadi. Li ne povus malgaji. La mondo jam transformiĝis subite en la plej bonan el ĉiuj eblaj mondoj. Li estis savita! Ili estis savitaj! Jes, li povis fidi al Mimi. Per nenia hazardo ili estos malkovritaj. Ili restos fikse en siaj ĉambroj la tutan vesperon, kaj morgaŭ ili estos for, jam longe antaŭ ol la Vaillac homoj ellitiĝos. Paĉjo kaj “panjo” Vaillac estas admonaj figuroj rilate al malfrua ellitiĝo. Kaj kiam li estos forsavinta sian ravan Oliven en la urbon Skarbro, aŭ kien ajn iliaj nazoj kondukos ilin, li rakontos al ŝi pri la risko, kiun ili hazardis.

Ambaŭ ridis pro simpla senracia gajeco, kaj Edŭardo Coe preskaŭ forgesis pagi la kalkulon. Tamen li pagis ĝin. Ili foriris de la Royal York. Li metis sian Oliven en la reveturantn Rottingdean omnibuson, kaj tiam rapidis por ricevi sian riparitan biciklon. Li momente ekstremis en la timo, ke Mimi kaj kompanio eble estos en la omnibuso. Sed ili ne tie estis. Konjekteble ili pli frue veturis, aŭ eble piediris.

IV

Kiam li estis ankoraŭ en la interspaco de unu mejlo de Rottingdean, en la krepuska horo, kaj estis marŝanta supren sur deklivo, li ekvidis knabinon apogantan sin sur barilpordo, kiu kondukis per longa vojeto al domo staranta apud la krutaĵoj. Ĝi estis Mimi, ŝi eligis rekonan ekkriion. Li jam ne zorgis—li estis nun trankvilanima—sed vere, kun tiu domo tiel proksima al la vojo kaj tiel proksima al Rottingdean, li kaj lia Oliva estis efektive komencintaj sian mielmonaton ĉe la supro de ia vulkano!

Mimi estis enpenŝiĝa. Li sentis bedaŭron, ke li estis liginta ŝin al sekreteco. Ŝi estis tiel enpenŝiĝa, kaj tiel

sopira, kaj ŝiaj okuloj estis tiel lojalaj, ke li sentis, ke li ŝuldas al ŝi ian pli plenan konfidon.

"Mi estas en mia miela monato, Mimi," li diris. Faris al li plezuron, ĝin diri al ŝi.

"Jes," ŝi diris simple. "Mi vidis onklinon Oliva preterveturi en la omnibuso."

Nur tion ŝi diris. Li sentis sin fulme frapita, tiom per ŝia trankvila simpleco, kiom per io alia. La infanoj estas, li pensis, miregindaj estaĵoj.

"Ĉu Jean vidis ŝin, aŭ iu alia?" li demandis.

Mimi skuis la kapon.

Tiam li sciigis ŝin, ke ili forveturos la sekvantan matenon je la sesa.

"Ĉu vi estos en veturilo?" ŝi demandis.

"Jes."

"Ho! Lasu min elveni por vidi vin preterpasi," ŝi petegis. "Neniu alia en la domo ellitiĝos ĝis horoj post tio! . . . Komplezu!"

Li preskaŭ diris "Ne," ĉar ĝi postulos, ke li tuj malkaŝu al sia edzino la tutan aferon. Sed post momento li diris "Jes." Li ne volis rifuzi tiun ĉarman petan geston. Cetere, kial kaŝi al Oliva kion ajn, eĉ por unu tago?

Ĉe vespermanĝo li rakontis ĉion al sia edzino, kaj sciigis kun ĝojo, ke ŝi ankaŭ alte ŝatas tiun Mimi kaj konfidas al ŝi.

V

Mimi kuŝis en lito en la infanejo de la luprenita domo apud la vojo al Rottingdean, kiu, kvankam ĝi ne estis "la hejmo," estis tamen dece komforta loĝejo. La infanejo estis vastega, kvankam subtegmetaĵo. La blankaj kurtenoj de la fenestroj estis altiritaj, kaj fajro brulis en la kameno, agrable lumigante kaj tre amike kondukante. En la alia fino de la ĉambro, en profunda ombro, estis la lito de Jean.

La pordo malfermiĝis senbrue, kaj iu eniris la ĉambron kaj repuŝis la pordon, ne tute fermante ĝin.

"Ĉu estas vi, panjo?" Jean demandis per sia hela voĉo, el la malproksima lito en la angulo. Li havis precize ok jarojn.

"Jes, karuleto," diris la nova duonpatrino.

La servantino Ada estis aranĝinta la infanojn por la nokto, kaj nun la duonpatrino estis veninta supren por kisi ilin kaj aminde kondukti. Ŝi estis konscienca juna virino, plena je deziro agi inde, kaj ŝi estis decidinta, ke ŝi ne simulu al la tradicia duonpatrino.

Ŝi kisis Jean, kiu jam ŝate ekamis ŝin, kaj kontentige tiklis lin, kaj denove aranĝis al li la littukojn, kaj tiam silente paŝis tra la ĉambro al Mimi. Mimi povis vidi ŝian vizaĝon per la fajra duonlumo. Belaspekta, bonhumora vizaĝo ĝi estis; tamen tre decida, kaj eble iom tro plena je komuna saĝo. Ĝi havis aspekton prirespondan, iom seriozan. Cetere, tiuj ĉi du infanoj estis respondigaĵo, aparte Mimi kun sia dorso; kaj plie, Pierre Emile Vaillac estis farinta al ŝi kaj ŝiaj duongefiloj ĉagreneton, telegrafante, ke li ne povas alveturi tiunokte. Oliva Unua, la trimonata novedzino, estis ornaminta sin vane.

“Nu, Mimi,” ŝi diris per sia mallauĝta vibranta voĉo, sin klinante super la lito, “mi tre esperas, ke vi ne trolacigis vin hodiaŭ posttagmeze.” Tiam ŝi donis al Mimi kison.

“Ho! ne, panjo.” La knabineto ridetis.

“Oni diras, ke vi atendis ekster la barbirejo, dum oni tondis al Jeannot la harojn.”

“Jes, panjo. Mi ne volis eniri.”

“Ada ne restis kun vi la tutan tempon?”

“Ne, panjo. Unue ŝi enkondukis Jeannot, tiam ŝi eliris revene al mi, kaj tiam ŝi denove eniris por sciigi, kiom longe oni atendigos lin.”

“Mi bedaŭras, ke ŝi lasis vin sola sur la strato. Ŝi devus ne fari tion, kaj mi diris al ŝi tion . . . Ja sur la Vojo de l'Reĝo, inter ĉiaspecaj homoj!”

Mimi nenion diris. La nova Madame Vaillac moviĝis iom al la fajro.

“Kompreneble,” ŝi daŭrigis, “mi scias, ke vi estas vera virineto, kaj eble ne estas necese, ke mi ĝin diru al vi, sed vi devas neniam paroli kun iu sur la strato.”

“Ne, panjo.”

“Precipe en Brighton . . . Tion, kompreneble vi neniam faras, ĉu efektive?”

“Ne, panjo.”

“Bonan nokton.”

La duonpatrino eliris el la ĉambro. Mimi povis senti la batadon de sia koro. Tiam Jean vokis :

“Mimi.”

Ŝi nenion respondis. Efektive ŝi estis tro maltrankvila por povi respondi.

Jean denove vokis kaj tiam ellitiĝis kaj paŝis kun molaj batoj, *pum, pum*, tra la ĉambro al ŝia litoflanko.

“Diru, Mimi,” li kriis per sia insista soprano, “kiu estis, kun kiu vi parolis?”

Ne batis, sed saltis la koro en Mimi.

“Kiam? Kie?”

“Hodiaŭ posttagmeze, dum oni tondis al mi la harojn.”

“Kiel vi scias, ke mi parolis kun iu?”

“Ada vidis vin tra la barbira fenestro.”

“Kiam ŝi tion diris al vi?”

“Ne tiel. Mi aŭdis ŝin rakonti al panjo.”

Sekvis silento. Tiam Mimi kaŝis sian vizaĝon, kaj Jean povis aŭdi ŝin plorĝemi.

“Vi povus diri al mi!” Jean insistis. Li estis tro absorbata en sia scivoleco, kaj tro maltrankviligita de la plena kompreno de tio, ke ŝi kaŝis ion kontraŭ li, por bedaŭri ŝiajn larmojn.

“Ĝi estas sekreto,” ŝi murmuris en la kusenon.

“Vi povus ĝin diri al mi!”

“Foriru, Jeannot!” ŝi kriis kun histeria eksplodo.

Li faris al la lito koleran puŝegon.

“Mi babilas al vi ĉion; kaj ne estas juste. *C'est pas juste!*” li diris malafable, sed ankaŭ en lia voco estis larmoj. Li estis hometo same sentema kaj malkvieta, pasie ŝatanta por Mimi.

Li mole paŝis, *pum-pum*, returne al sia lito. Sed eĉ antaŭ ol li atingis la liton, Mimi povis aŭdi lin ploranta.

Grade ŝi kvietigis siajn plorĝemojn, kaj post iom ĉesis tiuj de Jean. Kaj tiam ŝi divenis, ke Jean dormas. Sed Mimi ne ekdormis. Ŝi sciis, ke la sorto kaj sinjoro Coe kaj tiu malaminda nova servantino, Ada, estis kunagintaj al la ruinigo de ŝia vivo. Ŝi vidis klare la tutan aferon. Ada estis troservema kaj klopodema, ankaŭ kaŝema kaj insidema. La ĉefa ideo de Ada estis tio, ke oni devas superruzi la infanojn. Nur imagi tiun abomenan virinon spionanta ŝin tra la fenestro, kaj tiam nenion diranta al

ŝi, sed forŝtelanta por babili rakontojn al ŝia panjo ! Nur imagi tion ! La sento de Mimi rilate al severa justeco ne permesis kulpigi la panjon. Ŝi estis certa, ke la nova duonpatrino bone intencas al ŝi. La panjo estis liverinta al ŝi taŭgan okazon por konfesi, por cedi propravole, ke ŝi estis parolinta kun iu sur la strato, kaj ŝi ne konfesis. Kontraŭe, ŝi mensogis. La panjo konjekteble nenion plu diros pri la afero, ĉar ŝi portas fortan senton de honoro ĉe la infanoj, kaj ne volus kapti nedecan superecon. Provinde eligi el Mimi konfeson, ŝajnigante, ke ŝi nenion scias, kaj malsukcesinte, ŝi ne estis tia virino, kiu returne dirus : "Mi ja scias ĉion ; do tuj konfesu !" La panjo akceptos la situacion, penos kondukti kvazaŭ nenio okazis, kaj kredeble eĉ nenion diros al la patro.

Sed Mimi sciis, ke ŝi estas por ĉiam defaligita en la estimo de ŝia duonpatrino.

Kaj ŝi estis malpacinta kun Jean : fakto tre malagrabla kaj tre maloŭta. Restis ankaŭ la privata maltrankvilo pri ŝia mistera dorso. Ekzistis ankoraŭ io : la nura fakto, ke ŝia amiko, sinjoro Coe, bontrovis edziĝi kun iu. Jam de longe ŝi estis sentinta favorinklinon al sinjoro Coe. Ili estis laŭokaze intimaj. Foje, lastan jaron, en la malantaŭo de granda velŝipeto apud Morecambe, dum ŝiaj amikoj estis ridegantaj kaj kriegantaj en la antaŭo, ŝi kaj sinjoro Coe estis ĝuintaj tre belan mallaŭtan interparolon pri ŝiaj pensoj pri ĝeneralaj mondaĵaj aferoj ; ŝi estis karesinta lian manon . . . Ne ! ŝi neniel havis la revon, kreskiĝi en virinecon kaj tiam edziniĝi kun sinjoro Coe ! Certe ne. Sed tamen, ke li bontrovis edziĝi, tiamaniere . . . ĝi estis . . .

La fajro forvelkiĝis en mallumon, tiel ĉesante esti amiko. Ankoraŭ ŝi maldormis. Ĉu estis verŝajne, ke ŝi dormus, subpremante de la tragedio kaj malĝojeco de la tuta universo ?

VI

Sinjoro Eduardo Coe kaj Oliva Dua ellitiĝis en la sekvanta mateno en tre gaja humoro. Sinjoro Coe estis dirinta al sia edzino kaj al Mimi, ke la ekforira horo estos la sesa. Sed tio estis troigo. Kiom koncernis lian edzinon, li jam estis trovinta konsilinde troigi rilate tiajn aferojn.

Iomete da modera troigo malpliigis la riskon maltrafi vagonarojn kaj aliajn fenomenojn, kiujn oni ne povas maltrafi sen konfuziĝo kaj ĉagreno.

Fakte, estis jam la sesa, kiam Edŭardo Coe elrigardis tra la dormoĉambra fenestro. Li estis tute vestita. Lia edzino ankaŭ estis tute vestita. Li tial sin sentis tute certa pri la vagonaro. La fenestro, kiu estis iom alta super la mondo, donis vidon sudorientan, tial li ricevis perspektivon ne sole de la vastaj sudaj stepoj ondegantaj for al Newhaven, sed ankaŭ de la mara malvasto la Maniko, kiu estis serena, kun malgrandaj flikaĵoj de nebulo ripozantaj sur ĝi. La ĉielo estis sennuba supre, verdete safirkolora, kaj la aŭtuna aero pikis kaj mordetis la haŭton, kvazaŭ ia amika hejma besto, kaj vigligis kiel ia altpreza kuracilo. Sur la velkinta foliaro de arbo proksima al la fenestro pendis milionoj da altvaloraj juveletoj. Kokoj estis fanfaronantaj. Bovinoj estis esprimantaj pravigeblan zorgecon. Kaj en la malproksimo unu malgranda vaporŝipo eligis multe da fumo pro nenio, dum ĝi blovpulsadis el la haveno de Newhaven.

“Oliva,” li diris.

“Kio estas?”

Ŝi estis aranĝanta ĉapelojn en la supra parto de sia vojaĝkesto. Ŝi ja havis specialan ĉapelkeston, sed la ĉapeloj estis tro grandaj por ĝi, kaj ŝi pakis en ĝin bagatelojn malpli gravajn, ekzemple jupojn. Jen unu el la detaloj, kiuj unue montris al la mirigita homo, Edŭardo Coe, ke virino neniam malpli similas viron, ol ĉe la vojaĝo.

“Venu ĉi tien,” li ordonis al ŝi.

Ŝi obeis.

“Rigardu tion,” li ordonis al ŝi, montrante sur la scenon, por kiu la fenestro estis la kadro.

Ŝi obeis. Ŝi ankaŭ rigardis lin per siaj nigraj, pasiaj, kaj tamen duonmokantaj okuloj.

“Jes,” ŝi diris, “kaj kiu igos tiun vojaĝkeston ŝlosiĝi?”

Ŝi kvazaŭ klakis per la fingroj je la dolĉaj frumatenaĵ influoj de la Naturo, por kiuj li estis aparte sentema. Kaj tamen li estis ravita. Li trovis tute ĉarme, ke ŝi, alvokate por admiri la Naturon, respondis nur: “kaj kiu igos tiun vojaĝkeston ŝlosiĝi?”

Li karesis al ŝi la harojn.

“Ne prosperas la penado teni dece la harojn en apudmara loko,” ŝi rimarkis, rave grimacante per la lipoj.

Li klarigis, ke lia mano neniel proponas kritikon pri ŝiaj haroj. Kaj tiam sonis frapeto sur la ĉambra pordo, kaj Oliva Dua forsaltis iomete de sia edzo.

“Eniru,” li kriis, ŝajnigante esti tiel brava, kiel leono.

Tamen li estis forgesinta, ke la pordo estas ŝlosita, kaj li devis iri malŝlosi ĝin.

Pleto kun kafo kaj lakto kaj sukero troviĝis ĉe la pordo, kaj malantaŭ la pleto la malgranda saloneta servistino de la hoteleto. Li salutis la servistinon kaj petis ŝin porti la pleton al la tableto apud la fenestro.

“Vi estas akurata,” diris Oliva Dua afable. Ŝi estis leviĝinta mem tiel mirakle frumatene, ke surprizis ŝin vidi alian virinon tiel frue ellitiĝinta. Ankaŭ ŝi estis iom mirigita, ke la salonetistino ne montris miron pri tiuj eksterordinaraj horoj.

“Jes, *ma'ame*,” respondis la servistino, sin demandante, kial Oliva Dua tiom ekscitiĝas. La salonetistino ellitiĝis je la kvina kaj duono ĉiun matenon de sia vivo, escepte en specialaj okazoj, kiam ŝi ellitiĝis je la kvara kaj duono por helpi en kamparaj aferoj.

“Tute bona, tiu ĉi kafo, ĉu ne?” murmuris Edŭardo Coe, demetante la vaporantan tason post sia unua gustumeto. Ili estis denove kunesolaj, sidantaj unu kontraŭ alia ĉe la tableto apud la fenestro.

Oliva Dua balancis la kapon.

Oni ne devas supozi, ke tiu ĉi estis la sola, unika, prirevata hotelo en Anglujo, kie la kafo estas propravole bona. Ne! Rilate kafon, tiu ĉi hotelo ĝuste similis al ĉiuj aliaj hoteloj. Sed Oliva Dua estis speciale klopodinta pri tiu kafo. Ŝi estis vizitinta la hotelan kuirejon en la hieraŭa vespero pri tiu kafo.

“Sed, senalude,” ŝi demandis, “kie estas la suno?”

“Okaze, la suno ankoraŭ ne leviĝis,” diris Edŭardo. Li ekrigardis sian taglibreton, kaj poste sian poŝhorloĝon.

“Se io ne malordiĝos, vi vidos ĝin post malpli ol tri minutoj.”

“Ĉu vi volas diri, ke ni vidos la sunleviĝon?” ŝi ekkriis.

Li ekbalancis la kapon.

“Nu !” ŝi ekkriis, absurde gaja, “mi neniam aŭdis pri io egala !”

Ŝi observis la sunleviĝon kiel infano vidanta por la unua fojo la internajon de poŝhorloĝo. Kaj kiam la suno estis leviĝinta, ŝi zorge turnis la rigardon ĉirkaŭ la malordigita ĉambro.

“Pro ĉielo,” ŝi murmuris, “ni ne forgesu tiujn dentobrosojn !”

“Tiel ridinda vi estas,” li diris, “ke mi nepre donos al vi kison.”

Oni devas konfesi, ke ili neniel superis du infanojn kune aventurantajn.

Estis same, kiam en la hotela korto ili eniris la malgrandan kadukan *victoria* fiakron, difinitan por porti ilin kun ilia pakaĵo al Brighton. Same, sed eĉ pli ol same. Ambaŭ estis tiel kontentaj je si, ke ilia ĝojo senĉese elboladis per fenomenoj, kiujn oni simple devas nomi infanecaj. La nura veturado tra la vilaĝo kun la ĉevaleta vipanta angulojn per sia vosto, kaj la veturigisto firmiganta la skuigantan ĉapelujon per sia maldekstra mano, estis tiel amuza, ke iel ili ne povis ne ridi.

Tiam poste, ili estis lasintaj la vilaĝon kaj supren veturis sur la senŝirma ĉefvojo, kun la ondantaj blueverdaj stepoj dekstre, kaj maldekstre la vasta briletanta plata planko de la Maniko. Kaj la nura sento de vivado preskaŭ troemociigis ilin.

Kaj post plua veturo ili pasis unu domon, kiu staris sola, for de la vojo en direkto al la krutaĵoj. Ĝi havis deklivan ĝardenon kaj malgrandan vitritan plantodomon. La barilpordo kondukanta al la ĉefvojo staris duonfermita, sed la rulkurtenoj de ĉiuj fenestroj estis almetitaj, kaj nenie estis ia signo de vivo.

“Jen la domo,” diris Edŭardo Coe, lakone.

“Mi povus ĝin scii,” respondis Oliva Dua. “Oliva Unua certe estas la plej malbona ellitiĝanto, kiun mi iam renkontis, kaj mi kredas, ke Pierre Emile ne estas multe pli bona.”

“Tamen,” diris Edŭardo, “ne ekzistas taŭga pruvo de dormemeco en tio, ke oni ne leviĝis kaj diskuras je la sesa kaj tri kvaronoj matene, vi komprenas.”

“Mi iom forgesis, ke estas tiel frumatene!” diris Oliva Dua, kaj oscedis. La oscedo surprizis ŝin, antaŭ ol ŝi konsciis pri ĝi. Ŝi vigligis sin kaj kisis siajn manojn al la domo, moke, diveneme: “Adiaŭ, domo! Adiaŭ, domo!”

Nun ili estis savitaj. Ili jam ne povis esti malkaŝitaj en sia sekreta mielmonato. Kaj ilia gajeco eĉ plialtiĝis.

“Mi pensis, ke vi diris, ke Mimi atendas nin?” rimarkis Oliva Dua.

Edŭardo Coe levis la ŝultrojn. “Kredeble, tro longe dormis! Aŭ eble ŝi enuiĝis pro atendado. Mi diris al ŝi: la sesa horo.”

Entute Oliva Dua sentis sin malŝarĝita, ke Mimi ne aperis.

“Efektive ne estus grave, se ŝi elbabilus pri ni, ĉu ne vere?” diris la novedzino.

“Tute ne,” konsentis la novedzo. Nun, kiam ili estas sendanĝere postlasintaj la domon, ambaŭ estis tre kuraĝaj. Estis kvazaŭ ili dirus al si reciproke: “Kiu zorgas?” La humoro de la novedzo estis tute alia, ol lia malluma antaŭzorgeco de la antaŭa vespero. Kaj la frumatena sunbrilo sur la rospertoj estis ravanta.

Sed post ducent jardoj da veturo, ĉe fleksiĝo de la vojo, ili vidis malgrandan knabinecon, kiu ŝirmis la okulojn per la mano kaj rigardis en direkto sub la suno. Ŝi estis vestita per blu-serĝa jupeto, kaj ŝi havis longajn senripozajn krurojn, kaj la vorto *Formidable* estis sur ŝia frunto, kaj ŝiaj okuloj estis torde duonfermitaj en la forta sunlumo. Kaj en ŝia mano estis floroj.

“Tie ŝi estas, tamen!” diris Edŭardo subite.

Oliva Dua balancis la kapon. Oliva Dua ruĝiĝis ankaŭ, ĉar Mimi estis la unua el ŝiaj konatoj, kiu vidis ŝin post ŝia edziniĝo. Ŝi ruĝiĝis pro tio, ke ŝi nun estas edziĝintino.

Mimi, kiu kun saĝa diskreteco estis aranĝinta, ke la renkontiĝo ne okazu ĝuste kontraŭ la domo, venis renkonte al la veturilo. La ĉevaleto iris malrapide supren sur deklivo. Ŝi saltis antaŭen kun sia infana gracieco kaj kun la negracieco de siaj longaj kruroj, kaj kun haroj ondetantaj en la venteto, kaj ŝi ridis timete.

“Bonan matenon, bonan matenon!” ŝi kriis. “Ĉu mi saltu sur la ŝtupeton? Tiel, la ĉevalo ne devos halti.” Kaj ŝi saltis malpeze sur la ŝtupeton kaj ŝaŭmridetis, ankoraŭ timete, rigardante jen la fianĉon, jen la fianĉinon. La fianĉo tenis ŝin firme ĉe la ŝultro.

“Nu, Mimi,” diris Oliva Dua, kies malaplombo tuj malaperis antaŭ la malaplombo de la infano. “Jen vera amindeco viaparte”.

La du virinoj sin kisis. Sed Mimi ne proponis sian vangon al la fianĉo. Li kaj ŝi simple premis reciproke la manojn tiel bone, kiel ili povis, ne riskante la firmecon de Mimi sur la ŝtupeto.

“Kaj kiu vin vekis, he?” demandis Edŭardo Coe.

“Neniu,” diris Mimi; “mi leviĝis propravole, kaj,” sin turnante al Oliva Dua, “mi faris por vi ĉi tiun bukedon, onklinjo. Sur la kampo ne estas floroj. Sed mi prenis la krizantemon en la vitrita plantodomo, kaj mi ĉirkaŭmetis al ĝi kelkajn pecojn de filikoj kaj diversaĵoj. Volu pardoni, ke ĝi estas kunligita per fiklano.”

Ŝi proponis la bukedon sen memfido, kaj Oliva Dua akceptis ĝin kun afabla rideto.

“Nu,” diris Mimi, “konvenas, eble, ke mi ne iru pluen?”

Estis alia kiso kaj manpremo, kaj en la sekvanta momento Mimi staris sur la vojo, svingante per malgranda premĉifita poŝtuketo al la foriranta *victoria* fiakro, kaj la gefianĉoj estis streĉantaj siajn kolojn por respondi. Ŝi svingadis ĝis la fiakro malaperis, kaj tiam staris senmove, blua kaj blanka makuleto sur la verda pejzaĝo, kun la matena suno kaj la maro malantaŭ si.

“Guste ŝi similas virineton, ĉu ne?” diris Edŭardo Coe, ravite de la vizio.

“Guste!” konsentis Oliva Dua. “Ĉarmanta malgrandulino! Sed kiel laca kaj malsana ŝi aspektas! Ili faris bone, forkondukante ŝin.”

“Ho!” diris Edŭardo Coe, “konjekteble ŝi ne dormis bone, timante, ke ŝi trodormos matene. Ŝi aspektis tute bonfarta hieraŭ.”

LA REGANTA ILUZIO

I

Eble mia stato de ekscitita ĉagreno estis la kaŭzo, kial mi ne rekonis lin, ĝis li trairis la vastan halon de la hotelo kaj metis sian manon sur mian ŝultron.

Mi estis alveninta en Parizo en tiu posttagmezo, kaj veturinta al tiu ĉarma, mezekosta hoteleto, kiun ĉiu el ni konas, kiun ankaŭ ni ĉiuj nomas konfidencie al ĉiuj niaj amikoj; kaj estis nenia loko en tiu hoteleto. Nek en sep aliaj fiere mastrumataj hoteloj, kiujn mi vizitis! Iaspeca arĥiduko, kiu gardis la lastan el la sepo kontraŭ eblaj klientoj, permesis al si informi min, ke la sezono atingis sian plej grandan plenecon, kaj ke la solaj centraj hoteloj, kie mi havas ŝancon esti akceptita, estas tiuj monstraĵoj, la Granda kaj la Hotel Terminus apud la Gare St. Lazare. Ĉi tiun mi elektis, kaj oni difinis al mi la numeron 973 en la tegmento.

Mi supozis, ke jam pasis miaj ĉagrenegoj. Sed ne! Unu grandioza portisto interne de la barilpordo ĵus estis konsentinta malsuprenigi mian pakadon de la fiakro, kaj eĉ preskaŭ komencis tion fari, kiam unu sovaĝe-vestita, malbela kaj maljuniĝanta virino, sekvata de servistino, kuregis nervemule malsupren sur la ŝtuparo kaj vokis lin for, por teni paketon. Li obeis! En tiu sama momento la aŭtomobilo de tiu barbara kaj abomena estaĵino, havante preskaŭ la grandecon de fervoja vagono, alruliĝis kaj forpelis mian modestan fiakron ĝis pli malproksima loko de la strato. Mi devis atendi, humiligita kaj senhelpa, dum la taksimetro de mia fiakro nelacigeble aldonis pencon post penco, kaj tiu abomena virinaĉo aranĝis sin en sia vastega kaleŝo, per helpo de sia servistino, de la portisto, kaj de du knaboj-lakeoj. Mi ne tiel multe ĉargreniĝus, se ŝi estus juna kaj bela. Se ŝi estus juna kaj bela, ŝi havus la rajton esti malkompleza kaj ordonema. Sed

ŝi estis nek juna nek bela. Imageble ŝi estis iam juna : esti bela ŝi neniam povus. Kaj ŝiaj okulaj estis severaj—severaj.

De tio venis mia stato de ekscitita ĉagreno.

“Hullo! How goes it?” La perfekta popola eldiro angla estis kviete murmurata al mi kun franca tonnuanco, dum la malsovaĝa mano karesis mian ŝultron.

“Nu,” mi diris, perforte elĵetite el malagrabla en agrablan ekscitiĝon, “ŝajnas al mi, ke vi vere estas Boissy la plijuna!”

En la daŭro de dudek jaroj mi ne estis vidinta lin, sed mi rekonis en tiu milda kaj melankolia hebrea vizaĝo, kun la molaj lipharoj kaj la mola barbo, la sopiremajn trajtojn de la dekkvinjara knabo, kiu estis mia kunulo en la “internacia” lernejo (genia eltrovaĵo por trudi ekzilon al patrolandamantoj) kun filioj en Dresdono, Hastings, kaj Versailles.

Baldaŭ mi estis rakontanta al li, kun iom da singratulo, ke, ĉar mi estas drama kritikisto oficanta por londona ĉiutaga gazeto, kiu decidis flati siajn legantojn, donante specialajn kritikojn pri la pli gravaj francaj dramoj, mi venis Parizon por ĉeesti la prezentadon de *Notre Dame de la Lune* en la Vaudeville.

Kaj dum mi tion rakontis al li, venis al mi la ideo, efektive por la unua fojo :

“Ho! kromdire, mi supozas, ke vi ne estas okaze parenco de Octave Boissy?”

Iom mi deziris, ke li tia estu ; ĉar entute, diru kion vi volas, ekzistas ia plezuro en la sento, ke vi estis lerneja kunulo eĉ kun parenco de eminentulo tiel imponanta, kiel Octave Boissy—la viro, kiu rikoltis milionon kaj duonon da frankoj el sia dua dramo, kiu tamen estis tute bona dramo. Ĉiuj muroj de de Parizo estis kriegantaj lian nomon.

“Mi estas *the Johnny himself*,” li respondis timeme, naive fiera pri sia brita slango.

Mi ne eksplodis per *Neeble!* Eksplodo per *Neeble!* estus malĝentila. Tamen mi timas, ke ne plene prosperis al mi kaŝi mian miregon. Mi devis batalegi kontraŭ la natura homa tendenco supozi, ke nenia knabo, kies lerneja kunulo oni estis, povas esti malvolviĝinta en eminentulon.

“Efektive!” mi rediris, plej kviete laŭ mia eblo, kaj aldonis mensogon vere pekan: “Nu, mi ne miras!” Kaj en tiu momento mem mi kvazaŭ aŭdis min rakonti, en la oficejo de mia gazeto: “Mi renkontiĝis en Parizo kun Octave Boissy. Ni estis lernejoj kunuloj, vi komprenas.”

“Vi estis forgesinta kredeble mian antaŭnomon,” li diris.

“Tute ne,” mi respondis. “Via antaŭnomo estis Plijuna. Alian vi neniam havis!” Li ridetis indulge. “Sed kion surteran vi faras tie ĉi?”

Octave Boissy estis tre riĉa homo. Li eĉ aspektis kiel tre riĉa homo. Li estis unu el la dorlotitoj de la sukceso kaj de absurde luksa civilizacio. Kaj li ŝajnis strange fremda en la vasta, banala akceptejo de la Hotel Terminus, inter la ŝanĝiganta, klopodanta homamaso el tute ordinaraj, burĝulaj, meze-riĉaj turistoj kaj vojaĝantoj kaj malriĉaj faktoraĉoj. Li devis almenaŭ troviĝi en tre bontona privata ĉambro en la Meurice aŭ la Bristol, se eĉ en hotelo kiu ajn!

“La fakto estas, ke mi estas neŭrastenia,” li diris simple, ĝuste kvazaŭ li dirus: “La fakto estas, ke mi havas lignan kruron.”

“Ho!” mi ridis, decidinte trakti lin kiel Boissy Plijunan, kaj ne kiel Octave Boissy.

“Mi havas malsanecan teruron de la irado en plena aero. Kaj tamen mi ne povas elporti la suferon, esti en malgranda ĉirkaŭfermita loko, precipe kiam ĝi estas movanta. Jen afero, kiu tre ĝenas. *Mais que veux-tu? . . . Suis comme ca!*”

“*Je te plains,*” mi intermetis, por senprokraste redoni lian familieran kaj flatan “ci.”

“Oni forte konsilis al mi foriri kaj loĝi en la kamparo,” li daŭrigis kun la sama serioza kaj sopirema simpleco, “kaj mi mendis specialan salon-vagonon sur la fervojo, por havi kiel eble plej multe da spirada loko; kaj mi kuraĝigis min iri de mia domo al la stacidomo per aŭtomobilo. Mi pensis, ke mi certe povos elporti tion. Sed mi ne povis. Mi havis teruran krizon ĉe mia alveno en la stacidomo, kaj mi devis sidi kvar horojn sur pakveturileto. Mi ne povus inklinigi min eniri la salon-vagonon por granda

kapitalo! Mi ne povis reiri hejmen en la aŭtomobilo! Mi ne povis marŝi tien! Mi do eniris la hotelon. De tiu tempo mi loĝas ĉi tie.”

“Sed kiam okazis tio?”

“Antaŭ tri monatoj. Miaj kuracistoj diras, ke post pluaj ses semajnoj mi estos sufiĉe refortigita por foriri. Ĝi estas tre aflikta malsano. *Mais que veux-tu?* Mi havas apartamenton en la hotelo kaj servistojn apartajn por mi. Mi marŝas ĉi tien en la halon, ĉar ĝi estas tiel vasta. La hotelaj homoj faras plej bone laŭ sia povo, tamen kompreneble—” Li eklevis la manojn. Lia rezignacia, milda rideto estis por mi egalpaŝe komika kaj tragedia.

“Sed ĉu vi volas diri, ke vi ne povus marŝi rekte el tiu pordo kaj iri hejmen?” mi demandis.

“Ne maltimas!” li diris definitive. “Volu veni al mia apartamento, kaj preni temanĝon.”

II

Baldaŭ poste lia propra lakeo servis nin per temanĝo en granda privata salono sur la sesa aŭ sepa etaĝo, kiun por atingi ni estis suprengrimintaj mil kaj unu ŝtupojn; estis por Octave Boissy neeble uzi la lifton, ĉar li estis konvinkita, ke li mortus en ĝi, se li permesus al si tian liberecon. Sur la muroj de la ĉambro pendis modernaj kanvasoj tiaj, kiajn neniam antaŭe oni vidis en kiu ajn hotelo. Multaj el la bagateloj kaj brodaĵoj estis evidente fremdaj por la hotelo.

“Sed kion vi faris, por ĉeesti la antaŭprovojn de la nova dramo?” mi demandis.

“Ho!” li diris malvigle, “mi neniam ĉeestas antaŭprovojn de miaj dramoj. Mademoiselle Lemonnier prenas tiun tutan klopodon.”

“Laŭ la afisoj, ŝi ludas la ĉefan rolon en tiu ĉi dramo, ĉu ne vere?”

“Ŝi ludas la ĉefrolon en ĉiuj miaj dramoj,” li diris.

“Unuaklasa aktorino sendube? Mi neniam vidis ŝin sur la sceno.”

“Nek mi!” diris Octave Boissy. Kaj ĉar mi nun malkaŝe lasis montriĝi mian miregon, li aldiris: “Vi kom-

prenas, mi ne interesiĝas pri la teatro. Ne sole mi neniam ĉeestis antaŭprovon, mi eĉ neniam vidis prezentadon de kiu ajn mia dramo. Ĉu vi ne memoras, ke estis la inĝeniera arto, kiu super ĉio alia min altiris? Mi havas en la subteretaĝo de mia domo en la Avenue du Bois inĝenieran laborejon vere mirindan. Mi tre volus, ke vi ĝin estu vidinta; sed vi komprenas, ĉu ne, ke mi estas ĝuste tiel barita kontraŭ la Avenue du Bois, kiel kontraŭ Timbuktuo. El ĉiuj malsanoj la mia estas la plej ĉagrenanta.”

“Nu, Boissy Plijuna,” mi rimarkis, “supozeble venis al vi la penso, ke via stato taŭgas nur por vekaj miron en la simpla brusto de sovaĝa anglo.”

Li ridis, kaj mi ĝojis, ke mi havis la kuraĝon, definitive demeti lin en la rangon de Boissy Plijuna.

“Kaj ne sole en la brusto de anglo!” li diris. “*Mais que veux-tu?* Oni devas vivadi.”

“Tamen, ŝajnas al mi, ke vi povus fari komfortan vivrimedon el la inĝeniera arto. En Anglujo, konsultaj inĝenieroj estas princoj.”

“Ho, jes!”

“Kaj inĝeniera laboro povus esti resaniginta vin de via neŭrasteno, se vi prenis ĝin per sufiĉe grandaj dozoj.”

“Tio certe okazus,” li trankvile konsentis.

“Do kial la teatro, kiam la teatro ne interesas vin?”

“Por vivadi,” li respondis. Kaj, kiam mi diras ‘vivadi,’ mi intence komprenigas *vivadi*. Ĝi ne estas demando pri mono, sed demando pri *vivado*.”

“Sed, ĉar vi neniam vizitas la teatron—”

“Mi verkas sole por Blanche Lemonnier,” li diris.

Mi estis mistifikita. Tion vidante, li daŭrigis intime: “Sendube vi scias pri mia admirego al Blanche Lemonnier?”

Mi skuis la kapon.

“Mi eĉ neniam aŭdis pri Blanche Lemonnier, krom en rilato kun viaj dramoj,” mi diris.

“Ŝi estas konata nur en rilato kun miaj dramoj,” li respondis. “Kiam mi renkontis ŝin, antaŭ dekduo da jaroj, ŝi estis vage ludanta tra la provinco, prenante malgrandajn rolojn en triaklasaj trupoj. Mi demandis al ŝi, kia estas ŝia plej granda ambicio, kaj ŝi respondis: esti aplaŭdata en ĉefa rolo sur pariza sceno. Mi diris al ŝi, ke mi plenumigos al ŝi ŝian ambicion, kaj ke mi esperas, ke ŝi plenumigos la

mian, kiam mi tion efektivigos. Jen kiel mi komencis verki dramojn. Tio estis mia sola motivo. Ĝi estas la sola motivo, kial mi daŭrigas verki ilin. Se ŝi estus dezirinta esti figuro en la Societo, mi enirus en la politikon.”

“Mi ricevis grandan deziron vidi tiun sinjorinon,” mi diris. “Mi sentas, ke apenaŭ mi povas atendi ĝis la vespero.”

“Konjekteble ŝi alvenos ĉi tien post kelkaj minutoj,” li diris.

“Sed kiel vi elfaris ĝin?” mi demandis. “Kia estis via agada plano?”

“Post la sukceso de mia unua dramo, mi verkis la duan speciale por ŝi, kaj mi trudis ŝin sur la direktaron. Mi faris el ŝi nepran kondiĉon. La direktoraro kontraŭstaris, sed mi estis en situacio por insisti. Mi insistis.”

“Ĝi havas la aspekton de simpla afero.” Mi ridis dubeme.

“Se vi estas drama kritikisto,” li diris, “vi divenos, ke ĝi ne estis unuatempe tute tiel simpla, kiel ĝi aspektas. Kompreneble, ĝi estas sufiĉe simpla, nun. Blanche Lemonnier estas jam tute identigita kun miaj dramoj. Ŝi estas egale konata kun preskaŭ kiu ajn aktorino en Parizo. Ŝi havas la gloron, kiun ŝi deziris.” Li ridetis kurioze. “Ŝia ambicio estas plenumita—ankaŭ la mia.” Li ĉesis.

“Nu,” mi diris, “neniam antaŭe mi estis tiel interesata pri kiu ajn dramo, kaj mi antaŭfidis, ke Mademoiselle Lemonnier estos grandioza.”

“Ne tro multe antaŭsupozu,” li trankvile rediris. “La ludado de Blanche ne ricevas la admiron de ĉiuj. Kaj mi ne povas respondi pri ŝia kapableco, ĉar mi neniam vidis ŝin en la ludado.”

“Jen, kio estas tiel stranga!”

“Tute ne! Suferigus min vidi ŝin sur la sceno. Mi abomenas la penson, ke ŝi ludas antaŭ la publiko. Sed tio estas ŝia deziro. Kaj, ĉio dirite, kio koncernas min ne estas la aktorino, sed la virino. Nur la virino mem valorigas al mi la vivon. Tiel longe, dum ŝi ekzistas kaj estas komplezema por mi, mia neŭrastenio estas afero tute indiferenta, kaj mi eĉ ne klopodas pri la inĝenierarto.”

Li provis per rido forigi la seriozecon de sia tono, sed ne tute bone prosperis al li. Ĝis tiam estis por mi amuza lia eksterordinara stato, kiel ankaŭ lia fatalisma akcepto de ĝi. Sed nun mi estis kortuŝita.

"Mi parolas al vi tre intime," li diris.

"Karulo, mia," mi eksplodis, "kompleze volu montri al mi ŝian portreton."

Li skuis la kapon.

"Malfeliĉe, ŝia portreto estas dismetita tra tuta Parizo. Tion ŝi ŝatas. Sed mi preferas mem posedi nenian portreton. Tia estas mia sento, ke—"

En tiu momento la lakeo malfermis la pordon, kaj mi aŭdis vivemajn voĉojn en la koridoro.

"Ŝi estas jam ĉi tie," diris Octave Boissy, per flustro subite drameca. Li ekstaris; mi ankaŭ. Lia vizaĝesprimo estis profunde ŝanĝita. Li regis siajn gestojn kaj sintenadon, sed siajn okulojn li ne povis regi. Kaj kiam mi vidis tiun rigardon, mi komprenis, kion por li signifis la vorto "vivadi." Mi komprenis, ke por li nek gloro, nek artista prospero, nek riĉaĵo, havas la plej malgrandan valoron en lia vivo. Lia vivo konsistis nur en unu sola afero.

"*Eh bien, Blanche!*" li ameme murmuris.

Blanche Lemonnier invadis la ĉambron kun aroganteco. Ŝi estis tiu abomena virinaĉo, kies ekveturo per sia aŭtomobilo estis tiel malordiginta mian alvenon.

LA LETERO KAJ LA MENSOGO

I

Rapidante de sia kaleŝo tra la malhela vestiblo al sia studejo, lasante sian sekretarion longe post si, li estis jam aranĝinta la unuan frazon de sia parolado antaŭ la Unuigitaj Komercaj Ĉambroj de la Kvin Urboj; lia cerbo estis plena je ĝi; li tuj sidiĝis antaŭ sia vasta skribotablo, senpacienca por komenci la dikton. Nur tiam li rimarkis la leteron, reliefe apogitan kontraŭ la ora kaj oniksa inkujo donacita al li de la Geprincoj de Kimrujo okaze de lia edziĝo. La koverto estis nebone, aŭ tute ne, algluita, kaj ĝia basko malfermiĝis dum li nerve ĝin palpis.

“Kara Klaŭd,—Tio ĉi estas por adiaŭdiri, fine—”

Li paŭzis. La timo ekkaptis lin ĉe la koro, kvazaŭ kuracisto subite anoncus al li, ke li devas subiĝi je operacio danĝerega por lia vivo. Kaj li foliumis rapide la kvar paĝojn ĝis la subskribo: “Sincere via, Gertrud’.”

La sekretario eniris.

“Mi devas unue skribi kelke da privataj leteroj,” li diris al la sekretario. “Lasu min sola. Mi sonorigos.”

“Jes, sinjoro. Ĉu mi prenu vian superveston?”

“Ne, ne.”

Diskreta fermo de la pordo.

—fine. Mi ĝin jam ne povas toleri. Klaŭd, mi iras Italujon. Mi loĝos en la villo en Florence, kaj fidas al vi lasi min trankvila. Vi devas sciigi al niaj amikoj. Vi povas komenci per gesinjoroj Bargrave hodiaŭ nokte. Mi estas certa, ke ili kunsentos kun mi, ke la ago estas konsilinda—”

Ŝajnis al li, ke tiu ĉi letero tre similas tiun specon, kiun oni legas antaŭ eksedziga tribunalo kaj poste presigas en la gazetoj; kaj ĝi naŭzis lin.

—estas konsilinda. Ĉiuj scios post unu aŭ du tagoj, kaj tiam post unu aŭ du tagoj la afero estos forgesita. Estas malfacile, en la cirkonstancoj, skribi nature, do mi

nur diros, Klaŭd, ke ni ne estas konformaj unu al la alia. Tion sufiĉe pruvis niaj dek jaroj de edzeco; tamen mi sciis ĝin antaŭ ses—eĉ sep—jaroj. Vi ne divenis, ke vi estis mortiganta min dum ĉi tiuj tutaj jaroj; tamen tiel estas—”

Mortiganta ŝin! Li ruĝiĝis per kolero, per indigniĝo, per senkulpeco, per kulpeco—per nur ĉielo scias kio!

“—tiel estas. *Vi* estis vivanta *vian* vivon. Sed kio pri mi? Post kvin jaroj mi estos jam maljuna, kaj mi ankoraŭ ne komencis vivadi. Mi ne povas *toleri* ĝin pli longe. Mi ne povas toleri tiun ĉi teruran regionon de la Kvin Urboj—”

Ĉu li ne estis insiste petinta ŝin, ke ŝi serĉu ŝanĝon per vizito al South Audley Street, kaj lasu lin daŭrigi sian laboron? Neniu deziris, ke ŝi daŭre restu en Staffordshire!

“—kaj mi ne povas toleri *vin*! Jen la kruda vero. Vi afliktas miajn nervojn, mia bedaŭrata knabo, per via klopodemo, via filantropio, viaj aferoj, via seriozeco. Miaj mizeraj nervoj! Kaj vi estis tro okupita por rimarki tion. Vi imagis, ke mi estos kontenta, se vi amindumas min distrite, *en passant*, inter politika festeno kaj episkopa matenmanĝo.”

Li ekskuiĝis. Ŝi ja pikis lin.

“Mi pikas vin—”

Ne! Kaj li rekte ordigis sin, mordante siajn lipojn!

“—Mi pikas vin! Mi estas malĝentila! Mi estas neindulginda! Tiajn aferojn oni ne kutimas diri, eĉ ne historiaj edzinoj al senpekaj edzoj, ĉu ne tiel? Mi tion konfesas. Sed mi devis ĝin diri al vi. Vi estas seriozema homo, Klaŭd, kaj tia mi ne estas. Tamen, ambaŭ ni naskiĝis tiaj, kiaj ni estas, kaj mi ĝuste tiom rajtas esti malserioza, kiel vi, esti serioza. Jen, kion vi neniam konstatis al vi. Vi ne estas pli bona ol mi; vi nur estas malsimila je mi. Estas malfeliĉe, ke kelkajn aspektojn de la vero vi eĉ ne povas ekvidi. Tamen, post la sceno de hodiaŭ matene—”

Sceno? Kia sceno? Li rememoris nenian scenon, se ne tion, ke li petis ŝin ne interrompi lin dum li legas siajn leterojn—petis tute afable—kaj ŝi lasis la matenmanĝan tablon. Li pensis, ke ŝi lasas ĝin ĉar ŝi finis. Li ne havis ideon—kia sensencaĵo!

“—sceno de hodiaŭ matene, mi decidis, ke mi ne ‘interrompos’ vin plu—”

Jes. Jen lia propra vorto—kiel infana ŝi estas!

“—vin plu en la pripensado de tiuj rilatoj de la vero, kiujn vi *kapablas* kapti. Adiaŭ! Vi estas honesta viro, kaj senruza viro, kaj tre konscienca kaj tre kapabla, kaj mi konjektas, ke vi faras multe da bono en la mondo. Sed viaj respondecoj estas tro ŝargaj por vi. Mi malŝargas vin je unu el ili, unu el la malpli grandaj—via edzino. Vi ne bezonas edzinon. Kion vi bezonas, estas pupo, kiun vi povus horloĝe streĉi ĉiudusemajne, por diri ‘Bonan matenon, kara,’ kaj ‘Bonan nokton, kara.’ Ŝajnas al mi, ke mi povas bone troviĝi en tre longa daŭro sen edzo. Mi ne estas tiel maldolĉumora, kiel vi povus konjekti, Klaŭd, laŭ tiu ĉi letero. Sed mi deziras, ke vi bone komprenu, ke inter ni ĉio estas finita. Vi povas fari, kion vi volas. Oni povas diri, kion ili volas. Mi havis jam sufiĉe. Por la libereco mi volas pagi kiun ajn prezon. Bonan ŝancon al vi! Plej bonajn dezirojn! Mi skribus novan leteron, se mi pensus, ke mi povus fari pli bonan.—Via sincere, Gertrud’.”

Li lasis fali la leteron, ĝin levis kaj denove ĝin tralegis, kaj laŭ sia kutima ordemo refaldis ĝin kaj remetis ĝin en la koverton. Li sidiĝis kaj apogis la leteron kontraŭ la inkujo kaj rigardegis la adreson en ŝia malzorga manskribo: *The Right Honourable Sir Cloud Malpas Baronet*. Ŝi estis redaktinta la adreson tiel plentitole, kiel lasta bato de sarkasmo. Kaj ŝi eĉ ne estis surskribinta ĝin “Privata.”

Li sentis sin kapturiga, preskaŭ svenanta; sonadis al li en la kapo.

Tiam li ekstaris kaj iris al la fenestro. La alta monteto, sur kiu staris la Kasteleto de Malpas—la fama Rata Nivelo—grade deklivis suden, kaj en la distanco tie malsupre, kelkajn mejlojn for, la nigra fumo de la Kvin Urboj ombrigiĝis super la flavaj fajroj de la fandfornegoj. Li estis la duondio de tiu regiono, pli vaste terposedanta ol la Grafo de Chell mem, modela lumastro, modela dunganto de kvin mil viroj, modela posedanto de sep minejoj kaj du ferfandejoj, filantropo, religiisto, plej ornama urbestro de Knype, prezidanto de la Protektantaro de Malriĉuloj, estrarano de

hospitaloj, prezidanto de la Futbala Asocio—mallonge dirite, Sir Cloud, filo de Sir Cloud kaj nepo de Sir Cloud.

Li fikse kaj reve rigardis sian regaĵon. La skandalo, do, devis lin tuŝi per sia nigriga fingro, lin la senmakulan! Gertrud' estis forkurinta. Li estis ruiniginta la vivon de Gertrud'! Ĉu efektive li tion faris? Kun sia peza kaj severa konsciencemo li demandis sin, ĉu li estas kulpa rilate ŝin. Jes, li ekopiniis, ke li estas kulpa. Kompreneble, li ne povas esti senkulpa. Virinoj, precipe tiaj, kia Gertrud', fieraj, pasiaj, sentokaŝemaj, ne tiel agadas pro nenio.

Kun ĝemo li paŝis en sian vestoĉambron kaj sin ĵetis sur kanapon.

Ŝi estos nefleksebla—tiel li konas ŝin. Liaj pensoj sin fiksas sur la belajn fruajn tagojn de ilia edzeco, la amodolĉeco, la revado! Kaj nun—!

Li aŭdis paŝojn en la studejo; iu malfermis la pordon! Ĝi estis Gertrude! Li povis vidi ŝin en la krepusko. Ŝi ja estis reveninta! Sed kial? Ŝi kuretis al la skribotablo, kliniĝis antaŭen kaj ekkaptis la leteron. Evidente ŝi ne sciis, ke li estas en la domo kaj estas leginta ĝin.

La streĉo estis tro dolora. Ĝemo eksplodiĝis el li, kvazaŭ de fizika turmento.

“Kiu estas?” ŝi ekkriis per konsterniĝa voĉo. “Ĉu estas vi, Klaŭd?”

“Jes,” li spiregis.

“Sed vi estas tre frue reveninta hejmen!” Ŝia voĉo tremis.

“Mi fartas malbone, Gertrud’,” li respondis. “Mi estas laca. Mi venis ĉi tien por kuŝi. Eble vi povos fari ion por mia kapo. Mi devos preni libertempon.”

Li aŭdis ŝin ĉifpremi la leteron, kaj tiam ŝi rapidis al li en la vestoĉambron.

“Mia bedaŭrata Klaŭd!” ŝi diris, kliniĝante super li en la matura eleganteco de siaj tridek jaroj. Li rimarkis ŝian vojaĝan veston. “Ĉu iom da *eau de Cologne*?”

Li malforte balancis la kapon.

“Ni kune foriru por libertempo,” li diris pli poste, dum ŝi lavis al li la frunton.

La palpo de ŝiaj manoj sur liaj tempioj rememorigis al li pri karesoj jam forgesitaj. Kaj efektive li sentis, kvazaŭ en la daŭro de kvaronhoro li travivus longan kaj teruran malsanon, kaj nun resaniĝas.

II

“Vi do opinias, ke post sia ekveturo ŝi plibonigis sian intencon?” diris lordo Bargrave post la tiutaga vespermanĝo. “Kaj revenis?”

Lordo Bargrave estis kuzo de Gertrud', kaj li kaj lia edzino foje kutimis veturi el Shropshire, por intersemajna vizito. Li sidis en la fumejo kun Sir Cloud; viro kun blankiĝantaj haroj kaj iom juna, trankvila vizaĝo.

“Jes, Henĉjo, ĝuste tiel. Vi komprenas, ke nur hazarde mi estis remetinta tiun leteron precize tien, kie mi ĝin trovis. Si eĉ ne konjektas, ke mi vidis ĝin.”

“Ŝi estas tondre bonega aktorino!” rimarkis lordo Bargrave, gustumetante sian viskion. “Ĉe la vespermanĝo mi sciis, ke io neordinara okazas, sed ne el ŝi mi ĝin eksciis, sed el vi.”

Sir Cloud ridetis malĝoje.

“Nu, oni supozas, kompreneble, ke mi malsanas—aŭ almenaŭ, ke mi ne bone fartas.”

“Plej bone, ke vi tuj foriru kun ŝi,” diris lordo Bargrave. “Kaj ne faru ĝin mallerte. Diru, ke vi forestos kelkajn tagojn, kaj tiam grade plilongigu ĝin. Ŝi parolis, vi diras, pri Italujo. Do, ĝi estu Italujo. Forestu ses monatojn.”

“Sed pri mia laboro ĉi tie?”

“Diablo prenu vian laboron ĉi tie! diris lordo Bargrave. “Ĉu vi imagas, ke vi estas nepre bezona ĉi tie? Ĉu vi imagas, ke la Kvin Urboj ne povas iradi sen vi? Nia kasto estas kaduka, mia knabo, kaj viaspecaj malsaĝuloj penas daŭrigi la mizerajn lastajn tagojn de ĝia graveco, prenante sur vin grandajn mienojn en industriaj distriktoj! Via konscienco konstatas al vi, ke tio, kion diras la demagogoj, estas veraĵo—ni ja estas netaŭgulaĉoj sur la supraĵo de la tero, ni ja estas mezepokuloj; kaj vi penadas dronigi vian konsciencon en la bruo de filantropiaj paroladoj. Ne ekzistas en la Kvin Urboj laborulo komune saĝa, kiu en la fundo de sia koro ne taksus vin laŭ via vera valoro—nenio krom homo kun amata ĉevalaĉo, kaj sufiĉego da tempo kaj mono, por ĝin rajdi.”

“Mi ne kunsentas vin,” diris Sir Klaŭd kun digna frosto.

“Jes, vi kunsentas,” diris lordo Bargrave. “Tamen, mi admiras vin, Klaŭd. Mi ne estas mem tiumaniere konstruita, sed mi admiras vin—escepte en rilato al Gertrud’. Jen, kie vi estas malprava—kompreneble el la plej altaj motivoj: kio nur faras ĝin pli malbona. Viro devas ne meti ŝatatajn ĉevalaĉojn pli alte ol la edzino de sia koro. Kaj cetere, ŝi estas unu el *mi*. Do, konduku ŝin for kaj amindumu ŝin.”

“Kaj se mi tion faros? Se almenaŭ mi tion provos? Mi tamen devos rakonti al ŝi!”

“Rakonti al ŝi kion?”

“Ke mi legis la leteron. Mi mensogis al ŝi per ago hodiaŭ posttagmeze. Mi ne povas lasi tiun mensogon staradi inter ni. Tio ne estus prava ago.”

Lordo Bargrave salte ekstaris.

“Klaŭd,” li kriis, “pro ĉielo, ne estu infera azeno. Jen, vi ĵus mirakle evitis unuagradan hejman katastrofon. Vi faris iaspecan konsenton kun Gertrud’. Ŝi regajnis sian prudenton. Kaj nun vi volas fuŝi la tutan aferon per ago idiota! Kio, do, se vi per ago mensogis hodiaŭ posttagmeze? La plej prudenta via ago en la daŭro de jaroj! Lasu resti inter vi tiun mensogon. Esploru ĝin atente ĉiun matenon ĉe via vekiĝo. Ĝi helpos vin eviti en la estonteco la altanimajn erarojn de la tempo pasinta. Ĉu vi vidas?”

III

Kaj en la vestoĉambro de lordino Bargrave, tiun nokton, Gertrud’ konfidenciis al lordino Bargrave.

“Jes,” ŝi diris, “Klaŭd, kiel ŝajnas, eniris malpli ol kvin minutojn post mia foriro—du horojn pli frue ol oni povis supozi. Feliĉe li iris rekte al sia vestejo. Aŭ ĉu eble malfeliĉe? Mi estis veturinta duonon de la vojo al la stacio, kiam mi memoris, ke mi ne algluis la koverton! Vi komprenas, Minjo, ke mi tute nature estis en terure nerva stato. Do mi ordonis al Collins veturigi revenen. Fuĝo, nia nova ĉefservisto, estas treege scivolema, kaj min tro doloris la penso, ke li ĉirkaŭobservadas kaj eble legos tiun leteron antaŭ ol Klaŭd ricevos ĝin. Kaj ĝuste

kiam mi levis la leteron por fermi ĝin, mi aŭdis Klaŭdon en la apuda ĉambro. Ho! neniam en mia tuta vivo mi min sentis tiel strange! La malfeliĉa karulo estis tute malbonsana. Mi premĉifis la leteron kaj iris al li. Kion alian mi povis fari? Kaj efektive li estis tiel laca kaj tiel pala—nu, tio kortuŝis min! Kortuŝis min, mi diras. Kaj, kiam li parolis pri forvojaĝo, subite mi pensis: 'Kial ne provi kun li novan komencon?' Kaj entute . . ."

Sekvis paŭzo.

"Kion vi diris en la letero?" demandis lordino Bargrave.
"Kiel vi esprimis ĝin?"

"Mi tralegos ĝin al vi," diris Gertrud', kaj ŝi prenis la leteron el sia korsaĵo kaj komencis legi ĝin. Ŝi venis ĝis la vortoj: "Mi ne povas toleri tiun ĉi teruran regionon de la Kvin Urboj," kaj tiam ŝi haltis.

"Nu, daŭrigu," lordino Bargrave instigis ŝin.

"Ne," diris Gertrud', kaj ŝi metis la leteron en la fajron.
"La fakto estas," ŝi diris, irante al la seĝo de lordino Bargrave, "ke ĝi estis tro kruela. Mi ne estis realiginta al mi . . . Evidente, mi estis tre ekscitita . . . Oni okaze ekscitas sin . . . Aferoj nun ŝajnas iom ŝanĝitaj . . ." Ŝi ekrigardis sian kunulinon.

"Sed, Gertrud', karulino, vi ploras!"

"Kia hazardo ĝi estis!" murmuris Gertrude en siaj larmoj. "Kia hazardo! Car, vi komprenas, se nur li estus leginta ĝin, neniel mi returnen irus de ĝi. Tia viriĝo mi estas. Sed, kiel nun staras la afero, ekzistas iaspeca espero de iaspeca feliĉeco, ĉu ne?"

"Gertrud'!" Ĝi estis la voĉo de Sir Cloud, afabla kaj dolĉa, ekster la pordo.

"Gardu nin ĉielo!" ekkriis lordino Bargrave. "Jam estas la unua kaj duono. Bargrave nepre jam de longe dormas."

Gertrud' silente kisis ŝin, malfermis la pordon, kaj forlasis ŝin.

JOK-AVENTURA

I

Ĉio sekvanta okazis en unu Foiro de la nomfesto de Sankta Martino en Bursley, antaŭ multaj jaroj, en la kvindek'oj, kiam ĉiuj anoj de la Kvin Urboj senĝene elparolis Bursley kiel "Bozli"; en la tedaj kaj tragediaj malnovaj tempoj, antaŭ ol oni eltrovis, ke la infero estas mito, kaj antaŭ la enkonduko de amuziĝo, aŭ eĉ de liberaj duontagoj. La festo de Sankta Martino estis en tiu tempo tre grava okazo en la jara vivo de la urbo, ĉar en Martinfesto oni fiksas la salajrojn de la potofaristoj por la venonta dekduo da monatoj, kaj la potofaristoj dungigis sin por sama periodo je la plej bona prezo, kiun ili povis ricevi. Eĉ ĝis la nuna tago, la dommastrinoj kutimas kalkuli la iradon de la jaroj laŭ Martinfesto. Ili diras: "Estos sep jaroj, la venontan Martinfeston, de kiam la infaneto de Sanjo mortis pro konvulsioj." Aŭ: "Tiu estis la jaro, kiam pluvigis kaj hajlis tra la tuta Martinfesto." Kaj multe da ili eĉ ne havas ideon, kial ĝi estas Martinfesto, kaj ne Someramezo, aŭ Pentekosto, kiu estas ĉiam sur la pinto de iliaj langoj.

La foiro estis unu el la du grandaj diboĉaj festoj de la jaro: la alia estis la Ŭejks. Kaj konvenis, ke tiel ĝi estu, ĉar ebrieco estas potenca helpo al la sigelado de kontraktoj. Ebriulo volonte kaj brave subskribis paperon kian ajn; kaj subskribo, unufoje farita, restas subskribo. Pro tio la kastore-ĉapelitaj dunguloj ridetis super la ebrieco de la Martinfesto, kaj al ĝi familiare karesbatis la dorson; kaj junaj knaboj drinkinte ruliĝis en la stratan defluilon kun siaj pliaĝuloj, kaj treege fieris pri sia grandfaro. Tiuj heroaj tempoj jam preterpasis, por neniam reveni.

Ĝi estis en la vendredo antaŭ Martinfesto, ĉe la krepusko. En la centro de la urbo, sur la neuzata terpeco norde de la "Buĉistejo" (kiel oni nomis la ŝton-konstruitan vian-dobazon), kaj en la loko inter la Buĉistejo kaj la nova

Urbodomo, ankoraŭ tiam konstruata, la budistoj kaj budaj knabinoj kaj la budaj knaboj estis ornamantaj siajn budojn, kaj preparantaj siajn temanĝojn, kaj trinkigantaj siajn ĉevalojn, kaj polurantaj la latunajn relojn de siaj veturiloj, kaj brostantaj siajn fantaziajn kostumojn, kaj batantaj novajn tendostangetojn en la malmolan teron, kaj ekbruligantaj la unuajn flagrolampojn de la vespero, kaj rakonte babilantaj, kaj kverelantaj kaj lavantaj—ĉio sub la malhela purpura ĉielo, por la amuzo de malgranda amaso de malklopodantoj, grandaj kaj malgrandaj, kiuj staris obstine kun la manoj en la poŝoj aŭ en la manikoj, nenion preterlasante el la edifa spektaklo.

Nu, en la mezo de tio, kio post malpli ol dudek kvar horoj estos la Foiro mem, oni povis vidi strangan kaj frapantan vidaĵon—nome grupon el tri blanke-kravatitaj, larĝĉapelaj sektaj pastroj en serioza interparolo kun dika sinjoro Snaggs, posedanto de la Snaggs'ejo. La Snaggs'ejo estis la loka teatro, ligna konstruaĵo, kiun ĝiaj vizitantoj ordinare nomis la "Sanga Kuvo," pro ĝiaj sangamaj programoj. En tiu ĉi okazo, sinjoro Snaggs kaj la sektaj pastroj estis por unu fojo en interkonsento. Ĉiuj malaprobis certan trajton de la Foiro. Tio ne estis la karuseloj, tiel krudaj, ke eĉ infano de la nuna tempo malestimus ilin. Ĝi ne estis la pafgalerioj, nek la kokosotrafejoj. Ĝi ne estis la prepariĝoj de la biervendistoj, afero terure drinkama. Ĝi ne estis la boksaj budoj, kie aventuramaj junuloj povis senpage lasi frakasi al si la dentojn aŭ enbati la okulojn. Ĝi ne estis la budoj kun monstraĵoj, kie malbonformaj kaj kripligitaj estaĵoj el ambaŭ seksoj estis elmetitaj, plene vivaj kaj preskaŭ plene nudaj, al la rigardo de ĉiu homo kun disponebla penco. Tio, kion malaprobis sinjoro Snaggs kaj la religiaj sektestroj, estis la budoj-teatroj, en kiuj la spegulo, pli-malpli fendita kaj makulita, estis prezentata al la naturo.

La malaprobo de sinjoro Snaggs estis profesia. Li opiniis, ke al li sola apartenas sankcio por provizi dramaĵon al la urbo; li opiniis, ke inter ĉiuj dramprovizistoj li sola estas bontona, kaj tiuj ceteraj estas novevenintoj, subĉasistoj kaj fihomoj. Kaj dum la sektaj pastroj rigardadis la luksan talpan veŝton de sinjoro Snaggs, kaj

aŭskultis lian deklareman, trumpetan voĉon, preskaŭ ili estis konvinkitaj, ke tiu malamata institucio, la teatro, povas fariĝi respektinda, kaj ke sinjoro Snaggs ĝin faris tia. Ĉiuokaze, kompare kun tiuj ĉi parademaj kaj malsolidaj budoj, la Sangokuvo, enradikigita en la antikveco de tridek jaroj, havis dignan, eĉ reputacian aspekton—kaj ĉu sinjoro Snaggs ne prezentis ofte tiun dramon de Kruksank, “La Botelo,” predikon kontraŭ la malabstemio pli impresan ol kiu ajn admono predikata el preĝeja tribunoo? La sektestroj aŭskultis kun respekto, dum sinjoro Snaggs klarigis al ili precize, kion ili devus esti farintaj, kaj kion ili preterlasis fari, por akiri sukceson en sia almlito kontraŭ dramoludado en la Foiro; almlito jam de kelkaj jaroj senfrukta—grandaparte (laŭ famo) pro la sekreta ĵaluzo flanke de la Eklezio Angla.

“Se iu inter vi posedus nur komunan prudenton,” sinjoro Snaggs sentime diris al la pastroj, “vi estus irintaj rekte al la Ĉefa Bejlifo, kaj vi ja estus—Huĥ!” Li faris la apartan voĉan eksonon, kiun tiu ĉi vorto krude prezentas, kaj kraĉis kun abomeno; kaj sen la plej malgranda adiaŭa ceremonio li formarsis peze supren sur la deklivo, lasante nefinita sian frazon.

“Estas rimarkinde, kiel sinjoro Snaggs forkuras antaŭ mia vizaĝo,” diris belsona, vigla, agrabla voĉo malantaŭ la tri pastroj. “Tamen, krom tio, ke en mia nekonvertita tempo mi foje pugne faligis lin de benketo antaŭ lia propra teatro, mi neniam faris al li malutilon, nek deziris al li ion krom bono. . . . Sinjoroj!”

Viro iom malalta, iom maldika, ĉirkaŭ kvardekjara, kun tre malgrandaj piedoj kaj manoj, kaj “tre saltema sur la paŝiloj,” serioze salutis la tri pastrojn.

“Sinjoro Smith!” Unu pastro deteniĝe sin klinis al li.

“Sinjoro Smith!” diris la dua.

“Frato Smith!” diris la tria, kiu estis la propra pastro de Jok Smith, estante la estro de la Bethesda preĝejo en la Vojo Trafalgar, kie Jok Smith asistis, kaj komencis antaŭnelonge predikoficon kiel loka predikisto.

Jok Smith, veget-apotekisto, manpremis kun viveco, sed ankaŭ kun memkonscio. Li estis memkonscia, ĉar li sciis, ke li estas unu ĉefa figuro kaj ĉefa interesaĵo de la urbo, ĉar li bone sciis, ke, li iradu kie ajn, oni rigardegas

lin kaj montras sur lin unu al alia. Kaj li estis duone fiera kaj duone honta pri sia famkonateco.

Jam nun grupeto da infanoj vage sekvis lin kaj, neĝenate de la alestantaj pastroj, ripetadis inter si per mallaŭta, maltima unuтонаĵo :

“Jok-Aventura ! Jok-Aventura !”

II

Li estis la plej juna el dek kvar infanoj, kaj, kiam li atingis la aĝon de unu monato, lia patrino portis lin al la preĝejo, por esti baptita. La paroĥestro estis la fama Rappey, sportulo, kiu (laŭ famo) foje brokantis per la biblio de la preĝejo por aranĝi ursobatalon. Rappey demandis la nomon de la infano, kaj la patrino diris, ke ŝi jam elĉerpis sian konon de propraj nomoj, kaj danke akceptos la komplezon de propono. Ĉe tio, Rappey komencis citi ĉiujn plej absurdajn nomojn el la Biblio, ekzemple Aholibamah, Kenaz, Iram, Baalhanan, Abiasal, Amram, Muŝi, Libni, Nefeg, Abihu. Kaj la patrino ridis, skuante la kapon. Kaj Rappey daŭrigis : Simi, Karmi, Joĥebed. Kaj ĉe Joĥebed la patrino fariĝis histeria pro ridado. “Jok-Aventura” ŝi ridaĉis, kaj Rappey petoleme ligis ŝin al la vorto kaj baptis la infanon Jok-Aventura, antaŭ ol ŝi povis protesti ; do la infano estis por ĉiam sigelita kiel apartulo.

Li pravigis tra la vivo sian nomon. Li forkuris dufoje, kaj estinte laŭvice maristo kaj militisto, li reiris hejmen kun la kapablo svingi razilon, kaj ekloĝadis en Bursley kiel barbiro. Senprokraste li fariĝis la plej fama barbiro en la Kvin Urboj, pro sia parolemo kaj sia boksarto. Estis li, kiu razis la maldekstran vangon de insultema dragona leŭtenanto (post la grandaj tumultoj de 1845, kiujn dumil militistoj ne estis subpremintaĵ), kaj tiam ĵetis lin el la butikoj, ankoraŭ kun la sapa ŝaŭmo, kaj ĝisfine pugnobatalis kun li en la korto de la Hotelo Koko, kaj ĵetis lin tra la porda arkaĵo en la bazaran placon, kun ĝusta duono de imponantaj barbo kaj lipharoj. Estis li, kiu enkondukis en Bursley la tinkturadon de la haroj. La tinkturado de la haroj povus fariĝi ĝenerala en la urbo, se ne okazus, ke en

unu nokto, pro ia konfuziĝo kun ruĝa inko, la sinjoro prezidanto de la Enteriĝa konsilantaro de Bursley eliris de la butikoj de Jok-Aventura kun skarлата kranionnamaĵo, kaj lia atendanta edzino salutis lin sur la trotuaro per la maldolĉaj vortoj: "Vi, malsaĝulo!"

Tom pli poste Jok-Aventura forlasis la barbiran arton kaj sin donis al la muziko, por kiu li ĉiam jam montris grandan kapablecon. Li estis efektive muzikamanto, kaj muzikadis ĉu sur la piano aŭ sur la korneto, ne nur per la manoj aŭ per la buŝo, sed per la tuteco de sia moviĝema esprimoplena korpo. Li gajnis bonan vivrimedon el drink-ejoj kaj tetrinkaj festenoj, ĉar neniu povis ludi la pianon egale kun Jok, ĉu por himnoj, aŭ por dancmuziko. Lia korneto trovis okupon en orkestro ĉe Moorthorne, ministra vilaĝo oriente de Bursley, kaj en siaj noktaj iradoj al Moorthorne kaj revene, kun la amata instrumento, ofte li devis pugnobatali kun la maroderantaj karboministoj, kiuj faris la vojon danĝera por timemuloj. Unu rezultato de tiu rilato kun Moorthorne estis tio, ke oni starigis boksartan klubon en Bursley, kun Jok kiel ĝia estro, por subteni la honoron de Bursley kontraŭ karboministoj el Moorthorne vizitantaj la bazaran placon de Bursley.

Tiam okazis la religia konvertiĝo de Jok, afero vere flamanta, kaj lia forlaso de drinkejoj. Ĉar la tetrinkaj festenoj sole ne sufiĉis al li por vivrimedoj, li komencis novan karieron, sian kvinan aŭ sesan—tiun ĉi fojon kiel veget-apotekisto. Ĝi estis okupo konforma je liaj delikataj manoj kaj lia amego al la homaro. Fine, kaj antaŭ tute nelonge, li estis altiĝinta ĝis la stato de loka predikisto. Liaj du unuaj predikoj entuziasmigis la aŭdantaron, kvankam ne mankis kritikantoj, kiuj kulpigis lin pri teatra maniero. Al li ne mankis okazaj bedaŭrindaĵoj. En tiu ĉi posttagmezo mem de la vendredo antaŭ la Martinfesto, estis okazinta al li bedaŭrindaĵo. Li estis ludanta la pianon en la antaŭprovo de la Granda Ĉiujara Vespera Koncerto de la Viroj Ĥorkantistoj de Bursley. La viroj Ĥorkantistoj de Bursley, decidinte superi rekordojn, estis venigintaj el Manĉestro sopraninon kun alilanda nomo. Ekvidante la maldandan, viglan vireton, kiu devis akompani ŝiajn kantojn, la sopranulino havis unu momenton de terura malkonfido. Sed tuj kiam Jok, post atenta-senzorga

ekrigardo al la muziko, kiun neniam antaŭe li vidis, estis ludinta la unuajn akordojn (kun: "Kiel taŭgas tiu takto, Sinjorino?"), ŝi gajnis konfidon. Ĉe la fino de la kanto, tia estis ŝia admirego al la muzika talento de la loka artisto, ke ŝi desaltis de la estrado kaj simple sed plenkore kisis lin. Ŝi estis dika, impulsema sinjorino. Li ŝatis, ke virino estu dika; kaj la kiso estis agrabla kaj la komplimento senmezura. Sed kia domaĝego, ke loka predikisto kun senedifa pastintaĵo ricevis en plena provprezento kison de sopranino e! Manĉestro! Li sciis, ke li devos transvivi tiun kison, kaj transvivi ankaŭ la kulpigon pri teatra maniero. Jen unu motivo, kaj tre bona, kial li intence serĉis la societeton de pastroj meze de la foira kampo. Li devis gardi sin kontraŭ langoj.

III

"Mi dubas," diris Jok-Aventura al la pastroj, gestante per la manoj kaj paŝtante per siaj malgrandaj, graciaj piedoj, "mi dubas, ĉu mi povas konsili, ke oni malhelpu tiujn dramludajn homojn, gajni vivrimedon; almenaŭ malhelpi ilin per forto."

Li sciis, ke li estas dirinta ion ofendan, kian li tute ne intencis diri, kiam li aliĝis al la grupeto. Li sciis, ke anstataŭ gardi sin, li elmetas sin al danĝero. Sed pri tio li ne zorgis. Kiam, kiel nun, li estis forportata de ia ideo, li zorgis pri nenio. Kaj cetere, li havis la konsciecon, ke li estas pli lerta, pli akrevida, ol kiu ajn el tiuj religiaj estroj, ol kiu ajn en la urbo! Liaj nuraj lerteco kaj disponemo en la vivo estis kondukintaj lin ĉiam sendifekta tra ĉiu ĝenaĵo—ĉu veta bokso aŭ ĉirkaŭbrako de sopranino.

"Stranga doktrino, Frato Smith!" diris la propra pastro de Jok.

La du ceteraj balbute murmuris kaj kunigis la manojn ĉe la fingropintoj.

"Ne!" diris Jok, kun inkliniga rideto. "Anstataŭ peli ilin al malsatego, konduku ilin al la Domo de Dio. Prediku al ili la evangelion, kaj tiam, kiam vi estos predikintaj al ili la evangelion, eble ili propravole ŝanĝos siajn morojn. Aŭ eble ili metos sian dramludadon al la servo de Dio.

Se ekzistas dramoj kontraŭ la drinkmoro, kial ne estus dramoj kontraŭ la diablo kaj *por* Jesuo Kristo, nia benata Reaĉetinto?"

"Bonan tagon al vi, fratoj," diris unu el la pastroj, kaj foriris. Nur tiel li povis esprimi sian abomenon al la sentoj de Jok.

En tiu tempo la ŝtataj kaj sektaj preĝejoj ne estis tiel neplenaj, ke la pastroj devus ĉirkaŭiradi por varbi aŭdantarojn. Aparta benko estis privilegio. Kaj tiuj homoj, kiuj ne utiligis la rimedojn de Difavoro, almenaŭ havis la bonkorecon honti pri sia nefaro. Kaj cetere, vagantajn aktorojn, malgraŭ la admonoj de Johano Wesley, oni ne opiniis saveblaj. La ideo, penadi por ilia forsavo el meritita animperejo, estis tro fantazia por serioza konsidero ĉe seriozaj Kristanoj. Fine, la aludo pri ia komuneco inter Jesuo Kristo kaj scena dramo estis efektive tro terura! Neniu krom Jok-Aventura povus elmeti tian ideon.

"Mi opinias, mia amiko—" komencis la dua restanta pastro.

"Rigardu jenan bonulinon!" kriis Jok-Aventura, interrompante lin per drameca etendo de la dekstra brako, kaj montrante sur unu tre dikan sed belaspektan matronon, kiu, sidante sur tripieda benketo, trankvile senŝeligis terpomojn antaŭ unu budo el la plej gajaspektaj. "Rigardu tiun vizaĝon! Ĉu en ĝi ekzistas nenia virto? Ĉu en ĝi estas nenia espero al animosavo?"

"Ja nenia!" funebre respondis la pastro de Jok. "Tiu virino—ŝia nomo estas Klaŭz—estas fame konata. Ŝi havas ok infanojn, kaj ŝi edukis ĉiujn al sia metio. Mi esploris tiun aferon. La plimaljunaj filinoj estas aktorinoj, kaj edzinoj de aktoroj, kaj eĉ la plej junan infanon oni instruas afektadi sur la sceno. Ŝia trupo estas la plej granda en la Mezlando.

Al Jok-Aventura tiu ĉi sciigo certe venis kiel bato.

"Des pli da motivo," li diris obstine, "por savi ŝin! . . . kaj ĉiujn ŝiajn!"

La du pastroj ne volis, ke ŝi estu savita. Ili preferis rigardi la teatron kiel ion ekster la limo. Ili rememoris la tempon, antaŭ ilia konsekro, kaj poste, kiam ili arde deziris vidi la internon de teatro kaj interpreti ŝultrojn kun pekem-

eco. Kaj faris al ili plezuron la scio, ke ĉiam restas la teatro, kaj ĝia pekemeco, kaj en ĝi la pereintaj animoj .

“Kaj kiel vi volus agi, por savi ŝin, frato?” froste demandis la pastro de Jok.

“Kion mi farus? mi irus kaj invitus ŝin veni al la preĝejo, dimanĉon, ŝin kaj la ŝiajn. Mi invitus ŝin afable, kaj mi iomete ŝercus kun ŝi. Kaj mi pro Difavoro trudus al ŝi la inklinon.

Ambaŭ pastroj ĝemspiris. Unu sama penso estis en iliaj koroj, nome, ke brullignaĵoj forkaptitaj el la fajro (ekzemple, Jok) havas malagrablan inklinon, porti la piecon ĝis la plej absurdaj kaj maloportunaj punktoj.

IV.

“Jen belaj terpomoj, matrono!”

“Jes!” La dika virino, kies trouzita robo ŝajnis en la supra parto subiĝi je forta streĉiĝo, ĵetis al Jok senĝenan ekrigardon, kaj tiam, eble altirita de lia vigla vizaĝesprimo, ridetis kun ia facila amindeco.

“Sed, antaŭ ol ili estos trakuiritaj, via vespermanĝo, mi konjektas, estos malfruiĝinta.”

“Tiu terpomoj tute ne koncernas nian vespermanĝon,” diris sinjorino Klaŭz. Ili estas por la morgaŭa tagmanĝo. Oni ne disponos morgaŭ tempon por senŝeligi terpomojn.” Ŝi vokis per hela krio: “Kezia!”

Gracia knabineto sin montris inter la pezaj kurtenoj de la ĉefa tendo de la karavanejo de sinjorino Klaŭz.

“Konduku ankaŭ Sappiran!”

“Ĉu viaj?” demandis Jok.

“Jes, miaj,” diris sinjorino Klaŭz. “Kaj mi havas ankoraŭ ses, ne enkalkulante genepojn kaj bofilojn.”

“Ne mirige, do, ke vi bezonas tutan sitelon da terpomoj!” diris Jok.

Kezia kaj Sappira montriĝis en la krepusko. Ili havis konjekteble dek ses jarojn kiel sumon de iliaj aĝoj. Ili estis makulitaj, kun haroj malordaj, sed graciaj kaj amindaj.

“Ĉu ĝemeloj?” konjektis Jok.

Sinjorino Klaŭz balancis la kapon. “Nu, do, forportu tiun sitelon! Kaj gardu ne superverŝi la akvon. Jen, Kezia! Prenu la tranĉilon, Kaj alportu al mi la alian sitelon.”

La infanoj forportis la pezan sitelon kin ŝanseliĝantaj paŝoj, fervore obeemaj. Sinjorino Klaŭz levis sian grandegan figuron de la benketo, forskuis ŝelppecojn el la kaŝitaj lokoj de sia senfina antaŭtuko kaj trankvile residiĝis.

“Per fera bastono vi regas ilin, matrono,” diris Jok.

Ŝi ridetis bonhumore kaj levis siajn vastajn ŝultrojn—fizika faro tute ne bagatela.

“Mi tenas ilin vivaj,” ŝi diris. “Estas dek du el ili apartenantaj al mi, krom la du infanetoj. Iu devas zorgi pri ili la tutan tempon.”

“Dume vi ne havas tridek kvin jarojn, mi povas ĵuri!”

“Ne! Vi eraras.”

Sapfira alportis la duan sitelon, svingante ĝin. Deme-tante, ŝi lasis fali ĝian tenilon kun klakado, kaj forkuris.

“Eraras, ĉu vere?” murmuris Jok, kun intereso; kaj, kvazaŭ pro pura sinforĝeso, li renversis la sitelon kaj sidigis sin sur ĝi kun senĝeno, kiu egalas la senĝenecon de sinjorino Klaŭz.

Jam estis preskaŭ mallume. La flagraj lampoj de la budistoj lumis reciproke unu al alia trans la foira kampo; kaj baldaŭ venis juna viro kaj elpendigis unu el ili super la ĉirkaŭrelita perono de la budo de sinjorino Klaŭz; kaj sinjorino Klaŭz skuis la palpebrojn. El malantaŭ la budo alnaĝis la konfuzita babilado de viroj, knabinoj kaj junuloj, kun la plenda voĉo de infaneto. En la spaco de kelkaj jardoj for de sinjorino Klaŭz troviĝis fojna bloko; ĉevaleta sin ŝovis el ie kun ŝajnigita senkulpeco al tiu fojna bloko, singardeme ĝin flaris, kaj tiam komencis mordi el ĝi tufojn. Foje kaj ree laŭta sed mistera krio flugis trans la kampo. La ĉielo estis plena je mistero. Kontraŭ la okcidenta ĉielo elstaris nigre kaj reliefe la silueto de la turo de la nova urbodomu, mirinda konstruaĵo; kaj elstarante el ĝi ĉe unu flanko, montriĝis la figuro de giganta anĝelo. Ĝi estis la ora anĝelo, kiu el la supro de la turo jam de kvindek jaroj staras garde super Bursley, sed kiu en tiu difnita vendredo estis levita ankoraŭ nur du trionojn de la alto de sia fina loĝejo.

Jok-Aventura profunde sentis ĉiujn influojn de tiu sceno, kaj de tiu virino. Li estis unu el viaj romanecaj homoj; kaj por li la virino estis grandioza. Ŝia grandiozo estis vibriga.

“Kaj kion vi intencas diri?” ŝi demandis lin, konjekteme. “Sidante sur mia sitelo!”

Nu, konjektema demando estis por Jok rekta spito.

“Sidante sur via sitelo, matrono,” li respondis, “mi havas la intencon diri, ke vi estas multe tro belaspekta virino, por ke vi malsupreniru en la inferon en eterna pereco.”

Ŝi estis surprizita. Sed ŝia profesio estis instruinta al ŝi la arton de rapida restariĝo.

“Vi apartenas al tiu aro Metodista,” ŝi rediris kun moka mildeco. “Sajnas al mi, ke mi vidis vin parolanta kun la blankaj sufokiloj.”

“Mi apartenas al ili,” diris Jok.

“Kaj sendube vi opinias vin tre lerta.”

“Nu,” li konfesis, “mi povas splisi ŝnuregon, razi kapon, kuraci verukon aŭ furunkon, kaj rimarki belaspektan virinon egale bone kun kiu ajn viro en tiu ĉi urbo; por ne paroli pri la boksarto, kiun mi forlasis pro mia religio.”

“Mi ja estis belaspekta antaŭtempe,” diris sinjorino Klaŭz, kun ŝajna, sed ne efektiva, nekonsekvenco. “Sed iel mi tute fariĝis grasa. En antaŭa tempo, mi ludis la rolon de Porcia. Sed nuntempe apenaŭ mi taŭgas por Maria Martin aŭ Belladonna.”

“Grasa!” protestis Jok. “Ĉu grasa? Nu, mi ne lasus forpreni de vi eĉ unu unkon, por kvindek gineoj.”

Tiel entuziasma li estis, ke sinjorino Klaŭz ruĝiĝis.

“Kia parolo estas tiu, pri la infera fajro?” ŝi demandis. “Mi ofte pensas pri ĝi— Mi estas soleca virino, kaj mi ofte pripensas ĝin.”

“Vi, soleca?” denove protestis Jok. “Kun tuta tiu aro da infanoj?”

“Jes!”

Sekvis silento.

“Atentu vi nun, matrono!” li eksplodis, salte levigante de sur la sitelo. “Vi devas veni al la Bethesda preĝejo, tie malsupre, dimanĉon matene, kaj aŭskulti la vorton de Dio. Ĝi estos por vi bonkriza okazo.”

Sinjorino Klaŭz skuis la kapon.

“Ne!”

“Konduku ankaŭ viajn infanojn,” li persistis.

“Se estus vi, kiu okaze estos la predikanto!” ŝi diris, flanken rigardante.

“Estas mi, kiu efektive predikos,” li respondis laŭte kaj fiere, “Kaj mi konkurse predikus kontraŭ kiu ajn loĝanto de tiu ĉi urbo, pro dolara monero !”

Jok estis iom fuŝanta sian rolon : tia bedaŭrindaĵo ofte okazis al li.

V

La preĝejo Bethesda estis dense plenigita, dimanĉon matene ; parte pro tio, ke estis Martinfesta dimanĉo, kaj cetera ĉar Jok Aventura estos la predikanto. La fakto, ke Jok estis difinita sur la “plano” (viclisto de la predikantoj) por paroladi en la ĉefa loka preĝejo de la Ligo en festo tiel grava, montris kiel eksterordinaran progreson li jam faris en la estimo de tiu malgranda publiko da spertuloj, kiu helpis la pastron aranĝi sian kvaronjaron planon. Ĉe la pli vasta publiko, lia akcepto estis senduba. Ĉirkaŭ dek ses centoj el tiu pli vasta publiko estis kunpakintaj sin en la preĝejon, kaj ne estis unu neokupita loko, ĉu sur la teretaĝo, aŭ en la galerioj. Eĉ la “orkestro” (kiel la ‘horista benko” estis tiam nomata) havis vizitantojn krom la ĥoristaro kaj la kontraŭbasistoj. Kaj eĉ ne unu fenestro estis malfermita. En tiu tempo, ankoraŭ ne estis okazinta al la homoj supozoj, ke freŝa aero ne estas minaco por la vivo. La tuta alestantara estis malseke varma, kaj trovanta ĝin agrabla ; ĉar en ia strange subtila maniero ŝajnis kvazaŭ la ŝvitado iel helpas al la religia emocio. Dudekoj da virinoj estis ventumantaj sin ; kaj inter tiuj estis unu tre dika peonia-vizaĝa virino, ĉirkaŭ kvardek-jara, en robo parade flava kaj kun kufo ruĝa-kaj-nigra. Sub unu brako ŝi havis grandan knabon kaj knabineton, kaj sub la alia brako, grandan knabon kaj knabineton. La pompo de tiu grupeto ŝajnis ne tute akordi kun la malriĉo de la “Senpagaj Benkoj,” kien unu el la deĵorantoj ĝin estis kondukinta.

En la predika tribuno, kontrolante ĉion, estis Jok-Aventura, kiu ŝvitis kiel la ceteraj. Li prezentis aspekton iom noblan en sia vestaĵo el luksa nigra drapo, tiel malsimila je lia senzorga, trouzita kostumo de nedimanĉaj tagoj. Liaj okuloj brilis, la brako estis levita kun gesto deviga. Dum paŭzo efekta li per la maldekstra mano levis glason kaj trinkis preneton da akvo. Tio estis signo, ke li jam venis al

sia parolada resumo. Liaj resumoj estis famaj. Kaj en tiu ĉi mateno ĉiuj sentis, kaj li mem sciis, ke lia nuna resumo devas superi ĉiujn pasintajn. Lia temo estis la venonta kolerego, kaj la efemera kvalito de la homa vivo sur la tero. "Jes," li anoncis, per grade kreskanta tondro, "ĉio pereos.

*Kaj, kiel la senŝtofa teksitaĵo
de la vizio, nubkronitaj turoj,
palacoj luksaj kaj solenaj temploj,
la vasta globo mem,—*

Jes, mi diras al vi—

*jes, kaj la tuta
heredantaro ĝia dissolviĝos,
kaj, kiel la paĝento forvelkinta,
postlasos eĉ ne unu rompitaĵon."*

Lia voĉo estis mallaŭtiginta por la finaj vortoj. Post drameca silento, li faris finon, per voĉo preskaŭ frustranta, kaj kun levitaj brovoj kaj fiksa rigardego rekte al la vasta virino kun la flava robo :

*"El songa ŝtofo estas ni faritaj ;
per dormo estas ĉirkaŭlimigita
malvasta nia vivo.*

La bona Dio kompatu nin. Himno kvarcent-kvardek-dua."

La efekto estis imponega. Viroj ĝemspiris kaj virinoj ekploris pro senŝarĝo post la streĉo. Jok estis oratoro ; li posedis la potencon de oratoro. Bone li sciis, kaj bone ili sciis ĉiuj, ke nenia profesia predikisto en la Kvin Urboj povus influi sur aŭdantaron egale kun li. Ĉar, kiam Jok estis stimulita, preskaŭ vi povis vidi la ondojn de emocio bloviĝi trans la levitaj vizaĝoj de liaj aŭskultantoj, kiel ondoj trans grenkampo en venta tago.

Kaj en tiu ĉi mateno li estis stimulita.

VI

Sed en la vestejo post la Diservo li rekontis malamikojn, en la formo kaj personoj de la preĝeja administranto kaj la rondoserva administranto, sinjoroj Brett kaj Hanks respektive. Ambaŭ tiuj gravaj oficistoj estis lokaj predikistoj, sed, malfeliĉe, ilia pieco ne evitigis al ili la detruan senton de la ĵaluzo. Neniu el la du povis stimuli aŭdantaron, nek eĉ plenigi vilaĝan preĝejon.

“Frato Smith,” diris Jabez Hanks, fermante la pordon de la vestejo. Li estis altkreska viro kun longa grizeta barbo, kaj sen lipharoj. “Frato Smith, la spirito pelas min kaj jenan mian fraton, ke ni metu al vi demandon.”

“Metu!” diris Jok.

“Ĉu tiuj vortoj estis viaj propraj—pri nube-kronitaj turoj kaj senŝtofaj teksitaĵoj kaj tiel plu? Mi en ĝentileco vin demandas.”

“Kaj mi en ĝentileco vin respondas: ili estis miaj propraj,” Jok respondis.

“Ĉar mi havas ĉi tie,” diris Jabez Hanks, malice, verkon de Dod: *Satindaĵoj el Shakespeare*, en kiu mi trovas tiujn samajn vortojn mem, ĉerpitajn el scena dramo nomata *The Tempest*.”

Jok iomete paliĝis, kiam Jabez Hanks malfermis la volumon.

“Tre povas esti, ke ili estas ankaŭ la vortoj de Shakespeare,” diris Jok facilanime.

“Antaŭ du semajnoj, en la Moorthorne’a preĝejo, mi suspektis ĝin,” diris Jabez.

“Vi suspektis, kion?”

“Mi suspektis vin, ke vi citas el Shakespeare en niaj predikaj tribunoj.”

“Kaj ĉu homo ne povas fari citaton en prediko? Nu, Jabez Hanks, mi aŭdis vin citi el Matthew Henry, klafton post klafto.”

“Neniam vi aŭdis min citi el scena dramo en preĝeja tribuno, Frato Smith,” diris Jabez Hanks kun majesto. “Kaj tiel longe dum mi estos rondoserva administranto, oni ne toleros ĝin en tiu ĉi preĝejo.”

“Ĉu efektive ne?” intermetis Jok, spite.

“Ĝi estas profanaĵo de la templo de la Sinjoro; jen, kio ĝi estas!” daŭrigis Jabez Hanks. “Vi ŝajnigas, kvazaŭ vi malaprobas la scenajn dramojn en la Foiro; kaj vi venas ĉi tien kaj deklamaĉas ilin en Kristana tribuno. Vi malŝati scenajn dramojn! Ĉu oni ne vidis vin parolanta horon post horo kun unu el tiuj virinaĉoj, vendredon nokte—? Kaj ĉu oni ne vidis vin, lastan nokton, subrigardanta tra la tenkurteno? Kaj nun—”

“Nun, kio?” demandis Jok paŝante al Jabez sur siaj risortaj piedoj kaj rigardante supren al la granda altkresko de Jabez.

Jabez prenis spiron. “Nun vi kondukas viajn ŝatatajn firvinojn en la domon de Dio! Vi—servanto de Kristo, vi—”

Jok-Aventura interrompis la frazon per sia multimema pugno, kiu ŝajnis levi Jabez'on per la mentono for de la planko, kaj tiam lasi lin fali en ŝutamaso, kvazaŭ lia vestejo estus sako enhavanta apartajn ostojn.

“Bonan tagon al ci, Frato Brett,” diris Jok, etendante la manon al sia ĉapelo, kal li foriris fermjetante la pordon de la vestejo.

Li eliris ĉe la malantaŭo de la preĝejo, kaj tra flankaleoj li atingis la straton Aboukir, tra kiu li promenis kun brava ŝajnigo de trankvilo, ĝis la angulo de la vojo Trafalgar, kie staris kaj ankoraŭ staras la granda Hotelo Drako. La aŭdantaroj de kelkaj preĝejoj estis malrapide disigantaj en la ĉirkaŭo de tiu fama stratangulo, kaj Jok devis saluti kelkajn el sia propra aŭdintaro. Tiam subite li ekvidis sinjorinon Klaŭz kaj ŝiajn kvar gefilojn enirantajn la drink-salonan pordon de la Drako.

Unu momenton li hezitis, tiam li sekvis la diverskoloran ŝipareton.

La drinksalono estis iom plena de gehomoj. Sed el ili ĉiuj, nur Jok kaj sinjorino Klaŭz kaj ŝiaj gefiloj estis vizitintaj preĝejon, ĉu ŝtatan aŭ sektan.

“Jen la predik-sinjoro, patrino!” flustris Kezia, ruĝigante, al sinjorino Klaŭz.

“He!” diris sinjorino Klaŭz, sin turnante tre aminde. “Ne povas esti vi, sinjoro! Estis tiel varmege en tiu preĝejo, ke ni ĉiuj mortas de soifo . . . Kvar glasetojn kaj duonkvarton, mi petas!” (Tion ĉi al la kelnero).

“Kaj donu al mi duonkvarton,” diris Jok, en ekstremo.

Ĉiuj sidigis familiare. Ke unu patrino kondukus siajn gefilojn en drinkejon kaj regalus ilin per biero, kaj tio en dimanĉo el ĉiuj tagoj, kaj tuj post prediko! Ke loka predikisto irus rekte el la preĝeja vestejo al la ĝina palaco, kaj tie trinkus bieron kun vaganta aktorino! Jen fenomenoj simple kaj tute nepripenseblaj! Kaj tamen Jok ĉeestis en ili, partoprenis en ili, eĉ efektive ludis rolon

en ili! Kaj malgraŭ ŝiaj malkonvenaĵoj, sinjorino Klaŭz ankoraŭ prezentigis al li kiel tre agrabla, deca, bonkora, patrineca virino—tute aparte de ŝia belaspekto. Kaj ŝia idaro, ĉiu nun kaŝita malsupre de la okuloj post pokalo, estis tre bonkondata aro da infanoj.

“Ĝi faras al mi bonon,” diris sinjorino Klaŭz, post trinkopreno, “kaj vi bezonas ion por subteni vin en tiu ĉi tempo. Ni prezentis *Belphegor* kaj *La Sorĉistino* kaj arlekenaĵon lastan nokton. Kaj neniu el tiuj ĉi infanoj enlitigis antaŭ la duono post la noktomezo. Sed mi firme decidis, ke ili iru al la preĝejo hodiaŭ matene. Kaj mi tute ne bedaŭras, ke mi iris! He, sinjoro, kiel bonege vi rolus kiel Virginius! Neniam mi aŭdis tielan predikadon—ne por diri, ke mi iam multe aŭdis da ĝi!”

“Kaj jam neniam vi aŭdos tielan, matrono,” diris Jok, “ĉar mi jam predikis por la lasta fojo.”

“Ne, ne!” protestis sinjorino Klaŭz.

“Mi ja predikis por la lasta fojo,” Jok ripetis. “Kaj se, tion farante, mi savis unu animon, matrono . . . !” Li fikse rigardis ŝin kaj tiam trinkis.

“Mi ne volas diri, ke vi ne faris tion,” diris sinjorino Klaŭz, kun mallevitaj okuloj.

VII

Post iom malpli ol unu semajno, en mallumiganta nokto, karoso* elveturis el la urbo Bursley laŭ la vojo Moorthorne survoje al Axe-in-the-Moors, patrinurbo de la sovaĝaj stepoj, kiuj stranĉas la nordan Staffordshire de Derbyshire. Tiu karoso estis la lasta el la karavano de sinjorino Klaŭz, kaj preskaŭ la laste forveturinta el la Foiro. Pro la popola interesiĝo rilate al okazaĵoj en la publika kariero de Jok-Aventura, kiuj estis iel implikintaj sinjorinon Klaŭz en siajn maŝojn, la budo de sinjorino Klaŭz estis sukcesinta en pligranda mezuro ol ĉiu alia budo, kaj restinta malferme ĝis pli malfrua horo, kaj bruliginta plimulte da nafto, kaj enspezinta multe pli da mono. La ceteraj karosoj de la entreprenaĵo de la dika sinjorino (estis entute

* France *carrosse*, kvar-rada kovrita veturilo. Simila vorto troviĝas en la germana, itala, kaj hispana lingvoj.

tri) estis jam antaŭen forveturintaj kun ĉiuj ŝiaj pliaĝaj gefiloj kaj bogefiloj kaj genepoj, kaj kun la pezaj trabaĵo kaj kanvaso de la budo. Sinjorino Klaŭz, kiu kutimadis fari mem siajn negocojn, ĉiam senescepte veturis la lasta el sia procesio el ia urbo; kaj en fojoj, ŝia senklopoda maniero saldi kun la aŭtoritatuloj pro akvo, kampopeco kaj aliaj necesaj oportunaĵoj, lasis ŝin kelkajn mejlojn malantaŭ ŝia tribo.

La karoso de la mastrino, kvankam ne komparinda kun la luksaj veturiloj, kiujn la hodiaŭaj foiristoj metas sur la vojon, estis vasta kaj dignece specimeno, kaj eble la plej bona tiam akirebla per mono. La antaŭa parto konsistis el saloneto kaj kuirejo en unu ĉambreto, kaj dormejo troviĝis en la posta parto. En tiu dormejo Kezia, Sappira kaj la plej juna ilia frateto profunde dormis. En la saloneto-kuirejo sidis sinjorino Klaŭz, varme ĉirkaŭvolvita, tenante la gvidrimenojn per la dekstra mano, kaj per la maldekstra, ĉifitan, papere binditan libron. Tiu libro estis la fama dramo, *La Hazardisto*, kaj sinjorino Klaŭz estis studanta en ĝi la rolon de Dulcibel. Neniel ĝi estis tia rolo, por kiu sinjorino Klaŭz fizike taŭgus; sed ŝia produktema filino, Hefziba, al kiu ĝi apartenis laŭ kutima rajto, tute ne povis plu ludi ĝin, kaj cetere ŝi estos por almenaŭ unu monato nekapabla por ĉia rolo. Kaj la sezono ankoraŭ ne estis finita; ĉar la homoj en tiu tempo estis pli harditaj.

La rimenoj etendiĝis el la senzorga mano de sinjorino Klaŭz kaj malaperis inter la du klapoj de la pordo, kiuj estis fiksitaj iomete nefermite. La rigardo de sinjorino Klaŭz, penetrante de fojo al fojo tra la fendo, povis vidi la lanternajn radiojn sur la flanko de ĉevalo. La solaj sonoj estis la hufbatoj de la ĉevalo, la pista sono de la radoj sur la malseka vojo, la okaza tintado de ujo en la tenbretoj, kiam la karoso forte detrafis en sulkon, kaj la konstanta murmurado de la voĉo de sinjorino Klaŭz antaŭprovanta la ŝvelparolecon de la rolo de Dulcibel.

Kaj tiam estiĝis plua sono, kiun sinjorino Klaŭz ne rimarkis, ĝis ĝia kelkfoja ripetigo: la voko de homa voĉo ekstere sur la vojo:

“Matrono!”

Ŝi vaste malfermis la pordetojn de la karoso kaj singarde elrigardis. Nature, fatale, Jok-Aventura estis paŝeganta tie flanke, egalbruste je la ĉevala vosto! Li paŝis vigle—li estis bona piediranto—sed tamen lia spirado estis mallonga kaj rapida, ĉar li ĵus penadis supren sur iom kruta deklivo, por ĝisveni la karoson. Kaj li portis en siaj manoj rul-pakaĵon kaj bastonon, kaj sur la kapo belegan sed pezan kastoran ĉapelon.

“Mi iras en via direkto, matrono,” diris Jok.

“Tiel ŝajnas,” konsentis sinjorino Klaŭz kun deca singardemo.

“Ĉu vi disponas por mi helpan veturon?” li demandis.

“Tre volonte,” ŝi diris, kaj ŝia vizaĝo ŝanĝiĝis kun fulma rapido, konforme al ŝiaj vortoj.

“Ne! vi ne devas halti,” kriis Jok.

En momento li estis facile saltinta en la karoson kaj jam sidis tie interne flanke de ŝi sur la benketo por la infanoj.

“Jen kia ĉapelo—por vojaĝadi!” rimarkis sinjorino Klaŭz.

Jok deprenis la ĉapelon, observis ĝin ŝatege, kaj remetis ĝin.

“Mi ne povus ĝin postlasi,” li diris, kun spirego, kaj daŭrigis rapide, kun ŝanĝita tono: “Matrono, ni nin renkontadis iom multe dum la pasinta semajno, kaj tamen vi forglitas ĉitiele, ne adiaŭinte, nek dirinte unu vorton pri via animo!”

Sinjorino Klaŭz ŝvelmovis sian vastan bruston kaj skuis la gvidrimenojn.

“Miatempe mi havis mian porcion da zorgoj,” ŝi rimarkis, mistere.

“Diru al mi pri tio, matrono!”

Kaj, jen, post momento, allogate de lia rideto, ŝi estis parolanta al li tute intime pri la malsanetoj de siaj plijunaj infanoj, pri la petolaj aventuroj de sia fraŭla filino dekvin-jara, la malafabla sintenado de unu el siaj bofiloj, la burĝonanta malhonesteco de la alia, la danĝeroj de la infaneca vivo, kaj la neceso repentrigi la grandan karoson kaj akiri novajn pentraĵojn por la fasado de la teatra budo. Fakte, pri ĉiuj zorgaĵoj de unu reĝino de la vojoj!

“Kaj mi estas tiel grasa !” ŝi diris, “kaj tamen ankoraŭ mi ne estas kvardekjara, nur post du jaroj—kaj mi estas avino !”

“Mi divenis ĝin !” ekkriis Jok.

“Se mi ne estus tia amaso de karno—”

“Vi ja estas la plej ĉarma amaso de karno, kiun mi iam ekrigardis, kaj tion mi certigas al vi !” Jok intermetis.

VIII

Tiam estiĝis konsternaj sonoj ekstere en la mondo ekster la karoso. La ĉevalo haltis. La du klapoj de la pordo estis forte malfermitaj de ekstere, kaj nigra figuro, kun blankaj okuloj en nigra vizaĝo, okupis la pordon. La karoso estis trapasinta la minejan vilaĝon Moorthorne, kaj tiu figuro estis unu el la maroderaj karbministoj en ĝia ĉirkaŭaĵo. Kiam la karbministoj havis noktan aferon de survoja rabo, ili ne ĝenis sin lavi siajn vizaĝojn post sia laboro. La karba polvo estis efektiva helpo por ili, ĉar ĝi donis al ili tre oportunan similecon al satano.

Jok-Aventura salte leviĝis, kvazaŭ pelegite el katapulto.*

“Ĉu estas vi, Jok ?” ekkriis la karbministo, mirigite.

“Jes, mia knabo !” diris Jok, abrupte.

Kaj li ekliveris al la karbministo pugnoboton sub la mentono, kiu ĵetpelis lin en la noktan mallumon. Sonis aliaj voĉoj sur la vojo. Jok sin ĵetis al la pordo, kaptante pistolon el sia poŝo. Kaj sinjorino Klaŭz, tute tremante kiel gelatena pudingo, aŭdis pafojn. La ĉevalo ekkuregis galope. La gvidrimenoj forglitis el la manoj de la mastrino, sed Jok savis ilin kaj per iliaj liberaj finoj vipis la ĉevalon en pli grandan rapidon.

“Mi savis vin, matrono !” li diris pli poste. “Mi regalas al li ordan levbaton sur la glutilo, same kiel mi faris al Jabez, dimanĉon. Sed kiaspeca prudento estas, ke soleca virino vagas sur mallumaj ĉefvojoj en la nokto kun areto da infanoj ? . . . Tiuj infanoj dermus tra la batalo ĉe Trafalgar,” li aldiris.

Sinjorino Klaŭz ploris.

* Latine *catapulta*, speco de pafarko por ĵeti lancon.

“Vi prave ĝin diras!” ŝi murmuris. “Kaj tio ne estas la unua fojo, ke oni atakis min!”

“Vi estas nenio krom knabino, malgraŭ via karno kaj viaj genepoj!” diris Jok. “Sekigu viajn okulojn, aŭ mi mem ilin sekigos al vi!”

Ŝi ridetis tra siaj larmoj. Ĝi estis invito al li, plenumi sian minacon.

Kaj dum li sekigis al ŝi la okulojn, ŝi demandis :

“Kiom da vojo vi intencas? Ĉu ĝis Axe?”

“Jes, kaj ankoraŭ plu! Ĉu mi kapablas kiel aktoro, mi demandas vin? Ĉu mi povas batali, mi demandas vin? Ĉu vi taŭgas sen mi, mi demandas vin, vi, soleca virino? Kaj pri via animo, kies savo estas mia devo?”

“Sed pri via entreprenaĵo en Bursley?”

“Jen mia rulpakaĵo,” li diris, “kaj jen mia festa ĉapelo. Kaj mi havas monon kaj pistolon en mia poŝo. La sola objekto, kiun mi tute forgesis, estas mia korneto; sed mi lasos ĝin sendi, kaj mi ludos ĝin ĉe mia edziĝo. Mi estas Jok-Aventura.”

Kaj dum la karoso tondre iradis en la nokta mallumo tra la senkultura kaj sovaĝa stepo, kaj dum la infanoj profunde dormis en la malantaŭa parto de la karoso, kaj dum la potaro maltrankvile klakadis en la tenbretoj, kaj la lanterno swingiĝadis, kaj dum li tenis la gvidrimenojn, la maldika, fleksiĝema, griziĝanta viro iel sukcesis ĉirkaŭbraki la vastan, amindan estaĵon, kiun li sopiris, kaj la karoso fariĝis perilo de la alta romaneco.

LA HEROECO DE TOMASO CHADWICK

I

“Ĉu vi aŭdis pri Toĉjo Ĉadŭik?” unu babilanto demandis al alia en Bursley.

“Ne.”

“Li nun estas tram-konduktoro.”

Tiu ĉi sciigo kaŭzis miron, kiel intencite, kaj la vizaĝesprimoj de ambaŭ babiluloj montris agrablan scivolon pri tio, kion konjekteble Toĉjo Chadwick [elparolu: *ĉadŭik*] plej baldaŭ faros.

Tomaso Chadwick estis “famulo” en la Kvin Urboj, kaj de speco iom malofta. La “famuloj” en la Kvin Urboj estas ordinare tre malafablaj aŭ tre bonhumoraj, ĉu eksterordinare ruzemaj aŭ eksterordinare naivaj; kaj plej ĝenerale laŭ sia ekstera aspekto ili estas nekonformaj je la modo. Ne tia estis Chadwick. Li estis viro ĉirkaŭ kvindekjara, solidaspekta kaj digneza, kun oficialula sintenado. En sia juneco li estis policano, kaj neniam poste li ĉesis havi la aspekton de policano en privata vestaĵo. La aŭtoritata mieno rifuzis foriĝi de lia vizaĝo. Tamen, sub tiu mieno, nemultaj viroj (egale bonkreskaj) estus malpli kapablaj aŭtoritate agi, ol Chadwick. Li estis, fundamente, malfortulo. Tion li sciis mem, kaj ĉiuj ĝin sciis. Li ekzigis el la polico pro tio, ke li opiniis la streĉon ekster liaj fortoj. Li havis la korpan hardecon de azenino kun la trankvila, terura apetito de elefanto; sed li insistis, ke nokta deĵorado en Januaro estas por li tro forta streĉo. Li havis tiam dudek sep jarojn, kun edzino kaj du malgrandaj knabinoj. Li formetis la uniformon kun digneco. Ĉion li faris kun digneco. Li serĉis okupon kun digneco, vidis sian edzinon kaj siajn infanojn malsati, kun digneco, kaj eĉ mem suferis mizeron kun digneco. Li senĉese plidikiĝis, grasiĝante per malbona fortune. Kaj—plua kuriozaĵo—li ĉiam povis aperigi, laŭ konveneco, freŝan kompletan vestaĵon el malhele

blua luksa drapo, puran kolumon kaj galanterian kravaton. Li ne estis ĉiama dando, sed li povis esti dando laŭ sia bontrovo.

Kompreneble, li ne havis metion. La mana lerteco de policano ne valoras ekster la polico. Oni ne povas vendi ĝin en aliaj negoĉejoj. Oni diris, ke Chadwick estis malsaĝulo, laŝante la policon. Tia li ja estis; sed li estis majesta kaj digna malsaĝulo en sia sencela malsaĝo. Tio, kion li deziris, estis ofico de konfido, loko kie oni nenion postulos de li krom mieno de solideco, majesteco kaj neaĉetebleco. Tiaj lokoj ne estas facile troveblaj. La dungantoj ne malŝatis la solidecon, majestecon kaj neaĉeteblecon, sed ili postulis ordinare ion pluan por kontrakta kontentigaĵo. La unua ofico de Chadwick, post lia eksigo el la polico, estis tiu de noktogardisto en potfabrikejo apud la kanalo en Shawport. Li akceptis ĝin kun bedaŭro, kaj li persiste rifuzis rimarki la ironion de la sorto, kiu trudis tian oficon al homo kun konsciencia malŝato al nokta deĵorado. Tiun oficon li ne longe plenumis, kaj li tenis en profunda sekreto siajn motivojn por ĝin forlasi. Kelkaj homoj diris, ke lia natura inklino por dormi en la nokto renkontis la malaprobon de lia mastro.

Tiam poste li subiĝis al unu transformiĝo post alia, konkure superante la legendan hameleonon. Li estis tabakvendisto, parkogardisto, kolektisto de lupagoj, procenta aferisto, komizo, denove komizo, ankoraŭ plue komizo, vendisto de sukeraĵoj, negocisto por fritita fiŝaĵo, karba agento, libra agento, helpanto al brokantisto, hund-edukisto, pordisto, gardisto de ŝtata lernejo, preĝeja gardisto, turnpordisto por futbalaj ludoj, veturigisto, ĉaristo, provizeja laboristo, kaj forpelisto de kanajloj en la Imperia Muzikhalo en Hanbridge. Sed li nenion tenis longe. Liaj klarigoj pri siaj ŝanĝoj estis senescepte neklaraj, nekapteblaj. Kaj lia digneo restis sendifekta, same kiel lia luksa drapaĵo. Li havis dignecon ne sole por si mem, sed sufiĉon superrestantan por ornami la okupon, kiun en la momento okazis al li praktiki. Li estis dignece en la vendado de sukerbuloj; kaj precipe en renkontiĝoj kun siaj kreditoroj; kaj lia majesta sintenado, kiam mankis al li ofico, estis modelo por ĉiu nedungito.

Plue, li estis ĉiam kolono kaj subtenanto de la aŭtoritatoj. Li adoris la ordon, speciale la malnovan, kaj la riĉecon kaj la konvenecon. Li estis ĉiam partiano de la forto kontraŭ la malforto, krom tio se okaze la malforta partio estis antikva institucio; kaj tiam li subtenis ĝin kun la tuta forto de siaj konvinkoj. Ne bezonas diri, ke li estis tre vigla politikulo. Eble la aktiveco de lia politiko iel rilatis kun la ofteco de liaj transformiĝoj—ĉar li ĉiam nepre tenis sian iom spektaklan individuecon; li ĉiam nepre pretendis la posedon de sia animo, kaj de neniu li volis kviete akcepti parolbaton.

Kaj nun li estis tram-konduktoro. Ĝis tia ekstremo li estis veninta.

En la malnovaj tagoj de la vaporaj tramoj, kiam estis nur ĉirkaŭ dudek tram-konduktoroj kaj ok mejloj da tramvojo en la tutaĵo de la Kvin Urboj, la profesio de tram-konduktoro ankoraŭ permesis ian individuecon, kaj konduktoro estis io krom simpla numero. Sed post kiam la Brita Elektra Veturiga Kompanio sin trudis al la Kvin Urboj kaj formis lokan filian kompanion, kaj konstruis kelkdekojn da mejloj de novaj vojoj, kaj elektrigis ĉion, kaj altigis la prezojn, kaj eksigis la periodajn biletojn, kaj akcelis la servojn, kaj konstruis centojn da vagonoj, kaj dungis centojn da konduktoroj—post tio la tram-konduktoro estis nenio krom nehoma aŭtomato en vasta maŝinsimila organizaĵo. Kaj la pasaĝeroj jam ne havis siajn preferatajn konduktorojn.

Sed ĝuste ĉe Tomaso Chadwick la babiluloj ne vidis nehoman aŭtomaton por trastampi biletojn kaj sonigi sonorilojn kaj kriaĉi stratajn nomojn. Li neniam estis intencita de la naturo por esti parto de ia sistemo. Babiluloj esperis al la plej bona. La fakto, ke Chadwick en sia aĝo kaj kun tia zonmezuro povis en situacio ekstrema ricevi konduktoran oficon, pruvis, ke li povis influi en altaj rondoj. Plue, li estis difinita kiel konduktoro de unu el du tram-vagonoj, kiuj kursadis sur malgranda branĉlinio inter Bursley kaj Moorthorne, tiel ke por la vilaĝo Moorthorne li estis ankoraŭ persono, kaj la ŝanco estis ĝuste unu el ĉiu du, ke homoj tramveturantaj el aŭ al Moorthorne, faris tion sub la majesta flugilo de Tomaso Chadwick. Lia

maniero ĉe la malhaltigo de vagono estis unika kaj imponeganta. Preskaŭ ŝajnis kvazaŭ li signalas "plenrapide antaŭen" el sur la ponto de atlanta linia ŝipego.

II

La deĵoraj horoj de Chadwick, surŝipe de sia atlanta liniulo, estis tiel longaj, ke ili metis grandan malhelpon ne sole al lia libera tempo, sed ankaŭ al lia politika aktiveco. Kaj tio ĝenis lin des pli multe pro tio, ke en tiu tempo la loka politiko en la Kvin Urboj estis treege senripoza kaj interesa. Homoj fariĝis politikuloj, kiuj neniam antaŭe estis politikemaj. La demando staris jene, ĉu la Kvin Urboj, jam praktike unu urbo, devis fariĝi ankaŭ teorie unu urbo—fakte la dekunua el la plej grandaj urboj en la Unuigita Regno! Kaj la regiono estis dividita inter la Federaciuloj kaj la Kontraŭfederaciuloj. Chadwick estis laŭ konvinko Kontraŭulo. Chadwick, kun multaj aliaj, montris sur la historion de Bursley, "la patrino de la Kvin Urboj," kiu historio etendiĝis tra pli ol mil jaroj; kaj li demandis ĉu la "malnova Bursley" devis perdi sian individuecon nur pro tio, ke Hanbrdige ĝin estis senhonte superkreskinta. Voĉdonado pri la afero estis baldaŭ farota, kaj sentoj fariĝis pli varmaj kun ĉiu tago, kaj kokardoj malsame koloraj floris pli kaj pli oftaj sur la stratoj ĝis tio, ke nenio krom forta ĝentileca sento detenis la anojn de la kontraŭaj partioj, ke ili ne rompu unu al alia la nazojn sur la placo Sankta Luko.

Nu, en certa marda posttagmezo en la printempo, la tramvagono de Toĉjo Chadwick staris atende, kontraŭ la Konservativula Klubo, por ekveturi al Moorthorne. Kaj Toĉjo Chadwick staris en sia plena solideco sur la peroneto. La veturigisto, simpla nepersono, kompreneble estis ĉe la antaŭo de la veturilo. La veturigisto regis la potencon, sed li ne povis ĝin uzi antaŭ ol Toĉjo Chadwick donos al li permeson; kaj la imperiestra sintenado de Toĉjo iel ŝajnis konstati tiun gravan fakton.

En la tramvagono estis nenia homo.

Tiam sinjorino Clayton Vernon aperis rapidante supren sur la deklivo de Anasa Remparo, kaj signis al Chadwick

por atendi ŝin. Li ŝvingis al ŝi per la brako, afable kaj tamen respektate, kvazaŭ li dirus: "Estu trankvila, moŝta, sinjorino! Vi estas sub la protekto de monda viro, kiu dece ŝatas vian rangon. La vagono atendos ĉi tie ĝis vi atingos ĝin, eĉ se Tomaso Chadwick perdos sian situacion pro neakurata veturo."

Kaj sinjorino Clayton Vernon spiregante eniris la veturilon. Kaj Tomaso Chadwick etendis al ŝi helpmanon, kaj salutis ŝin per sia oficiala ĉapo kun digneca ŝvingo; kaj lia rigardo ŝajnis diri al la mondo: "Jen vi vidas, kio okazas, kiam *mi* permesas min estri tramveturilon! Eĉ Sinjorino Clayton Vernon tiam veturas per tramo." Kaj la tuta socia nivelo de la elektra tramvojo entrepreniĝis ŝajne estis altigita, kaj konduktoroj fariĝis belaj, solidaj kortegaj ĉambelanoj.

Ĉar sinjorino Clayton Vernon estis efektive persono en la urbo—eble, laŭ societa vidpunkto, la ĉefa persono. Vidvino, ne malpli dika ol Toĉjo mem, riĉa, subtenata de familia tradicio, kaj kun vera bontono en ĉiu gesto! Ŝiaj regalaĵoj en ŝia domo en Hillport estis senegalaj, kaj homoj, kiuj ricevis inviton al ili, malofte forgesis elbabilon tiun fakton. Tomaso, homo ne facile ŝancelata, tamen skuiĝis de surprizo, vidante ŝin veturi per tramo al Moorthorne—eĉ per lia tramvagono, kiu por li en ia subtila maniero malsimilis je ordinaraĵoj—ĉar oni malofte vidis ŝin eksterdome sen ŝia kaleŝo. Ŝi posedis du ĉevalojn. Certe devis esti, ke ambaŭ ĉevaloj samtempe malbonfartas, aŭ ke ŝia veturigisto malsanas. Ĉiokaze, jen ŝi estis en la vagono de Tomaso, lukse vestite per nova printempa robo el flordeseĝa silko.

"Mi dankas vin," ŝi diris tre dolĉe al Chadwick, konfese de lia helpo.

Tiam tri viroj de rango sendifina grimpis sur la vagonon. "Kiel fartas, Toĉjo?" unu el ili senĝene salutis la majestatan konduktoron. Tiu ĉi impertinenta junulo estis Paŭlo Ford, komizo al prokuristo, ofte veturanta al Moorthorne, ĉar lia mastro havis tie filian oficejon, kiu malfermiĝis dufoje en la semajno.

Toĉjo ne respondis, sed iom montris sian malkontentecon. Li abomenis, ke oni lin nomas Toĉjo, krom ĉe kelkaj intimaj samaĝuloj.

“Nu do, volu rapidi !” li diris froste.

“Tre volonte, via reĝa Moŝto !” diris alia el la trio, kaj ĉiuj tri ekridis.

Cetere kaj pli maldece, ĉiuj tri portis la Federaciulan kokardon, kiu por Tomaso Chadwick kvazaŭ prezentis ruĝaĵon al la bovoviro. Estis parto de la politika kredkonfeso de Toĉjo, ke Federaciuloj estas la “franĝo ĉifona kaj vosto fripona” de la urbo. Sed, ĉar li estis tramkonduktoro, kvankam ne ordinara tram-konduktoro, lia buŝo estis sigelfermita, kaj li ne povis esprimi al siaj pasaĝeroj siajn sentojn rilate al ili.

Kiam li estis tuj ektironta la ŝnuron de la ekvetura sonorilo, sinjorino Clayton Vernon salte leviĝis kun krieto : “Ho ! mi tute forgesis !” kaj forlasis la vagonon, preskaŭ fluge. Ĝustadire ŝi ne flugis, ĉar ŝi estis plentalia sinjorino, sed la viveco de ŝia moviĝo estis miriga. Devas esti, ke ŝi forgesis ion tre gravan.

Unu ideo, kvazaŭ politika argumento, subite enŝoviĝis en la kapon de Toĉjo, kaj ĝi ekmastris lin. Li devis elbabili ĝin. Al la ventoj kun tiu senpartieco, kiun postulas tramkompanio ĉe siaj konduktoroj !

“Ho !” li rimarkis, ĵetmontrante per sia kubuto en direkto al sinjorino Clayton Vernon kaj emfaze alparolante siajn tri pasaĝerojn Federaciulojn, “ŝi estas bontona sinjorino, jen kio ! Ŝi ne volas veturi kun ĉiu homo, ne pensu ĝin ! *Ŝi elektas sian societeton—kaj tute prave, laŭ mia opinio !*”

Kaj nur tiam li ekveturigas la vagonon. Li sin sentis riĉe venĝita per tiu spritaĵo, pro la “Toĉjo” kaj la “via reĝa Moŝto” kaj la mokanta ridado.

Paŭlo Ford tre videble okulsignis al siaj kunuloj, sed faris nenian vortan respondon. Kaj Tomaso Chadwick eniris la benkejon por kolekti biletpagojn. En liaj manoj tiu ago fariĝis ia rito. Liaj gestoj ŝajnis diri : “Neniu iam dece ŝatis la gravecon de la profesio de tram-konduktoro, antaŭ ol mi venis. Ni plenumu tiun ĉi aferon solene kaj zorgege. Atentu, kian monon vi donos al mi, kalkulu vian restaĵon, kaj nek perdu, nek detruu, nek malbonigu tiun ĉi nepre necesan bileton, kiun mi donas al vi. Ĉu vi aŭdas la sonon de mia stampa tintilo ? Ĝi estas signo de mia alta ofico. Mi estas plene rajtigita.”

Kolektinte sian imposton, li staris ĉe la pordo de la vagono, kiu nun iris skuiĝante preter la bantlinia fervoja stacio, kaj li daŭrigis sian predikon al la ĉeestantoj pri la aristokrataj kaj elektemaj kvalitoj de sia amikino sinjorino Clayton Vernon. Li daŭrigis, klarigante la malbonojn kaj la malnoblecon de federaciigo, kaj predikante pri la absurdeco de homoj, kiuj publike portis la kokardojn de la federacia partio kaj tiel brulstampis sin kiel senprudentulojn kaj friponojn; mallonge dirite, lia lango estis malligita. Kvan-kam li humiligis sin kaj akceptis la pagon de tram-konduktoro, li ne volis oferi la gravan politikan rajton de libera parolo.

“Se mi ne estus la plej bonkora homo sur la tero, Toĉjo Ĉadŭik,” diris Paŭlo Ford, “mi skribus hodiaŭ nokte al la tram-kompanio, kaj vi ricevus morgaŭ eksigon per boto.”

“Nur mi konstatas,” persistis la stranga konduktoro— “nur mi konstatas—ŝi estas bontona sinjorino, jen kio—vera bontonulino! Ŝi elektas sian societeton—kaj tute prave ŝi agas! Tion mi asertas, kaj mi ne lasas ŝtopi al mi la buŝon.” Lia maniero estis almenaŭ tre malmulte flamema.

“Kio ĝi estas?” demandis Paŭlo Ford, eksalte, ne aludante pri la dirita buŝo, sed montrante sur ian objekton kuŝantan sur la benko en la angulo, kiun sinjorino Clayton Vernon estis tro mallonge okupinta.

Li levigis kaj levis la objekton, kiu havis la briletecon de oraĵo.

“Transdonu ĝin,” diris Tomaso Chadwick, per ordona voĉo. “Ne estas via afero, tuŝi trovitaĵojn en mia vagono”; kaj li forkaptis la objekton el la manoj de Paŭlo Ford.

Ĝi estis tamen tiel brilanta kaj tiel evidente multekosta, ke li iel ne povis ne partopreni la admiradon de ĝi kin siaj pasaĝeroj. La trovo ebenigis inter ili ĉiujn diferencojn. Monujo el ora ĉenretaĵo: ĝi nediskrete evidentigis, ke ĝi estis plensatigita per riĉaĵoj. Kiam oni ĝin skuis, vi aŭdis la susuron de bankbiletoj kaj la tintadon de suveren-moneroj; kaj tra la maŝoj de la monujo oni povis vidi la blankon de valoraj paperetoj, kaj la flavajn disketojn, por kies akirado la homoj tiel volonte sin fordonas al ĉiuspeca pekado. Tomaso Chadwick ne povis deteni sin, malfermi ĝian agrafon, kaj malferminte ĝin, li ne povis ne kalkuli la enhavon. Trovigis en tiu monujo sep kvin-funtaj biletoj, dek kvin

suveren-moneroj kaj duon-suvereno, kaj la monujo mem konjekteble valoris dek du ĝis dek kvin funtojn sterlingajn kiel simpla oro.

“Ekzistas homoj, kiuj forgesse postlasus siajn proprajn kapojn, se nur ili povus !” rimarkis Paŭlo Ford.

Tomaso Chadwick tondre rigardis lin, kvazaŭ admonante, ke en la ĉeesto de Tomaso Chadwick oni ne povas sendangere ofendi moŝtajn sinjorinojn.

“Ĉu mi ne diris, ke ŝi estas bontona sinjorino ?” diris Chadwick, alte montrante la monujon kvazaŭ pruvilon. “Bona ŝanco, ke estas *mi*, kiu enmanigis ĝin !” li aldiris, klare supozante, ke la aliaj okupantoj de la vagono estas ŝteluloj, kiam la ŝanco prezentigas.

“Nu,” diris Paŭlo Ford, “sendube vi orde ricevos vian rekompencan !”

“Ĝi ne estas la—” komencis Chadwick ; sed en tiu momento la veturigisto ekhaltigis la vagonon kun skuo, obee al svingata ombrelo. La konduktoro, kiu ankoraŭ ne estis “ricevinta la marajn piedojn,” kiel oni dirus pri li, se li estus estro de atlanta vaporŝipego, ekŝoviĝis autaŭen, kaj tiam eliris sur la peroneton por bonvenigi novan veturonton, kaj lia frazo neniam estis finita.

III

Okaze, tiu tago estis la tago de la sende ĵora posttagmezo de Tomaso Chadwick ; almenaŭ, kion la tram-kompanio nomis sendeĵora posttagmezo. Alivorte, anstataŭ ĉesigi la laboron je la deknua kaj duono nokte, li finis je la sesa kaj duono vespere. Ordinare la Kompanio endomigis sian lastan vagonon de Moorhorne je la deknua kaj duono (ĉar Moothorne ne estis tre noktomora vilaĝo), kaj donis al la konduktoroj la restaĵon de la vespero por uzi laŭ sia libera bontrovo ; sed unufoje en la semajno, laŭ vico, ĝi malavare cedis al ili tutan duontagon, komencantan je la sesa kaj duono.

Nu, en tiu ĉi posttagmezo, anstataŭ iri hejmen por temanĝo, Tomaso Chadwick unue transdonis al la inspektoro en la bazarplaco de Bursley siajn insignojn kaj enspezojn, kaj tiam ekkuris al tramvagono veturanta al Hillport. Unu policano vokis lin :

“Haj! Ĉadük!”

“Kio fariĝas?” demandis Chadwick, nevolonte haltante.

“Sinjorino Clayton Vernon vizitis la policostacion, antaŭ horo aŭ malpli, pri ia monujo, kiun ŝi kredas esti postlasinta en via vagono. Mi estis nun iranta por raporti al via inspektoro.”

“Raportu do al li, mia knabo,” diris Chadwick abrupte, kaj rapidis antaŭen al la vagono por Hillport. Lia maniero kontraŭ policanoj ĉiam kunigis la veteranon kun la kamarado, kaj la plimulto el ili rigardis lin kiel adepton de la metio. Tamen lia konduto en tiu ĉi okazo iom mirigis la junan policanon, kiu estis alparolinta lin. Kaj sendube Tomaso Chadwick estis aganta apenaŭ konforme je la litero de la leĝo. Lia rekta devo estis transdoni tuj al la polico ĉiujn objektojn trovitajn en lia vagono—certe ne teni ilin kaŝitajn ĉe sia persono kun la intenco redoni ilin propramane al iliaj posedantoj. Sed Tomaso Chadwick opiniis, ke ĉar li estis iam policano li estas libera interpreti la leĝon serveme al lia inklino. Li trafis la vagonon por Hillport, kaj balancis sian kapon al ĝia konduktoro laŭ la profesia rito, metante al li metian demandon, kaj montrante ĝenerale al la aliaj pasaĝeroj sur la peroneto, ke li ne estas samspeca je ili, kaj ke li havas gravajn oficialajn privilegiojn. Kompreneble, li veturis senpage; kaj kompreneble estis li, kiu haltigis la vagonon, kiam la konduktoro estis interne kaj du sinjorinoj faris al ĝi haltsignon ĉe la malsupra fino de la strato Oldcastle. Li unue intencis nenion elbabili al la alia konduktoro pri sia trezoro kaj sia celo; sed iel, kiam la biletpagoj estis orde kolektitaj, kaj tiuj du staris babilante sur la peroneto, la ora monujo englitis en la parolon, kaj baldaŭ la alia konduktoro sciis ĝian tutan historion kaj eĉ havis ekvidon de la monujo mem.

Kontraŭ la enirejo al la bieno de sinjorino Clayton Vernon en Hillport, Tomaso Chadwick lerte deglitis, malgraŭ sia granda maso, de la rapidanta vagono. Konduktoro veturanta nedejore prefere pereus per peza falo, ol lasus haltigi vagonon por ke li deiru de ĝi. Kaj Tomaso Chadwick peze krakigis la ŝtonetaran veturvojon kondukantan al la domo de sinjorino Clayton Vernon kaj ordoneme bruiĝis la sonorilon.

“Ĉu Sinjorino Clayton Vernon estas hejme?” li demandis oficialmiene al la respondinta servistino.

“Ŝi estas hejme,” diris la servistino. Se li estus vestita per sia luksa kompleto, ŝi konjekteble aldirus “Sinjoro.”

“Do bonvolu diri al ŝi, ke sinjoro Ĉadŭik—Tomaso Ĉadŭik—volas paroli kun ŝi.”

“Ĉu pri la monujo?” la servistino demandis, tuj vigligante per viva scivoleco.

“Vi ne zorgu, pri kio ĝi estas, knabino,” diris Tomaso Chadwick severe.

En tiu momento aperis post la blanka kufeto de la servistino la griza bukita kapo de sinjorino Clayton Vernon. Konjekteble ŝi okaze estis aŭdinta ian eĥon de la granda tondra voĉo de Tomaso Chadwick. La servistino foriris.

“Bonan vesperon, Sinjorino,” diris Tomaso Chadwick, levante la ĉapon kun svingo. “Bonan vesperon.” Li brilis de kontenteco.

“Do vi trovis ĝin?” diris sinjorino Vernon, trankvile ridetante. “Mi sentis min certa, ke ĉio estos orda.”

“Ho! jes, Sinjorino.” Li penis kredigi al si, ke tiu ĉi senlima konfido estas karakteriza de moŝtaj sinjorinoj, kaj laŭdinda simptomo de aristokrateco. Sed li preferus, ke ŝi estu iom malpli konfida. Ĉio dirite, ĉe la manoj de konduktoro malpli honorinda ol li, nome de ordinara konduktoro, la monujo povus esti ne tiel “ĉio orda,” kiel tio! Li preferus observi la ŝanĝon sur la trajtoj de sinjorino Vernon, de malespera zorgo al kontenta malstreĉiĝo. Ĉio dirite, sumo de kvindek funtoj kaj dek ŝilingoj estas mono, kiel ajn vi estu riĉa!

“Ĉu vi havas ĝin kun vi?” demandis sinjorino Vernon.

“Jes, sinjorino,” li diris. “Mi opiniis pli bone alpaŝi mem kun ĝi, por esti pli certa.”

“Vi estas tre kompleza!”

“Estas nenio,” li diris; kaj li eltiris la monujon. “Mi kredas, ke vi trovos ĝin tute en ordo.”

Sinjorino Vernon faris al li korteganan rideton, dankante lin.

“Mi preferus, sinjorino, ke vi kontrolu ĝin,” diris Chadwick, ĉar ŝi ne montris ian intencon eĉ malfermi la monujon.

“Se vi tion volas,” ŝi diris ; kaj ŝi kalkulis sian riĉaĵon kaj remetis ĝin en la monujon. “*Tute* orde—*tute* orde ! kvindek funtoj kaj dek ŝilingoj,” ŝi diris tre afable. “Mi min sentas tre danka al vi, Ĉadŭik.”

“Estas vere nenio, sinjorino !” Li ankoraŭ staris sub la ŝirmo de la portiko.

La ideo ŝajne ekfrapis sinjorinon Clayton Vernon.

“Ĉu plaĉus al vi ia trinkaĵo ? ” ŝi demandis.

“Tre agrable por mi, sinjorino,” diris Tomaso.

“Maria,” diris sinjorino Vernon, vokante iun interne de la domo, “alportu al tiu ĉi viro glason da biero.” Kaj denove ŝi sin turnis al Chadwick, frapite de plua ideo. “Mi konsideru ! Via pliĝa filino havas du knabetojn, ĉu ne vere ? ”

“Jes, sinjorino,” diris Tomaso—“dunaskitojn.”

“Tiel ŝajnis al mi. Ŝia edzo estas kuzo al mia kuiristino.

Nu, jen du tripencaj moneroj—po unu por ĉiu el ili.” Post klopodeto ŝi eltiris la monerojn el iom eluzita leda monujo—evidente ŝia mastruma monujo. Si liveris ilin al la honesta konduktoro kun plua rideto, danka kaj malaltiĝa. “Mi esperas, ke vi ne *malŝatas* akcepti ilin por la birdetoj,” ŝi diris. “Mi *amegas* donaci al infanoj. Ĝi estas tiom pli *kontentiĝe*, ĉu ne vere ? ”

Tiam la servistino alportis la glason kun biero, kaj sinjorino Vernon, kun ankoraŭ plua korinklina rideto, kaj ankoraŭ pluj dankesprimoj, lasis lin degluti ĝin sur la mato, dum la servistino atendis la malplenan glason.

IV

En la sekvanta vendreda posttagmezo, juna Paŭlo Ford denove veturis per tramo el Moorthorne, kaj subiĝis al la oficiala regalo de Tomaso Chadwick. Paŭlo Ford estis tia homo, kiu neniam portis malicon, kiam malica humoro povus malbonigi al li ian okazon por la ĝuado de afero spriteca. Multaj viroj—eble la plimulto da viroj—se ili ricevus ĉe tram-konduktoro tiel maldelikatan ofendon, kian Paŭlo Ford estis ricevinta ĉe Chadwick, sendube en la sekvanta renkontiĝo pugne faligus la ofendinton, aŭ almenaŭ froste ignorus lin. Sed Paŭlo Ford faris nek unu nek la alian el tiuj agoj. (Ĉiokaze, ne estus bagatela pugnobato,

kiu faligus Tomason Chadwick). Pro ia kaŭzo, ĉio, kion diris Tomaso Chadwick, faris al Paŭlo Ford la plej akran amuziĝon. Tiu junulo do komencis la parolon laŭ la kutima maniero :

“Kiel fartas, Toĉjo ? ”

La vagono en tiu ĉi okazo estis deiranta el Moorthorne en la urbon Bursley, kun la kutima *bump*-skuiĝo kaj krakado de fenestroj. Ĉar Tomaso Chadwick nenion respondis, Paŭlo Ford daŭrigis :

“Kiom ŝi donis al vi?—mi aludas pri la bontona sinjorino.”

Paŭlo Ford sidis apud la nefermita pordo. Tomaso Chadwick, neatentante lin, rigardegis la Urban Parkon kun ĝiaj fontanoj el potargilaĵo kaj ĝiaj terasoj, kaj preter la Parkon al la fumo leviĝanta el la malproksimaj fornegoj de Ruĝa Bovino. Li povus esti absorbata en profunda meditado pri la signifoj de la vivo ; li povus esti malhelpita aŭdi la demandon de Paŭlo Ford, de la fortega bruado de la tramvagono. Nenian signon li faris. Tiam subite li sin turnis preskaŭ sovaĝe al Paŭlo Ford kaj fiksitis lin per rigardo.

“Vi scivolos, kiom ŝi donis al mi ? ” li demandis arde.

“Jes,” diris Paŭlo Ford.

“Kiom ŝi donis al mi pro la redono de tiu monujo ? ” Toĉjo Chadwick diris, prokraste.

Li devis prokrasti, ĉar li ne povis tute decidi, ke li kaptos la situacion kaj unufoje por ĉiam traktos ĝin laŭ maniero favora por lia digneco kaj la idealoj tiel karaj por li.

“Jes,” diris Paŭlo Ford.

“Nu, mi diros al vi,” diris Tomaso Chadwick—“kvankam ŝajnas al mi, ke ĝi neniel estas via afero. Sed, ĉar vi estas tiel scivola ! Ŝi nenion donacis al mi. Ŝi petis min preni malgrandan regalaĵon, laŭ moro de bontona sinjorino, kia ŝi estas. Sed ŝi estis tro diskreta por proponi monan rekompencon al Tomaso Chadwick, pro la redono de objekto okaze fallasita de ŝi. Ŝi estas bontonulino, jen kio ! ”

“Ho ! ” diris Paŭlo Ford. “Kostas do malalte, esti bontonulino ! ”

“Sed mi diros al vi, kion krom tio ŝi faris,” daŭrigis Tomaso Chadwick, dezirante, post tiel kontentiga komenco, tiri la aferon ĝis artista finalo—“Mi diros al vi, kion ŝi

faris. Ĝi donis al mi po unu suvereno por ĉiu el miaj nepoj—la dunaskitoj de mia pliaĝa filino.” Tiam, post efektiva paŭzo: “Vi povas meti tion en vian pipon, kaj fumi ĝin! . . . Po unu suvereno por ĉiu!”

“Kaj ĉu vi transdonis la monon?” Paŭlo Forde milde demandis, post mallonga mallaŭta sibilado.

“Mi starigis por ili du kontojn en la poŝtoŝiceja ŝparbanko,” diris Tomaso Chadwick kun sovaĝa mieno.

La parolado haltis, kaj nenio okazis ĝis la vagono haltis ĉe la fervoja stacio, por ricevi pasaĝerojn. La koro de Tomaso Chadwick faris kuriozan salteton, kiam li vidis sinjorinon Clayton Vernon eliri de la stacidomo kaj paŝi al la vagono. (Sendube ŝiaj ĉevaloj estis ankoraŭ lamaj, aŭ ŝia veturigisto ankoraŭ malsanis). Ĝi paŝis sur la vagonon, ridetante kun aparta brilado al Tomaso Chadwick, kaj li salutis ŝin kun tio, kion li kredis esti la vera antikva kavaliereco. Kaj ŝi sidiĝis en la angulo kontraŭa al Paŭlo Ford, sune ridetante.

Kiam Tomaso Chadwick venis kun granda respekto por postuli ŝian biletpagon, ŝi diris:

“Kromdire, Ĉadŭik, estas tiel malmulte da vojo de la stacio al la urbo, ke mi eble devus piediri kaj ŝpari pencon. Sed mi volis paroli kun vi. Mi ne sciis, lastan mardon, ke via dua filino edziniĝis lastan jaron kaj nun havas karan infaneton. Mi donis al vi po du moneroj tripencaj por tiuj karaj ĝemeletoj. Jen alia, por la alia infaneto. Sajnas, ke mi devus agi egale kun ĉiuj viaj nepetoj—aliokaze viaj filinoj eble ĵaluzus unu la alian”—ŝi ridetis komprenige, por montri, ke jen frazo spriteca—“kaj oni ne scias, kio povus okazi!”

Sinjorino Clayton Vernon ĉiam elparolis siajn rimarkojn per laŭta kaj hela voĉo, pro kio Paŭlo Ford ne povus ne aŭdi ĉiun vorton. Malforta sed kontentega rideto kaŝe petolis en la buŝa regiono de Paŭlo Ford, kaj li rigardegis kun absorbata mieno unu reklamafiŝon, super la kapo de sinjorino Clayton Vernon, certigantan al li, ke por uzanto de certa sapo la lavada tago fariĝas festo.

Ne tute maldecus, se Tomaso Chadwick ĵetegus la tripencan moneron sur la vojon. Aŭ li povus faciligi la koron per parolo ne konvena por tram-konduktoro kaj avo. Li povus forkapti la kufon de sinjorino Clayton Vernon

kaj piedpremi ĝin. Li povus pereigi Paŭlon Ford (ĉar certe li plejmulte koleris Paŭlon Ford). Sed nenion el ĉio tio li faris. Parolante per sia tono la plej bone oleita, li diris :

“Plej certe, sinjorino, mi tre dankas vin !”

Kaj ĉe la fino de la veturo, kiam la pasaĝeroj deiris, li rigardegis severe, kun semmovaj palpebroj, rekte en la vizaĝon de Paŭlo Ford, kaj li afable helpis al sinjorino Clayton Vernon. Li estis proklaminta, ke sinjorino Clayton Vernon estas lia idealo de vera bontonulino, kaj li restis heroe lojala por sia idealo, martiro pro la cелаfero, kiun li jam partianiĝis. Tia homo ne taŭgis por tram-konduktoro, kaj la Kvinurba Elektra Veturiga Kompanio baldaŭ malkovris lian netaŭgecon—kaj pro tio li denove estis ĵetita sur la mondon.

SUB LA HORLOĜO

I

Ĝi estis unu el tiuj rapidaj kaj energiaj edziĝoj, kiuj okazas kiam la koncernuloj estas tiel akre vunditaj per la sago de l' amoro, ke nur tuja kaj konstanta reciproka flegado povas savi ilin de sekvo pereiga. (Tiel ili opinias). Pro tio, kiam Anjo venis el Sneyd, por okupi la domon en Betulara Strato, en Hanbridge, kiun Vilhelmo Henriko Brachett estis meblinta por ŝi, ŝi tre malmulte konis Vilhelmon Henricon, krom tio, ke li estas treege aminda, kaj ke ŝi treege amas lin. Ilia konatiĝo jam havis la daŭron de nur tri monatoj. Kaj egale malmulte ŝi konis la morojn kaj kutimojn de la Kvin Urboj. Ĉar, kvankam Sneyd kuŝas nur kelkajn mejlojn for de la grandega sidejo de la potfabrikado, ĝi ne estas samspeca, kiel la Kvin Urboj. Ĝi ne estas, kiel ili, febra, fulgogriza, kruda, luktema, drinkama, kaj malvirta. Ĝi estas modela vilaĝo, estrata de la Grafino de Chell. La anoj de la Kvin Urboj vojaĝas tien en ĵaŭdaj posttagemezoj (okpenca bileto, triaklasa, ira-kaj-revena), kvazaŭ ili irus al Paradizo. Fakte, estis en tiaj cirkonstancoj, ke Vilhelmo Henriko ekkoniĝis kun Anjo, filino de domo, super kies pordo montriĝis la bonvenigaj vortoj: "Oni Provizas Teon kaj Bolantan Akvon."

Laŭ Betulara Strato, en Hanbridge, staris serio el cent kvardek du domoj, ĉiuj samaj kun la sola diferenco en la grado de pureco de siaj fenestraj kurtenoj. Al duopaj stratopordoj sekvis duopaj elstarantaj fenestroj, tiam poste duopaj stratopordoj, kaj tiel ripete laŭ la tuta iro de la strato kaj denove laŭ ĝia tuta reveno. La vivo estis monotona, sed plejparte konforma je konvenaĵoj. Anjo devenis de ŝparema familio, kaj antaŭ la edziĝo, ŝi timis, ke la ekonomia idealo de Vilhelmo Henriko eble estos malpli severa ol la ŝia. Tiurilate ŝi trompiĝis. Pliĝuste, ŝi konsterniĝe trompiĝis. Ne sen bato de surprizo ŝi sciigis de Vilhelmo Henriko, ke pro nesufiĉo de metia laboro, la

miela nonato devas esti ĉirkaŭtrancita en la daŭron de du tagoj. Tamen ŝi ĝoje konsentis tiun proponon. (Por ŝi, la vivo mem estos, ŝi kredis, unu longa mielmonato). Ĉe ilia reveno de sia mallonga mielmonato, Vilhelmo Henriko reprenis de ŝi ok ŝilingojn, el la mono, kiun li estis doninta al ŝi, kaj senprokraste ĝin pagis kotize al la Forvetura Klubo, kaj dum kelkaj tagoj estis proviza nesufiĉo. Tio okazis en Marto. Si havis en tiu tempo nur neprecizan ideon pri la esenco de la Forvetura Klubo. Sed laŭ la mieno de Vilhelmo Henriko, kaj lia timo, ke li eble malfruos, ŝi konjektis, ke la Forvetura Klubo devas esti tre grava institucio. Brachett, por gajni vivrimedon, pentris blujajn japanajn rozojn sur vazoj en la fabrikejo de Gimson kaj Nevo. Li estis preskaŭ tridekjara, kaj li neniam havis alian okupon, ol pentri blujajn japanajn rozojn sur vazoj. Kiam la postulado pri bluj japanaj rozoj sur vazoj estis kondiĉa je la kapricoj de la komercaj rondoj—precipe koloniaj rondoj—kaj tiam Vilhelmo Henriko havis nedeziratajn libertagojn, kaj alportis hejmen malpli ol kvindek ŝilingojn, laŭokaze multe malpli. Tamen la domo, kiun Anjo mastrumis, estis en supera grado konvena domo, kaj la enspezo de Vilhelmo Henriko estis, se oni prenas unu semajnon kun alia, unu el la plej princaj en tiu strato; kaj certe la fenestraj kurtenoj de Anjo, kaj ŝia rand-orita Biblio kaj artaj floroj, paradataj sur tableto meze inter la fenestraj kurtenoj, estis neegalitaj. Plue, Vilhelmo estis “sobra,” kaj ne tute furioze rabia pri futbalaj provludoj; li ne vetadis, ĉu pri ĉevaloj, aŭ pri hundoj aŭ kolomboj.

Tamen Anjo—kvankam, vi komprenu, eksterordinare feliĉa—trovis sian novan vivon, krom monotona, ankaŭ iom kruda, malvasta kaj sen spektaklaj plezuroj. Kiam starigis ia demando pri elspezo de pli da mono ol ordinare, la sovaĝa mentono de Vilhelmo antaŭen ŝoviĝis timige, kaj lia voĉo krudiĝis, kaj en la rezultato ne estis elspezita plimulte da mono ol ordinare. Lia ideo pri ekskurso, pri senbrida kaj multekosta aventuro, konsistis en promeno tra la Urba Parko de Hanbridge kaj du ŝandigafoj* en la tiea Korporacia

* *Shandy-gaff*: trinkaĵo el biero kun mineralakvo.

Restoracio. Nu, kvankam la Parko de Hanbridge estas mirinda triumfo de herba semaĵo kaj potargilaja ornamo super cindraj ŝutamasoj kaj potpeca rubaĵo, kvankam ĝi estas glora modelo por aliaj korporaciaj urboj, ĝi tamen neniel estas la Valo de Hlangohlen, nek ĝi estas la Laga Regiono. Ĝi estas almenaŭ iomete teda, kaj sarkasmuloj eĉ komparis ĝin kun tombejo. Kaj ĝi ŝajnis simboligi por Anjo ŝian vivon, per sia malvasta kaj ĉirkaŭtranĉita kaj fulgogriza precizeco. Ŝi komencis rigardi la Kvin Urbojn kiel specon de malliberejo, el kiu neniam, neniam ŝi povos forsavi sin.

Mi diras, ke ŝi estis eksterordinare feliĉa ; kaj tamen ŝi estis ankaŭ malfeliĉa. Per unu vorto, ŝi similis nin ĉiujn ceterajn—ŝi estis “iel atendinta ion alispecan” ol kion la vivo efektive prezentis al ŝi. Ŝi miregis, ke ŝia Vilhelmo Henriko ŝajnas tiel kontenta kun aferoj tiaj, kiaj ili estis. Tiel malmulte nun antaŭtimante ĉe li ian malŝparemon, ŝi eĉ sekrete deziris, ke li estu iom pli entreprenema. Ŝajnis, ke li ne sentis tiun veraĵon, ke, kvankam bela estas la antaŭzorgemo, tamen nur unu fojon vi povas travivi vian vivon, kaj kiam vi mortis, vi estas mortinta. Ŝajnis, ke ne multaj homoj en la Kvin Urboj ŝatas dece la indon de la plezuro. Neniajn distraĵojn li havis, krom nur sia pipo. La ekzistado estis severa kaj klopoda luktado, serio de senreliefaj ĉiutagaj kutimoj. Nenia ŝanĝo, nenia gajeco, nenia petolado ! Malindulga, senŝanĝa monotoneco !

Kaj unufoje, en Julio, Vilhelmo Henriko formetis eĉ sian pipon en la daŭro de dek tagoj. Laboro, sekve ankaŭ enspezo, estis lastatempe neregula, sed tio per si mem ne estis sufiĉa kaŭzo por fortranĉi luksaĵon, kiu kostis nur unu ŝilingon por la semajno. Estis la Forvetura Klubo, kiu forglutis la tabakan monon. Nenio povis devigi Vilhelmon Henrikon malfruigi siajn kotizpagojn al tiu mistera Klubo. Li oferus ne nur sian pipon, sed ankaŭ sian tagmanĝon—li eĉ oferus ankaŭ la tagmanĝon de sia edzino—al la ĉionglutema faŭko de tiu Klubo. Anjo malamis la Klubon preskaŭ tiel pasie, kiel ŝi amis Vilhelmon Henrikon.

Tiam en la unua de Aŭgusto (mardo) Vilhelmo Henriko venis en la domon kaj metis en serio sur la kuireja tablo dudek suverenajn monerojn. Li ne multe diris, ĉar li estis, kiel Anjo milde bedaŭris, sekretema homo.

Anjo neniam antaŭe vidis tiom da mono en serio.

“Kio estas tio?” ŝi demandis malforte.

“Ĉu la jena?” diris Vilhelmo. “Tio estas la forvetura mono.”

II

Plata puŝveturilo ĉe la pordo, lada vojaĝkesto kaj du valizoj sur la puŝveturilo, kaj knabo iom ĉifona inter la teniloj de la veturilo! Fenestroj senigitaj je la flankkurtenoj, sed la rulkurtenoj deĵorantaj! Duobla turno de la porda ŝlosilo! Kaj for ili ekvojaĝas, sed nur kiam la ĉifona bubo estas kraĉinta sur siajn manplatojn, por certigi firman tenadon de la puŝveturilo. Siatempe ili alvenas la fervojan stacion de Hanbridge, jam malserenan pro vojaĝanta amaso en tiu sabato antaŭ Banka Ferio. Ŝajnis kvazaŭ ĉiuj anoj de la Kvin Urboj estas forveturantaj. La unua afero, kiu skue mirigis Anjon, estis tio, ke Vilhelmo Henriko donis ŝilingon al la ĉifona bubo, almenaŭ tiom, kiom la knabo povus perlabori en du tagoj per regula okupo. Vilhelmo Henriko ankaŭ malavare rekomencis portiston. Ĉe alveno, post dekminuta veturo, en Knype, kie oni devis ŝanĝi por Liverpool, denove li malavaris kun portisto. Kaj same okazis en Crewe, kie ankaŭ ili devis ŝanĝi por Liverpool. Tempo sufiĉis en Crewe por altkosta kolora trinkaĵo. Sur la longa home-bolanta perono, Vilhelmo Henriko donis al Anjo tutan sian monon, por gardi.

“Jen, knabino!” li diris. “Tio estos pli senriska kun vi, ol kun mi.”

Ŝi sentis sin flatita.

Kiam la vagonaro por Liverpool alvenis, ĝi estis tutplena ĝis la pordoj. Kaj ankoraŭ ducent homoj sin pumpis en ĝin, kvazaŭ oni preme gas aeron en pneŭmatikan radringon. Ŝajnis kvazaŭ la tuta mondo iras al Liverpool. Ĝi estis nekomforta: sed ĝi estis grandioza. Ĝi estis ĝojo, ĝi estis vivo. La fumturoj kaj fornejoj de la Kvin Urboj estis longe for. Kaj Anjo, kvankam malvarme ŝvitante pro timo, ke ŝi neniam revidos sian ladan vojaĝkeston, tamen estis febre feliĉega. En Liverpool, Vilhelmo Henriko postulis de ŝi arĝentajn monerojn. Ŝi havis ekvidon de sia kesto. Tiam ili veturis, krakante kaj skuigante kaj muĝante, en omnibuso al la Kajo de l'Princo. Kaj Vilhelmo

Henriko postulis de ŝi ankoraŭ pluajn arĝentajn monerojn. Granda ŝipego atendis ilin. Oni ne bezonas diri, ke Douglas estis ilia celo. La ferdeko de la ŝipego similis bazaroplacon. Nenion similan Anjo estis iam vidinta. Ili supren grimpis sur la bazaroplacon, al la krieganta gestadanta homamaso. Troviĝis tie vera butikoj, ĉe kiu Vilhelmo Henriko ordonis, ke ŝi aĉetu gardŝnuron por la ĉapelo. Ĝi kostis ses pencojn. Hejme, ses pencoj ja estis ses pencoj, ili povis aĉeti sep funtojn da belaj farunecaj terpomoj; sed tie ĉi sespenca monero estis bagatelo—certe ĝi valoris ne pli ol duonpenco. Ili promenis kaj trovis aliajn butikojn. Anjo apenaŭ povis kredi, ke ĉiuj solidaj tiuj butikoj kaj la tuta bazaro povas moviĝi. Kaj ne surprizis ŝin iom poste vidi la Kajon de l'Princo forgliti de la ŝipo, anstataŭ vidi la ŝipon forgliti de la Kajo de l'Princo. Tiam ili malsupreniris en la subteraĵon, sub la bazon, kaj Anjo trovis marmorajn halojn, kolosajn ŝtuparojn, librobutikojn, butikojn por juveloj, tre ornamitajn restoraciojn, briletantajn drinksalonojn, kaj salonojn kun remburita meblaro. En restoracio ili havis la plej ekscitantan festenon, kiun iam Anjo havis: ankaŭ la plej altkoston; ĝia prezo vere konsternis ŝin; tamen Vilhelmo Henriko ŝajne ne malaprobis, ke unu manĝo superis la koston de dutaga vivado en Betulara Strato. Tiam ili resupreniris al la bazaro, kaj jen! la bazaro iel estis propramove lokinta sin en la mezo de la maro!

Antaŭ la fino de la marvojaĝo ili havis teon po tri pencoj por la taso. Anjo konsideris, ke la plej altgrada "Hejma kaj Kolonia" teo kostas po dek ok pencoj la funton, kaj ke unu funto sufiĉas por ducent dudek tasoj. Same kun la buterpano kaj la konfitaĵo, kiujn ili manĝis! Sed ĝi estis grandioza. Tio estas, ne la konfitaĵo (kiun Anjo mem povus superi), sed la vivado! Precipe ĉar la maro estis tute serena. Baldaŭ poste, kvazaŭ kreta bastoneto elstaris kontraŭ la horizonto, kaj tio estis la lumturo de Douglas.

III

Sekvis ses deliraj tagoj, ses tagoj de ekzistado la plej vasta, kiun ŝi nur povus imagi. La feriantoj loĝis en plej luksa pensiono apud la promenejo, unu el eble milo da luksaj pensioj. La tagordo komenciĝis je la naŭa horo per

matenmanĝo vere princa, partoprenata apud tre longa tablo, kiu etendiĝis en fenestran lokon. Je la naŭa horo, en ĉiu el la mil pensionoj, homamaso el malsataj kaj ekscititaj geviroj tiel sidiĝis apud tre longa tablo kaj konsumis samajn pladojn, nome manksajn* haringojn, kaj lardon kun ovoĵoj, kaj konfitaĵojn. Ĉiu manĝis laŭ sia nura povo. Wilhelmo Henriko neniam kontentiĝis kun malpli ol du haringoj, du ovoĵoj, ĉirkaŭ kvar uncoj da lardo, kaj tiom da konfitaĵo, kiu sufiĉus ĉirkaŭsmiri tutan ŝtatlernejon. Kaj kvar horojn poste, li estis preta por grandega tagmanĝo, kaj ŝi ankaŭ same; kaj post ankoraŭ kvin horoj, nek unu nek alia sentis la plej malgrandan abomenon al temanĝo vere rafinita kaj ampleksa. Komprenoble, la kosto estis fabla—po tridek kvin ŝilingoj por ĉiu por la semajno. Anjo kalkuladis, ke la pensio, kun tridek enloĝantoj kaj kromgastoj, enspezas en la poeco de kvardek funtoj sterlingaj en la semajno. Si kalkuladis ankaŭ, ke oni forglutas ĉiun tagon en Douglas po cent miloj da haringoj kaj dek milionojn da ostetoj.

Sed la kosto de la pensio estis bagatelo kompare. Estis la elfluado de moneroj intertempe de la manĝoj, kiu malfaciligis al Anjo la spiradon. Ĉiam ili agadas. Velveturante en boato! Remante en boato! Banigante! La digo! Bardoj sur la sabla bordo! Ekskursoj per benkveturilo, per tramo, per vagonaro, al Laxey, Ramsey, Sulby Glen, Haveno Erin, Snejfel! Matenaj distraĵoj! Posttagmezaj distraĵoj! Vesperaj distraĵoj! Cirkoj, muzikhaloj, teatroj, koncertoj! Kaj tiam la publikaj baloj, kun tiuj ravaj tabletoj en anguloj, kie vi sidis kaj suĉis misterajn trinkaĵojn per pajloj. Kaj ĉio signifis elspezadon. En Douglas estis lokoj, kie vi eĉ ne povis okupi ordinaran seĝon dum duonminuto, ne pagante ĝin. Ĉiun nokton Anjo iris al sia lito ellacigite de ĝojo. La duan nokton ŝi kalkulis la monon en sia saketo, kaj diris al Vilhelmo Henriko:

“Kiom da mono vi pensas, ke ni jam elspezis? Guste—.”

“Ne diru ĝin al mi, knabino!” li abrupte intermetis. “Kiam mi volos scii, mi demandos al vi.”

* *Manksa*, t.e. de la Insulo Man.

Kaj en la kvina vespero de tiu ĉi paradizo, li demandis ŝin :

“Kiom ankoraŭ restas al vi ?”

Ŝi sciigis lin, ke restas al ŝi kvin funtoj kaj du pencoj, el kio la pensio kaj la trinkdonacoj ĉerpos kvar funtojn.

“M—m !” li respondis. “Ĝi estos afero iom malvasta.”

La sepan tagon ili enŝipiĝis. La sonĝo ankoraŭ ne tute finiĝis, sed ĝia fino estis proksima. Sur la ŝipo, kiam oni saldis kun la portisto, restis al ŝi du ŝilingoj kaj du pencoj, kaj Vilhelmo Henriko havis la biletojn por reveno. Tamen tio ne malhelpis Vilhelmon Henrikon sidigi kaj mendi belan tagmanĝon por du (ĉar denove la maro estis serena). Mendinte ĝin, li trankvile diris al sia edzino, ke li havas suverenon en sia veŝta poŝo. Suvereno estis senfina riĉaĵo. Sed ĝi estis elĉerpita dum longa atendo en Crewe por la vagonaro al la Kvin Urboj. Vilhelmo ŝajne estis decidinta fini la ferion sammaniere, kiel li komencis ĝin. Kaj la du ŝilingoj kaj du pencoj ankaŭ venis al fino, ĉar Vilhelmo Henriko, subite ekmemorante la gefilojn de sia frato, nepre volis aĉeti por ili donacojn sur la perono en Crewe. En Hanbridge la geedzoj kune posedis ses pencojn. Kaj la puŝveturila knabo, kvankam vokite per poŝtkarto, ne aperis. Tamen aperis fiakro. Tiun fiakron Vilhelmo Henriko dungis.

“Sed, Vilĉjo—”

“Eksilentu, knabino !” li diris malpermeso.

Ili profundigis en la fumon kaj malbelecon de la Kvin Urboj, kaj kun pompo atingis Betularan Straton, dum Anjo kun miro demandis sin, kiel Vilhelmo Henriko povos aranĝi krediton kun fiakra veturigisto. La tuta stratanaro certe kolektiĝos, se oni scenon faros.

“Volu helpi kun tiu ĉi kesto en la domon,” diris Vilhelmo Henriko al la veturigisto. Jen bele, kun sespenca monero en sia poŝo !

Tiam, sin turninte al sia edzino, li flustris :

“Knabino, serĉu sub la horloĝo sur la kamenbreto saloneta. Tie vi trovos ses *bob*.”

Pli poste li klarigis al ŝi, ke antaŭvidemaj membroj de la Forveturaj Kluboĵ ĉiam postlasas kaŝitan monsumon, ĉar tio estis la sola rimedo kontraŭ malfeliĉega reveno.

La paro ekzistis per la restaĵo de la ses ŝilingoj, kaj per kredito, en la daŭro de semajno. Vilhelmo Henriko denove fariĝis la sama severa estaĵo, kiel antaŭe. La mallibereja vivo reestiĝis. Sed Anjo ne malaprobis, ĉar ŝi estis vivinta en la daŭro de unu semajno po mil funtoj por jaro. Kaj post du semajnoj Vilhelmo Henriko rekomencis senindulge pagadi siajn kotizaĵojn al la Forvetura Klubo de la sekvanta jaro.

TRI EPIZODOJ EN LA VIVO DE SINJORO COWLISHAW DENTISTO

I

Ĉiuj tri okazis en la daŭro de unu tago, kaj tiu tago estis sabato, tiu ruĝa sabato, en kiu, ĉe la neforgesebla provludo inter Tottenham Hotspur kaj la Hanbridge futbala Klubo (formita tute malavare rilate la koston de profesiuloj, por okupi la lokon de la bankrotinta Knype Futbala Klubo), la ludojuĝisto certe estus mortigita, se la homamaso el la Kvin Urboj ne konservus sian kutiman, tamen miraklan, sindetenemon.

Sinjoro Cowlishaw [elparolu *kaŭli ŝo*]—dudekkvinjara blonda fraŭlo, kun malfortaj lipharoj—estis aĉetinta la profesion praktikon de ekŝiginta sinjoro Rapper, dentisto laŭ la prametoda skolo. Li ne estis laŭnaska ano de la Kvin Urboj. Li venis el St. Albans, kaj estis farinta la negocon pere de reklamo en la *Dentists' Guardian*, ĉiusemajna ĵurnalo plena je ekscita intereso por dentistoj. Krom tia scio, kian li akiris en du preparaj vizitoj al la ĉefa centro de la tutmonda ceramika industrio, li neniom sciis pri la Kvin Urboj; efektive por li ĉio estis ankoraŭ lernota. Kaj oni ja povas diri, ke la Kvin Urboj ne estas tia temo, kian oni povas ellerni per unutaga studoprovo.

Lia afera loko—se tiu nomo estas la elektata ĉe altklasaj dentistoj—en Krona Placo estis tute preta por li ĉe lia alveno en vendreda nokto: specimenaj dentaroj, “palataj” kaj “makzelaj,” kaj apartaj dentoj, brilis en sia vitrita skatolo, la nova nigra-kaj-ora nomplato ornamis la pordon, kaj la elektra fajlaparato, kiun li estis aĉetinta, staris en la operacia ĉambro. Nenio tie mankis. Sed lia privata apartamento ne estis preta; almenaŭ ĝi ne estis tia, kian li nomis preta, laŭ siaj troprecizaj sanktalbanaj ideoj, kaj post nelonga argumento kun sia luigantino, li foriris kun

valizo por pasigi la nokton en la hotelo Kapo de Turko. La Kapo de Turko estis la plej bona hotelo en Hanbridge, ne esceptante la novan Hotel Métropole (Akcia Kompanio, kaj svis-germanaj kelneroj). La pruvo de ĝia bonegeco estas en tio, ke ĝia posedanto, sinjoro Simeono Klaŭz, estis tiam urbestro de Hanbridge, kaj sinjorino Klaŭz estis unu el la akceptitaj societestroj de Hanbridge.

Sinjoro Cowlshaw iris liron. Li estis bona dormulo; almenaŭ li estis tia, kian oni opinias en St. Albans bona dormulo. Li iris al sia ĉambro ĉirkaŭ la dekunua horo, kaj li petis unu el la kelnerinoj ordoni al la botisto, veki lin je la sepa matene. Tion ŝi promesis ĝuste plenumi.

Apenaŭ li estis en la lito kvin minutojn, li aŭdis kaj sentis tertremon. Tiu ĉi sisma fenomeno ŝajnis naskiĝi en loko nord-orienta en la direkto de Krona Placo, kaj la skuado ŝajnis pasi suden, en la direkto de Knype. La lito ŝanceliĝis, la kruĉo kaj lavvazo interklakadis, simile al nebona artefarita dentaro en la buŝo de vera timemulo; la muroj de la hotelo tremegis. Tiam silento! Neniaj timokrioj, neniaj helpalvokoj, neniaj plorkrioj pri ruino! Sendube, kvankam tertremoj estas maloftaj en Anglujo, la tuta urbo estis renversita kaj forglutita, kaj nur la lito de sinjoro Cowlshaw ankoraŭ restas sendifekta. Venkinte sian teruron, sinjoro Cowlshaw tiris sian kapon sub la litotukojn kaj restis atende.

Apenaŭ li estis en la lito dek minutojn, li aŭdis kaj sentis duan tertremon. Tiu ĉi sismo ŝajnis naskiĝi en loko nord-orienta kaj pasi en sudan direkton; kaj sinjoro Cowlshaw rimarkis, ke ĝin akompanas stranga sono de peza *bump*-skuado. Kuraĝe li saltis el la lito kaj kuregis al la fenestro. Kaj per hazardo li trafis la preterrapidantan tertremon en la ago mem. Gi estis unu el la novaj tramvagonoj de la Kvinurba Elektra Veturiga Kompanio, Limigita, garantiitaj porti kvindek du pasaĝerojn. La *bump*-sonoj rezultis el tio, ke la veturigisto, per troforta premado de la haltigilo, estis ŝanĝinta la ĝustan rondformon de du el ĝiaj radoj en formon ovalan. Tiaj bedaŭrindaĵoj povas okazi, eĉ al la plej novaj vagonoj, kaj la anoj de la Kvin Urboj ridas, kiam ili aŭdas bruskuigantan vagonon, kiel ili ridas super la dramo *Charley's Aunt*. La vagono preterflugis, fulmante fajrerojn el sia superkapa metalfadeno,

kaj averte lumante per ruĝaj kaj verdaj lampoj, kaj malaperis laŭ la ĉefvojo. Kaj grade la kruĉo kaj lavvazo ĉesigis sian interparolon. Ĉar tiu nokto estis la nokto de la dudeknaŭa de Decembro, kaj treege malvarma, sinjoro Cowlshaw reiris en la liton.

“Nu,” li murmuris, “jen afero iom dika, mi ĵuras!” (Tian parolmanieron oni uzas en katedralaj urboj). “Tamen, mi esperas, ke ĝi estos la lasta.”

Ĝi ne estis la lasta. Ĝustadire, ĝi estis nur la dudektria antaŭ la lasta. Regule, en periodoj kvinminutaj, la Kvinurba Elektra Veturiga Kompanio, Limigita, sendis laŭ la strato unu el siaj teruraj maŝinoj, ŝajne kun la intenco dispecigi ĉian doman propran en tiu kvartalo en la apartajn brikojn, kiuj ĝin konsistigis. Je la deksepa fojo, sinjoro Cowlshaw tremis, aŭdante denove la bruon *bump-bump-bump*. Gi estis la vagono kun deformitaj radoj, kiu iris al Longshaw kaj nun revenas. Li rekonis en ĝi malnovan konaton. Li demandis al si, ĉu konjekteble ĝi pasos ankoraŭ trian fojon. Tamen ĝi ne pasis la trian fojon. Kiam kelkaj horloĝoj, en la hotelo kaj ekstere, estis pli-malpli konsentintaj inter si pri la fakto, ke estas jam la unua horo, la tertremoj forĉesiĝis. Sinjoro Cowlshaw ne kuraĝis esperi, ke la tertremoj jam venis al fino. Li atendis kun streĉita atento dum tuta duonhoro, antaŭsentante la proksiman sison. Sed ĝi ne venis. Fakte, tertremoj jam, ĝis morgaŭ, ne ekzistis.

Estis ĉirkaŭ la dua horo, kiam liaj nervoj sufiĉe trankviliĝis, por ebligi al li konsideri, ĉu fine li povos ekdormi. Kaj li estis sur la tuja punkto de glata, dolĉa forglito en staton senkonscian, kiam li estis rekapitata en la realecon per terura eksplodo de ridego ĉe la supro de la ŝtuparo, tuj ekster la pordo de lia dormoĉambro. La konstruaĵo eĥis kiel la internaĵo de piano, kiam oni rekte frapas kordon. Sekvis al la eksplodo mallaŭtaj subtondroj de ridado, kaj tiam serio da ĝojaj, plenkoraj “Bonan nokton.” Li rekonis la voĉojn, ke ili apartenas al grupeto de vojaĝantaj komizoj kaj du aktoroj (el la speciale elektita Londona Pantomima Trupo de la Reĝa teatro en Hanbridge), kiujn la supredirita kelnerino estis elmontrinta al li kun respekto kaj ĝojo. En la privata drinksaloneto, ili rakontis inter si historiojn, kaj ŝajne ankoraŭ ĝis nun ili estis rakontantaj

inter si historiojn. Kaj fakte, la atmosfero de la Kapo de Turko, kie vojaĝantaj komizoj kaj aktoroj renkontiĝadas en ĉiu nokto krom eble la dimanĉa, enhavas pli grandan mezuron da bonaj historioj laŭ la kuba colo, ol ĉiu alia renkontejo en la graflando Stafford. Kelkajn sekundojn post la eksplodo, okazis intermita pafado—la vojaĝantaj komizoj kaj aktoroj fermas siajn pordojn. Kaj ĉirkaŭ kvin minutoj pli poste, okazis alia malpli simpla intermita pafado—la vojaĝantaj komizoj kaj la aktoroj malfermas la pordojn, demetas la botojn (paron por ĉiu homo) kaj ree fermas la pordojn.

Tiam silento.

Kaj tiam el la silento sinjoro Cowlshaw kun teruro aŭdis leviĝi kaj ŝveli vastan kaj timigan spiregadon, kvazaŭ de ia grandega praepoka monstro suferanta. Unuatempe li pensis, ke li sonĝas en dormo. Sed ne tiel estis. Tiu giganta spiriĝemado daŭre kaj regule estadis, kaj sinjoro Cowlshaw ankoraŭ neniam aŭdis ion similan. Gi malpermesis la dormon.

Post eble du horoj de tiu terura fantomeco, sinjoro Cowlshaw distingis la sonon de alŝtela paŝado en la koridoro, kaj fuŝmovajn bruetojn. Denove li leviĝis. Li forte intencis, se li eĉ devos demandi al domrabistoj kaj mortigistoj, eltrovi la signifon de tiu terura spiriĝemado. Kuraĝe li tire malfermis sian pordon, kaj li vidis viron kun antaŭtuko kaj kandelo, signantan per kreto sur botoj kaj metantan ilin en skatolon.

“Aŭskultu!” diris sinjoro Cowlshaw.

“Mi petas pardonon, sinjoro,” flustris la viro. “Mi puŝas antaŭen kun mia laboro, por ke mi povu viziti la futbalan revoludon hodiaŭ posttagmeze. Mi esperas, ke mi ne vekis vin, sinjoro.”

“Aŭskultu min!” diris sinjoro Cowlshaw. “Kio estas tiu konsternanta bruego, kiu aŭdiĝas la tutan tempon?”

“Ĉu bruego, sinjoro?” flustris la viro, mirigite.

“Jes,” insistis sinjoro Cowlshaw. “Similas al io spiranta. Ĉu vi ne povas aŭdi ĝin?”

La viro faris mienon aŭskultan. La bruego vere tondris en la oreloj de sinjoro Cowlshaw.

“Ho! Ĉu tio?” fine diris la viro. “Tio estas la fandfornegoj ĉe la ferfabrikejo de Cauldon Bar. “Ĉu vi

neniam aŭdis ĝin antaŭe, sinjoro? Estas ja tiel en ĉiu nokto. Nun, post via pridiro, mi certe ĝin aŭdas! Sed ĝi estas en distanco de pli ol du mejloj.”

Sinjoro Cowlshaw fermis sian pardonon.

Je la kvina horo, kiam li preskaŭ, sed ne tute, estis forgesinta la spiregadan, lia dumviva amiko, la oval-rada elektra tramveturilo, *bumpe* kaj ŝancele laŭiris la straton, kaj la kruĉo kaj lavvazo klakade interbabilis, kaj la sismaj fenomenoj definitive rekomenciĝis. Estis ankoraŭ malluma nokto, sed la industria tago jam elkrepuskiĝis por la Kvin Urboj. Longaj serioj da senrisortaj ĉaroj komencis preteriri kun skua bruo sub la fenestro de sinjoro Cowlshaw, kaj tiam estis regula multopa klakado de lignaj kaj ledaj botoj sur la pavimo. Iom poste la aero estis ŝirita de vaporaj fajfilegoj, sinsekve bloviĝantaj por anonci laŭ diversaj tonoj, ke estas jen la sesa horo, jen la sesa kaj kvin minutoj, jen la duonhoro, aŭ kiom vi volas. Jam la periodeco de la tertremoj akceliĝis ĝis kvinminuta, kiel ĉe la noktomezo. Unu aŭtomobilo venis el la pordarkaĵo de la hotelo, kaj okupis lokon ekstere kun rapidege funkcia maŝino. Kaj tra la bruo de la tertremoj, de la aŭtomobilo, de la ĉaroj, de la lignaj kaj ledaj botoj kaj de la vaporaj muezinoj vokantaj la fidelulojn al ilia laboro, sinjoro Cowlshaw povis ankoraŭ distingi la nelacigeblan, monstran spiregadan de la fandfornejoj ĉe Cauldon Bar. Kaj fine li aŭdis pluan sonon. Ĝi venis el la ĉambro apuda al la lia, kaj, kiam li aŭdis ĝin, kvankam ellacigita li estis, kvankam ĉagrenita li estis, li tamen eksplodis per ridado, tiel komika li trovis ĝin.

Ĝi estis vekhorloĝo, sonanta alarmon en la apuda ĉambro.

Kaj plue, kiam li malsupreniris al la salona etaĝo, la kelnerino, dolĉa, konscienca virineto, venis al li kaj diris: “Mi tre bedaŭras, sinjoro! Mi tute forgesis ordoni al la botisto veki vin!”

II

En tiu posttagmezo li sidis en sia bela nova operacia ĉambro kaj atendis la okazon, se venos al li dentaj suferantoj el ĉiuj kvartaloj de la Kvin Urboj. Ne bezonas diri, ke neniu venis. La nura fakto, ke nova dentisto “pretiĝis”

en ia regiono, sufiĉas por kvietigi ĉiun sentdoloron en ĉirkaŭo de kelkaj mejloj. La sola martiro, kiu konjekteble povus fari al li viziton, kaj honorarion, ne aperis. Tiu suferantino estis sinjorino Simeono Klaŭz, edzino de l'urbestro. Per kurioza hazardo, li estis rimarkinta, dum sia mallonga pasloĝado ĉe la Kapo de Turko, ke la hotelmastrino evidente suferas pro siaj dentoj, aŭ pro unu aparta dento. Certe ŝi nepre sciigis pri lia nomo kaj okupo, kaj ŝajnis al sinjoro Cowlshaw, ke estus ĝentile ŝiaflanke, se ŝi protektus lin, kiel li jam protektis la Kapon de Turko. Sed neniel! Urbestredzinoj, eĉ la plej taktaj, ne ĉiam faras la konvenan agon en la konvena momento.

Cetere, ŝi konjekteble estis irinta, malgraŭ la dentodoloro, al la futbala provoludo kun la urbestro; ĉar la nova klubo estis sub la persona protekto de lia Moŝto. La tuta potfara komunumo estis irinta al la futbala provoludo. Sinjoro Cowlshaw volonte tien irus, sed estus ago malprudentega, forlasi la metiejon en la malferma tago. Li do sidis kaj oscedis, kaj subrigardis la popolamason dense irantan al la ludejo je la dua horo, kaj dense revenantan en la krepusko je la kvara; kaj je la kvina kaj kvarono li estis leganta plenan priskribon pri la buĉado kaj la heroeco, en la futbala eldonaĵo de la *Signalo*. Kvankam Hanbridge estis venkita, tamen montriĝis laŭ la *Signalo*, ke Hanbridge estis la plibona trupo, kaj ke Rannoch, la nova skota centraŭludisto, estis batalinta brave por la urbo, kiu tiel altapreze estis aĉetinta lin.

Sinjoro Cowlshaw kvazaŭ dormetis super la *Signalo*, kiam okazis sonorado ĉe lia pordo. Li ne ĵetis sin al la pordo. Kun batanta koro li regis ankoraŭ sian spiriton kaj diris en si mem, ke ĝi kompreneble ne povus esti kliento; ke eĉ dentistoj, kiuj aĉetas prete-faritan praktikon, neniam ricevas klienton en sia unua tago. Li aŭdis la serviston iri responde al la sonorado, kaj tiam li aŭdis la serviston diri, "Mi informiĝos, sinjoro."

Fakte, ĝi estis paciento. La servisto, demandinte al sinjoro Cowlshaw, ĉu sinjoro Cowlshaw estas libera, kondukis la pacieron al la moŝta Alesto, kaj la moŝta Alesto tremis.

La paciento estis altkreska, rigida, blonda viro, ĉirkaŭ tridekjara, kun vila kapo kaj neeleganta, tamen daŭropova,

vestaĵo. Li havis pendantajn lipharojn, kiuj malhelpis al sinjoro Cowlshaw fari tujan kalkulon de liaj dentoj.

“Bonan postmezon, mastreto,” diris abrupte la paciento.

“Bonan posttagmezon,” diris sinjoro Cowlshaw. “Ĉu vi havas . . . Ĉu mi eble . . .”

Strange! Nek en la dentista hospitalo, nek en la instruejo, estis lecionoj pri la arto akcepti pacientojn kun konvenaj frazoj.

“Jen kiel,” diris la paciento, metante la manon al la veŝta poŝo.

“Kompleze volu sidiĝi,” diris sinjoro Cowlshaw. Li pliiĝis la gaslumon kaj montris sur la seĝon el seĝoj.

“Jen kiel,” persiste ripetis la paciento. “Ĉu vi vidas la jenajn tri dentojn?”

Li montris tri efektivajn dentojn en peco de ruĝe makulita papero. Kiel spektaklo, ili certe ne estis allogaj, sed sinjoro Cowlshaw estis jam hardita.

“Efektive!” diris senpartie sinjoro Cowlshaw, rigardante ilin.

“Ili estas miaj dentoj,” diris la paciento. Kaj tuj li vaste malfermis la buŝon, malkovrante, ne sen fiereco, la senigitan dentokarnon. “*Ahaŭaj* eĥnoj,” li asertis kun buŝo malfermita, kaj fuŝante la konsonantojn.

“Jes,” diris sinjoro Cowlshaw kun seka tono, “mi ja vidis, ke ili estas superaj incizivoj. Kiel tio okazis? Akcidento, konjekteble?”

“Nu,” diris la viro, “vi povas nomi ĝin akcidento; mi ne tiel ĝin nomas. Mia nomo estas Rannoch; centra antaŭludisto. Vi komprenas? Ĉu vi ĉeestis la provoludon?”

Sinjoro Cowlshaw bone komprenis. Pluan klarigon li ne bezonis; li jam legis ĉion en la *Signal*o. Do la ĉefa viktimo de la Tottenham Hotspur estis veninta al li, ĝuste al li! Jen bona ŝanco! Ĉar Rannoch estis, kompreneble, la plej eminenta viro en la Kvin Urboj kaj la idolo de la popolamaso. Li povus, se plaĉus al li, fariĝi Parlamentano.

“Cielo nin gardu!” diris sinjoro Cowlshaw simpatie, kaj pli firme li montris sur la seĝon el seĝoj, redirante, “Ĉu vi ne bonvolos sidiĝi?”

“Mi lasis kolekti ilin ĉiujn,” daŭrigis sinjoro Rannoch, ignorante la proponon. “Ĉar, venis ia plano al mi en la kapon. Kaj estas pro tio, ke mi venis al vi, ĉar vi estas sur la punkto komenciĝi kiel dentisto. Vi volu meti tiujn ĉi dentojn sur peco de verda veluro en la vitrita skatolo en via fenestro, kun granda anonca karto, ke ili estas certigitaj kiel miaj veraj dentoj, elbatitaj de tiu fripono, la duondistanculo de Tottenham, kaj vi havos ĉirkaŭ via pordo tian amason, kian oni ankoraŭ ne vidis. La tuta anaro de la Kvin Urboj venos vidi ilin. Ĝi estos la plej efika reklamo, kiun dentisto iam recevis, ĉu vi aŭ kiu ajn. Kaj vi povus presigi malgrandan anoncon en la *Signalo*, ke miaj dentoj estas videblaj ĉe via ejo. Nur unu ŝilingon ĝi kostus al vi . . . Kompreneble, vi provizus min per nova dentaro senpage.”

Migrante diversloke en Anglujo, sinjoro Rannoch estis perdinta la plejparton de sia skota tonnuanco, sed li neniel estis perdinta sian skotan lertecon en la arto kaj ruzemo por provi pagi malpli kare ol aliaj homoj ĉion, kion okaze li deziris.

Ekster ĉia dubo, tiu ideo estis ideo genia. Kiel reklamilo, ĝi estus kolosa kaj unika. Dekoj da miloj rigardadus ensorĉite dum tutaj horoj tiujn sanktajn restaĵojn de sia idolo, kaj ĉiu rigardanto nepre estus trasorbata per la nomo kaj adreso de sinjoro Cowlshaw, kaj per la fakto, ke sinjoro Cowlshaw estas ĉef-dentisto por la heroo Rannoch. Sed malfeliĉe, en la dentista rondo ekzistas etiketo. Kaj la etiketo de la dentista profesio estas egale tiel terura kaj tiel nefleksebla, kiel la etiketo de la imperiestra kortego de Aŭstrio.

Sinjoro Cowlshaw sciis, ke li neniel povas fari tiun agon sen pekego kontraŭ la etiketo.

“Mi bedaŭras, ke mi ne povas konformiĝi al via plano,” li diris, “sed mi tute ne povas.”

“Sed, *kara ulo!*” protestis la skoto, “ĝi estas la plej grandioza projekto, kiu iam ekzistis.”

“Jes,” diris sinjoro Cowlshaw, “sed ĝi estus profesie malkonvena.”

Sinjoro Rannoch mem estis profesiulo. “Ho! bele, do,” li diris sarkasme, “se vi estas unu el tiuj fuŝistoj—”

“Mi faros vian komision je la plej malalta prezo,” diris sinjoro Cowlshaw per tono inkliniga.

Sed ne tiamaniere oni povas influi sur skotojn.

Sinjoro Rannoch envolvis siajn dentojn kaj foriris.

Sinjoro Cowlshaw neniam sciis, kio fine okazis al tiuj dentoj. Sed li konvinkis sin, ke almenaŭ oni ne anoncis ilin en la *Signalo*.

III

Nu, ĝuste kiam sinjoro Cowlshaw estis persone kondukanta al la pordo la plej grandan celtrafiston, kiun la Kvin Urboj iam vidis, alia sonorado okazis, kaj tiel hazarde sinjoro Cowlshaw sin trovis en la duopa malfacilaĵo, forbeni la unuan vizitanton kaj bonvenigi la duan per unu sama spiro. Estas vero, ke la dua povus supozi, ke la unua estas kliento, tamen la aspekto de la buŝo de sinjoro Rannoch, se la dua ekvidus ĝin, tute ne estis konfidiga. Sed feliĉe la dua ne ekvidis la buŝon de sinjoro Rannoch.

La dua estis vizitantino ekster la espero de sinjoro Cowlshaw, nome sinjorino Simeono Klaŭz, mastrino de la Kapo de Turko, edzino de l'urbestro de Hanbridge; virino altkreska, bontalia, bonaspekta kaj memfida, havanta almenaŭ kvindek jarojn, sed malpli ol sesdek; patrino de kvin filinoj edziĝintaj, onklino de dek kvar genevoj, avino de sep, aŭ eble ok, diversaj infanetoj; mallonge, unu sinjorino treege influa. Malgraŭ liaj duboj, ŝi estis veninta al li! Se nur li povos plaĉi al ŝi, li rigardis, kiel definitive sankciitan, sian envicigon en la loko de sia antaŭulo, kaj opiniis sian fortunon jam fondita. Nenia homo en Hanbridge kun la plej malgranda sopiro al bona tono eĉ sonĝos, li fidis, viziti alian dentiston, ol tiun sub la protekto de sinjorino Klaŭz.

Ŝi rigardegis lin demande kaj firme. Ŝi piksondis en lian karakteron, kaj li sentis sin trafenita.

“Vi estas sinjoro Cowlshaw, ĉu ne?” Tiel ŝi komencis.

“Bonan posttagmezon, sinjorino Klaŭz,” li respondis.

“Jes, estas mi. Ĉu mi povos servi al vi?”

“Tio dependas,” ŝi diris.

Li petis ŝin enpaŝi, kaj ŝi enpaŝis.

“Ĉu vi havas sperton en la eltirado de dentoj?” ŝi demandis en la operaciejo. Ŝia mano karesis ŝian maldekstran vangon.

“Ho! jes,” li diris, vigle. “Sed kompreneble, ni penas eviti kiom eble la eltiron.”

“Se vi intencas paroli tiamaniere,” ŝi diris froste, eĉ maldolĉe, “plej bone mi foriru.”

Li mire demandis en si mem, kien ŝi celas.

“Nature,” li diris, vekante en si la tutecon de sia latentia diplomatia kapablo, “ekzistas cirkonstancoj, en kiuj la eltiro malfeliĉe troviĝas necesa.”

“Kiom da dentoj vi jam eltiris?” ŝi demandis.

“Efektive, mi ne povas diri,” li mensogis. “Tre multajn.”

“Ĉar,” ŝi diris, “vi aspektas, kvazaŭ vi ne povus krei ‘Bo!’ al ansero.”

Li rimarkis humoran ekbrilon en ŝiaj okuloj.

“Mi opinias, ke mi ja povas krei ‘Bo!’ al ansero,” li diris.

Ŝi ekridis.

“Ne supozu, sinjoro Cowlshaw, ke ĉar mi ridas, mi ne suferas abomenan turmenton. Mi ja suferegas. Kiam mi diras al vi, ke mi ne povis akompani sinjoron Klaŭz al la provoludo—”

“Ĉu vi bonvolos okupi ĉi tiun seĝon?” li diris montrante al la seĝo de seĝoj; “tiam mi povos esplori.”

“Mi abomenas la malagrablan veluran tuŝon de tiuj ĉi seĝoj,” ŝi diris; “ĝi incitas la haŭton.”

“Mi devos vin ĝeni, petante vin demeti la kufon.”

Ŝi do demetis la kufon, kaj li prenis ĝin, kvazaŭ ĝi estus lia unuenaskito, kaj ripozigis ĝin sur sia ŝranketo. Tiam li klinis la gas-braketon tiel, ke la lumo direktiĝis tra la granda kristala sfero kaj igis palpebrumi la urbestredzinon.

“Nun,” li diris per karesa tono, “volu malfermi la buŝon—vaste.”

Kiel ĉiuj virinoj kun karaktero forta kaj sindona, sinjorino Simeono Klaŭz havis grandan buŝon. Obee ŝi malfermis ĝin laŭ mezuro, kiun oni nur povas nomi imponanta, samtempe montrante, per gantita kaj grasa fingreto, sur difinitan lokon en ĝi.

“Jes, jes,” murmuris sinjoro Cowlshaw, ŝajnigante trankvilecon, kiun li ne sentis. Nun por la unua fojo en sia vivo, li esploris la buŝon de urbestredzino, laĵ la sperto maltrankviligis lin.

En tiun buŝon li enmetis sian speguleton kun ebura tenilo, kaj studis ĝiajn sekretojn.

“Komprenite,” li diris, elpreninte la speguleton. “Malkovrita nervo. Tute simpla afero. Nur bezonas, ke oni ĝin ŝtopu. Kiam mi finos ĝin, la dento estos tiel fortika, kiel iam. Ĉiuj ceteraj viaj dentoj estas bonegaj.”

Sinjorino Klaŭz energiege sin levis de la seĝo.

“Vi aŭskultu min iom, mi petas,” ŝi diris. “Mi ne volas ŝtopadon; mi ne permesos ŝtopadon; mi volas la elirigon de tiu dento. Jam hodiaŭ posttagmeze mi kverelis kun unu dentisto, ĉar li rifuzis eltiri ĝin. Mi venis al vi, ĉar vi estas juna, kaj mi pensis, ke vi estos pli inklinigebla. Supozeble, la persono povas decidi mem, ĉu ŝi nepre lasos eligi denton aŭ ne! Ĝi estas mia dento. Por kio ekzistas dentisto? En miaj junaj tagoj, la dentistoj nenion alian faris, ol eltiradi dentojn. Nur tion mi volas scii, ĉu vi eltiros ĝin, aŭ ĉu vi ne eltiros?”

“Efektive estas domaĝe—”

“Jen, kio estas mia afero, ĉu ne?” ŝi intermetis, kaj ekpaŝis al sia kufo.

“Se vi insistas,” li tuj diris, “mi eltiros.”

“Nu,” ŝi diris, “se vi ne nomas tion ĉi insisto, kion nome vi kalkulas insisto? Lasu min diri al vi, ke mi lastan nokton eĉ ne unu momenton dormis.”

Apenaŭ li ne respondis: “Nek mi, en tiu via abomena hotelaĉo,” sed li plibonigis sian intencon.

La urbestredzino reokupis la seĝon, kaj demetis la gantojn.

“Estas do decidite?” ŝi demandis.

“Certe,” li diris. “Ĉu via koro estas bona?”

“Ĉu mia koro estas bona?” ŝi ripetis. “Junulo, kiamaniere tio concernas vin? Estas mia dento, kiun mi komisias al vi, ne mia koro.”

“Mi devos spirigi al vi gason,” diris sinjoro Cowlshaw, malforte.

“Gason!” ŝi ekkriis. “Neniom da gaso vi trudos al mi, junulo. Ne! Mia koro ne estas bona. Sub influo

de gaso, mi mortus. Mi eĉ ne povas enpenŝiĝi pri gaso. Vi devos eligi ĝin sen gaso, kaj vi devas ne dolori min. Mi estas vera infaneto, kaj neniel vi devas dolori min.”

La momento estis kriza. En la okazo se li rifuzos— promesplena kariero povos esti pinĉita en la burĝono; pliĝustadire, ĝi nepre estos pinĉita en la burĝono. Kontraŭflanke, se li akceptos la taskon, la protekto de la aristokrataro de Hanbridge estos je lia dispono. Sed la dento estis kolosa, monumenta. Li taksis la longon de ĝia triopa radiko je ne malpli ol sepdek kvin centonoj de colo [dek naŭ milimetroj].

“Bone komprenite, sinjorino,” li diris, ĉar li estis kuraĝa junulo.

Sed li jam estis en konsterniĝo. Li sentis, kvazaŭ li estas tuj estronta la faman atakon de la Malpeza Brigado. Li sopiris al ia forta trinkaĵo. (Tamen estas malpermesite al dentistoj, drinki). Se malprosperos al li forigi la monumenton ĉe la unua tirego, la rezultato estos por li absoluta fiasko; en unu momento li estos ruiniginta la praktikon, kiu tiel kare kostis al li. Kaj ĉu li povas esperi, ke li ne malsukcesos ĉe la unua tirego? En la plej favora okazo, li nepre doloros ŝin nedireble. Tamen, ĉar li estas konsentinta, li devas traludi la dramon.

Li faris ĉiun antaŭgardon. Li elektis la plej severan el siaj instrumentoj. Li aplikis en la najbareco de la dento la plej laste novan anstataŭaĵon de kokaino; li pretigis molan kotonon kaj glason kun varma akvo. Kaj fine, kiam li jam ne povis plu prokrasti la fatalan ekprovon, li diris:

“Nun, ŝajnas, ke ni estas pretaj.”

“Vi ne doloros min?” ŝi demandis anxie.

“Eĉ ne iomete,” li respondis, kun admirinda ŝajnigo de gajeco.

“Ĉar, se vi doloros—”

Li ridis. Sed ĝi estis historia rido. Lia tuta nervaro estis agacita. Kaj li tre konsciis pri tio, ke en la pasinta nokto li tute ne dormis. Li havis senton de naŭzo. La ĉambro naĝis ĉirkaŭ li. Kun terura penego li ordigis sin.

“Kiam mi kalkulos *unu*,” li diris, “mi ektenos; kiam mi kalkulos *du*, vi devos tre firme ekteni la seĝon; kaj, kiam mi kalkulos *tri*, ĝi eliĝos.”

Tiam li ĉirkaŭis ŝian kapon per sia maldekstra brako—malhome, kiel dentistoj ĉiam estas malhomaj en la vibra krizo. “Pli vaste!” li tondris.


Kaj li ekposedis tiun denton per sia diabla ŝtala ilaĉo.
“Unu—du—”


Li ne sciis, kion li faras.


Tute mankis la ‘tri.’ Okazis malforta dolorkrio, kaj sekvis *bumpo* sur la planko. Sinjorino Simeono Klaŭz salte leviĝis kaj vikle sonorigis. La servanto enkuris. La servanto vidis sinjorinon Klaŭz, kiu per unu mano flegis al si la buŝon, premante al ĝi poŝtukon, dum per la alia mano, kiu tenis ŝian kufon, ŝi ventumis la vizaĝon de sinjoro Cowlshaw. Sinjoro Cowlshaw estis sveninta pro nerva ekscitiĝo, kun laceco. Sed lia sennerva mano ankoraŭ tenis la forcepson; kaj la forcepso triumfe tenis la monumentan denton.

“Malfermu la fenestron,” balbutis sinjorino Klaŭz al la servanto. “Li estas forsveninta; sed li rekonsciigos post minuto.”

Ŝi estis flatita. Sinjoro Cowlshaw estis por ĉiam karigita al sinjorino Klaŭz per tiu ĉi aparta pruvo de ŝia impresemo. Kaj tiuspeca virino povas fari fortunon al duon-dekduo da dentistoj.







57



V. V. Sumfield,
Presisto,
Eastbourne.



THE BRITISH ESPERANTIST

La Oficiala Gazeto de la Brita Esperantista Asocio.

Ĉiumonate 4 pencoj; Jara Abono, 5 ŝilingoj afrankite.

“THE BRITISH ESPERANTIST,” kun kiu unuiĝis “THE ESPERANTO MONTHLY,” estas presita Esperante kaj angle. Krom la oficialaĵoj de la Asocio, troviĝas en ĝi Raportoj interesaj el lokaj Grupoj, Artikoloj pri la Gramatiko, Literaturaĵoj originalaj kaj tradukitaj, Recenzoj, Korespondaĵo, Alilandaj Novaĵoj; Konsiloj por Lernantoj; k.t.p.

LA BRITA ESPERANTISTA ASOCIO

estas unuiĝo de Esperantaj Societoj tra la Brita Imperio; ĉiu Esperantisto devas aliĝi por helpi la propagandon de nia kara lingvo.

Ĉiu Membro ricevas senpage “The British Esperantist,” Kotizaĵo 5 ŝilingoj Ĉiujare.!

Książnica Podlaska

im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0002487

TO ASSOCIATION (Incorporated),
street, London, W.C. 1.